

# POUR LA FRANCE, PAR L'ESPERANTO

## POR FRANCUJO, PER ESPERANTO.

Sidejo : 51, rue de Clichy, Paris.



La Komitato « POUR LA FRANCE, PAR L'ESPERANTO », celas faciligi la senpartian juĝon de la neŭtraluloj pri la Milito de 1914-1915, konigante al ili, per Esperanto, la argumentojn favorajn al Francujo kaj al ĝiaj Kunmilitantoj.

Paris la 20<sup>a</sup> de aprilo 1915.

*Estimata Sinjoro*

*De multaj flankoj, ni estas informitaj, ke Esperantistoj, apartenantaj al neŭtralaj landoj, ricevas el Germanujo, broŝurojn, foliojn, k. t. p., redaktitajn en lingvo Esperanto, kaj kiuj priskribas la militajn okazantaĵojn, laŭ la germana vidpunkto. Tiu agado estas nur parto de la granda propagando farata de germanaj institucioj, en ĉiuj neŭtralaj landoj, por altiri simpatiojn kaj helpojn al la german-aŭstria partio.*

*Multaj Francoj, esperantistaj kaj ne-esperantistaj, opiniis, ke patriotisma devo konsilas al ili, ke ili respondu al tiu propagando, per kontraŭ-propagando farita ankaŭ per Esperanto, en la samaj neŭtralaj landoj, kaj Komitato titolita « Por Francujo, per Esperanto », fondiĝis kun tiu celo. Tiu Komitato intencas publikigi en Esperanto, broŝurojn kaj flugfoliojn, en kiuj oni povos trovi argumentojn favorajn al la vidpunkto de Francujo, kaj de la Regnoj kunligiĝintaj kun ĝi.*

*Ni sendas al vi, Estimata Sinjoro, kun tiu letero, la unuajn presaĵojn preparitajn de tiu Komitato, kaj ni petas, ke vi bonvolu ilin atente legi. Ni estos ankaŭ tre dankaj al vi, se vi bonvolas ilin konigi inter la Esperantistoj de via urbo aŭ regiono. Por tio, ni povos sendi al vi senpage la nombron da pluaj ekzempleroj, kiun vi povos bezoni.*

*Ni sendos al vi, ankaŭ, la sekvantajn dokumentojn, kiujn ni presos kaj ni esperas, ke vi ilin ankaŭ volonte akceptos kaj diskonigos.*

*Per tiuj sendoj, ni ne intencas trudi al vi niajn opiniojn kaj ideojn. Nia celo estas nur faciligi vian senpartian juĝon pri la nuna milito. Ĉar germanaj Esperantistoj, cetere bonintencaj, sendis al vi multajn dokumentojn per kiuj ili celas konigi al vi, kion ili konsideras kiel la veron pri tiu milito, ni pensis, ke vi ankaŭ deziris ricevi dokumentojn de la kontraŭa partio, kiuj montrus al vi, kion Francujo kaj ĝiaj kunbatalantoj konsideras kiel la veron.*

*Esperante ke, per tiuj sendoj, ni antaŭplenumis vian propran deziron, ni petas vin akcepti, Estimata Sinjoro, niajn sincerajn salutojn.*

La Iniciata kaj Patrona Komitato.

#### NOTOJ.

*1-Oni trovos, sur la paĝo tria, la nomaron de la ĝis nun enskribitaj anoj de la Iniciata kaj Patrona Komitato Por Francujo, per Esperanto.*

*2-La Komitato deklaras, unu fojon por ĉiam, ke ĝi estas tute sendependa de ĉiu ajn institucio aŭ asocio, esperantista aŭ ne, internacia aŭ nacia.*

---



# POUR LA FRANCE, PAR L'ESPERANTO

POR FRANCUJO, PER ESPERANTO

## INICIATA KAJ PATRONA KOMITATO


*Nomaro de la anoj, la 15<sup>an</sup> de Marto 1915.*

APPELL, Paul, ano de la Akademio de Sciencoj.  
ARCHDEACON, Ernest, vicprezidanto de la Nacia Aera Ligo.  
AUBRIOT, Paul, deputato.  
BARAT, Gaston, honora prezidanto de la Unuiĝo de la Studentoj de *Lille*.  
BERGONIÉ, Doktoro J., profesoro en la Universitato de *Bordeaux*.  
BERRY, Georges, deputato.  
BERTHELOT, Daniel, ano de la Akademio de Medicino, prezidanto de la Internacia Societo de Elektristoj.  
BETOUILLE, deputato.  
BIGOURDAN, G., ano de la Akademio de Sciencoj.  
BILHAUD, Paul, teatra verkisto.  
BOIRAC, membro korespondanto de la Instituto, rektoro de la Universitato de *Dijon*.  
BONAPARTE, Princo Roland, ano de la Akademio de Sciencoj.  
BONNIER, Gaston, ano de la Akademio de Sciencoj.  
BOUCHARD, Doktoro Charles, ano de la Akademio de Sciencoj kaj de la Akademio de Medicino.  
BRENIER, Joseph, deputato.  
BRETON, G., kundirektoro de la firmo Hachette kaj K-o.  
BRETON, J. L., deputato.

BRULAT, Paul, literaturisto.  
BUISSON, Ferdinand, eks-deputato, prezidanto de la Ligo por la Rajtoj de la Homo kaj de la Civitano.  
CAIN, Henri, literaturisto kaj pentristo.  
CARPENTIER, ano de la Akademio de Sciencoj.  
CHAUMET, Charles, deputato, eks-Sub-Sekretario de Ŝtato por Poŝtoj kaj Telegrafoj.  
CHAUVEAU, Doktoro, senatano.  
COLSON, profesoro en la Politeknika Lernejo.  
CORNET, Lucien, senatano.  
DEBOVE, Doktoro, Profesoro en la Fakultato de Medicino, konstanta Sekretario de la Akademio de Medicino.  
DECAUVILLE, Paul, eks-senatano, inĝeniero.  
DELONCLE, Charles, senatano.  
DESLANDRE, profesoro en la Universitato de *Dijon*.  
DESLANDRES, ano de la Akademio de Sciencoj, direktoro de la astronomia Observejo de *Meudon*.  
DOISY, Doktoro, deputato.  
DUFONT, Émile, senatano.  
EIFFEL, G., inĝeniero.  
ÉGERAND, Fernand, deputato.  
FARJON, eks-deputato, prezidanto de la Komerca Ĉambro de *Boulogne-sur-Mer*.  
FARMAN, Henry, aviadisto.

FLEUBOT, Paul, urba konsilanto de *Paris*.  
FLOQUET, dekanano de la Fakultato de Sciencoj de *Nancy*.  
FRAPIÉ, Léon, literaturisto.  
GARDEL, ano de la Akademio de Medicino, ĝenerala Inspektoro de Pontoj kaj Vojoj.  
GODART, Justin, deputato, vicprezidanto de la Ĉambro de Deputatoj.  
GRAMONT, Grafo de, ano de la Akademio de Sciencoj.  
GRANDMAISON, Georges de, deputato.  
GUÉROULT, honora ĝenerala kasisto-pagisto.  
HADAMARD, ano de la Akademio de Sciencoj, profesoro en la Kolegio de Francujo, kaj en la Politeknika Lernejo.  
HALLER, ano de la Akademio de Sciencoj.  
HERRIOT, Édouard, senatano, urbestro de *Lyon*.  
JOLY, Antony, eks-deputato.  
LALLEMAND, ano de la Akademio de Sciencoj, ĝenerala Inspektoro de Minoj.  
LÉAUTÉ, ano de la Akademio de Sciencoj.  
LE MONNIER, honora profesoro en la Fakultato de Sciencoj de *Nancy*.  
MARTIN, Louis, senatano.  
MICHELIN, André, inĝeniero.  
MIRMAN, Léon, prefekto de *Meurthe-et-Moselle*.  
MOUREU, Charles, ano de la Akademio de Sciencoj kaj de la Akademio de Medicino, profesoro en la Supera Lernejo de Farmacio.  
NOBLEMAIRE, G., honora ĝenerala Direktoro de la fervoja Kompanio P.-L.-M.  
OHNET, Georges, literaturisto.

PÉCHADRE, deputato.  
PERREAU-PRADIER, deputato.  
PICHON, René, profesoro en la Normala Lernejo de *Sèvres*.  
PIERROTET, direktoro de la Kolegio Sainte-Barbe, urbestro de la 5-a distrikto de *Paris*.  
RAFFIN-DUGENS, deputato.  
REBELLIAU, ano de la Akademio de Sciencoj Moralaj kaj Politikaj.  
REINACH, Salomon, ano de la Akademio de Surskriboj kaj Beletristiko.  
RICHARD, senatano.  
RICHEL, Charles, ano de la Akademio de Sciencoj kaj de la Akademio de Medicino, laŭreato de la premio Nobel.  
ROGNON, Étienne, deputato.  
ROLLET DE L'ISLE, ĉefinĝeniero de la Maristaro.  
ROUX, Doktoro, ano de la Akademio de Sciencoj, direktoro de la Instituto Pasteur.  
SABOT, urbestro de la 12-a distrikto de *Paris*.  
SARCEY, Sinjorino Yvonne, direktorino de la « *Université des Annales* ».  
SCHLOESING, Th., ano de la Akademio de Sciencoj.  
SCHMIDT, Henry, deputato.  
SURVILLE, dekanano de la Fakultato de Juro de *Poitiers*.  
TOULOUSE, Doktoro, ĉefkuracisto de la malsanulejo de *Villejuif*.  
VAUCAIRE, Doktoro.  
ZUYLEN DE NIEVELT DE HAAR, barono de, prezidanto de la Aŭtomobila Klubo de Francujo.





# COMITÉ " POUR LA FRANCE PAR L'ESPERANTO "

51, rue de Clichy, PARIS

---

MONSIEUR,

Nous vous envoyons avec cette lettre le rapport que nous adressons à tous nos correspondants des pays neutres pour leur faire connaître la situation de nos travaux.

En vous communiquant ces renseignements, nous sollicitons à nouveau votre concours, afin de pouvoir continuer la lutte que nous soutenons dans les milieux espérantistes des pays neutres, pour combattre la propagande contraire si puissamment organisée par nos ennemis.

La prolongation de la guerre, en nous obligeant à poursuivre nos travaux au delà des limites que nous pouvions prévoir, a épuisé les ressources que nous étions parvenus à réunir grâce au concours de nos adhérents et à des encouragements officiels. Nous vous serions très reconnaissants si vous vouliez bien personnellement répondre à notre appel, et solliciter autour de vous de nouvelles adhésions pour notre œuvre.

Nous disposons encore d'un certain nombre d'exemplaires des documents relatifs à la fondation de notre Comité : Appel à tous les Français (1), Bulletin de souscription. But et Plan de la Publication, et vous trouverez ci-joint un exemplaire de chacun d'eux.

Nous nous ferons un plaisir de vous en faire parvenir d'autres, selon les besoins de votre propagande, si vous voulez bien en adresser la demande au Secrétariat de notre Comité.

Veuillez agréer, Monsieur, l'assurance de nos sentiments les plus distingués.

POUR LE COMITÉ :

*La Commission exécutive*  
(en résidence à Paris) :

AYMONIER, Camille, professeur agrégé au Lycée Buffon ;  
CHAVET, Gabriel, secrétaire-trésorier du Comité ;  
DECOURT, Lucien, professeur agrégé au Lycée Michelet ;  
GROSJEAN-MAUPIN, agrégé de l'Université, receveur spécial des Finances ;  
PICHON, René-Charles, diplômé d'études supérieures ;  
ROLLET DE L'ISLE, ingénieur en chef de la Marine ;  
ROUSSEAU, Célestin, pharmacien à Levallois-Perret ;  
SEBERT (Général), membre de l'Académie des Sciences.

---

(1) A la liste des membres du Comité de Patronage encarté dans cet appel, il y a lieu d'ajouter les noms des personnalités suivantes, qui nous ont envoyé leur adhésion après la publication de cette liste :

Mme GARONNE, Inspectrice générale de l'Instruction publique ;  
MM. GENUER, Maire de La Roche-sur-Yon ;  
PACAUD, Docteur, Député de la Vendée ;  
RENAUDEL, Pierre, Député du Var.



# RAPPORT SUR L'ÉTAT DES TRAVAUX

à la date du 12 mars 1917

**AVIS.** — *Le présent Rapport est envoyé, en français, à tous les correspondants du Comité « Pour la France par l'Esperanto ». Il en existe une traduction en Esperanto, mais comme les correspondances en langue internationale ne sont pas acceptées dans tous les pays, cette traduction ne sera envoyée à l'étranger qu'aux correspondants qui en feront expressément la demande.*

**AVIZO.** — Tiu Raporto estas sendata, en Franca lingvo, al ĉiuj korespondantoj de la Komitato « Por Francujo per Esperanto ».

Oni preparis tradukon en Esperanto de tiu teksto, sed ĉar la transsendo de dokumentoj skribitaj en internacia lingvo ne estas akceptata en ĉiuj landoj, oni sendos ekzemplerojn en Esperanto nur al la korespondantoj, kiuj tion petos.

Le Comité « Pour la France par l'Esperanto » dont la circulaire d'appel à tous les Français a fait connaître, dès le mois de janvier 1915, le but et la constitution, a pu poursuivre son œuvre sans arrêt jusqu'à ce jour, malgré les difficultés résultant de la mobilisation d'une grande partie des collaborateurs sur lesquels il aurait pu compter et malgré les conditions défavorables dans lesquelles il s'est trouvé.

Le document qu'il a fait connaître, au mois d'avril 1915, en double texte français et esperanto, et qui porte le titre : Feuilles volantes sur la guerre européenne, (Tract n° 0 et Flugfolio 0a) a fait connaître la nature des publications que ce Comité se proposait de faire paraître successivement, pour être envoyées aux Espérantistes des pays neutres.

Ceux de ces documents qui sont déjà parus comprennent des brochures, format 15/24 et des feuilles volantes ou tracts, format 21/27 cm.

Expédiés dans des pochettes qui ont pu contenir également des exemplaires des bulletins de la Chambre de Commerce de Paris publiés en différentes langues, ils ont fait l'objet de quatre séries d'envois aux dates suivantes : 24 avril 1915, 13 juillet 1915, 15 juin 1916 et 12 mars 1917.

Les feuilles volantes, tirées à 10.000 exemplaires, étaient placées par cinq dans chacune des pochettes qui ont été expédiées à plus de deux mille destinataires. Les brochures tirées à 3.000 exemplaires n'ont été envoyées qu'à un ou deux exemplaires par pochette.

Nous donnons ci-après la nomenclature de toutes ces publications, avec indication des envois qui les comprenaient, pour permettre aux destinataires de ces envois, auxquels sera adressée une traduction de cette liste, de s'assurer s'ils les ont bien tous reçus. Nous avons su, en effet, que, dans certains pays, quelques-uns de ces documents ne sont pas parvenus à destination.

Nous avons joint à notre liste une courte analyse de chacun des documents ou quelques lignes de commentaires pour en préciser la nature, pour les personnes qui ne les auraient pas sous les yeux.

## FEUILLES VOLANTES OU TRACTS

A l'exception du tract n° 0, où le texte en esperanto est noté 0 bis, on a donné des numéros *sans indice* aux textes en esperanto, et des numéros *bis* aux textes français de ces mêmes documents.

Feuilles Nos 0 et 0 bis (1<sup>er</sup> envoi) :

### Feuilles volantes sur la guerre européenne. But et plan de la publication

Ce tract, en double texte, français et esperanto, indique l'esprit dans lequel a été conçu le travail du Comité et fait connaître le classement d'après leur nature, que l'on se propose d'adopter pour les publications.

Feuille N° 1 (1<sup>er</sup> envoi) et Feuille N° 4 (2<sup>e</sup> envoi) :

### Ce que les neutres pensent de la guerre (Kion pensas la neŭtraluloj pri la milito)

Ces documents renferment la traduction en esperanto d'opinions exprimées par des notabilités de divers pays neutres au sujet notamment des causes de la guerre, de la responsabilité des gouvernements austro-allemand et des actes commis par les armées ennemies, en violation du droit des gens ou des règles de la guerre, fixées par des conventions internationales.

Feuilles Nos 2 et 2 bis (2<sup>e</sup> envoi) et N° 7 (3<sup>e</sup> envoi) :

### A propos de la neutralité belge (Pri la Belga neŭtraleco)

Ces deux feuilles exposent dans quelles conditions ont été violées la neutralité belge et aussi celle du Luxembourg. Elles opposent aux assertions du gouvernement allemand à ce sujet les répliques du gouvernement belge.

Feuille N° 3 (3<sup>e</sup> envoi) :

### Réponses à quelques assertions allemandes (Respondoj al diversaj Germanaj diroj)

Ces feuilles réfutent des récits inexacts contenus dans des documents allemands sur certains faits qui se sont passés pendant la guerre ou sur les causes qui les ont motivés, tels que le prétendu bombardement de Nuremberg, invoqué pour justifier la déclaration de guerre de l'Allemagne à la France, les causes de l'incendie de Louvain et du bombardement de la cathédrale de Reims, le massacre des Italiens de Longwy, etc.



Feuille N° 5 (2<sup>e</sup> envoi) :

**Les crimes allemands d'après les témoignages allemands**  
(Germanaj atestoj pri germanaj krimoj)

Cette feuille est la traduction de la brochure du professeur NYEDIER, suivie de celle de l'appréciation du professeur NYTORP, de Copenhague.

Feuille N° 6 (3<sup>e</sup> envoi) :

**Le martyre de la Belgique**  
(La martiro de Belgujo)

Cette feuille renferme des traductions d'articles extraits de cahiers documentaires publiés par les soins du gouvernement belge, et concernant le martyre de la malheureuse Belgique.

Feuille N° 8 (3<sup>e</sup> envoi) et 8 bis (4<sup>e</sup> envoi) :

**Manifestation en l'honneur de Miss Edith Cavell**  
(Manifestado por la honoro de Miss Edith Cavell)

Discours prononcés par M. Ferdinand Buisson, président de la Ligue des Droits de l'Homme, et par M. Painlevé, Ministre de l'Instruction Publique, à la cérémonie organisée au Palais du Trocadéro, le 20 novembre 1915, en l'honneur de Miss Cavell.

Feuille N° 9 et 9 bis (4<sup>e</sup> envoi) :

**EN L'HONNEUR DES MARTYRS DE LA GUERRE**

**Manifestations dédiées aux mémoires de Miss Cavell et d'Eugène Jacquet**

(POR LA HONORO DE LA MILITMARTIROJ)

**Manifestadoj dediĉitaj al la memoroj de Miss Cavell kaj Eugène Jacquet**

Ces feuilles qui reproduisent les portraits de Miss Cavell et d'Eugène Jacquet donnent des documents officiels sur la mort de ce dernier et reproduisent le discours prononcé par Mme Séverine à la manifestation du Trocadéro, et qui fait l'objet du tract précédent (N° 8) ainsi que le discours prononcé par M. Jacomet, procureur général à Douai, à la manifestation organisée en l'honneur d'Eugène Jacquet.

**BROCHURES**

Les brochures éditées par le Comité sont actuellement au nombre de six, savoir :

Brochures Nos 1 (1<sup>er</sup> envoi) et N° 2 (2<sup>e</sup> envoi) :

Premier et second rapports présentés au Président du Conseil des Ministres par la Commission établie pour constater les actes commis par les ennemis en violation des lois sur les droits des peuples. Ces rapports ont paru dans le *Journal Officiel* de la République Française aux dates des 6 janvier et 11 mars 1915.

Brochure N° 3 (3<sup>e</sup> envoi) :

**La guerre allemande et le catholicisme**  
(Germana milito kaj katolikismo)

Extrait et résumé, en esperanto, du livre portant le même titre et édité par le Comité Catholique pour la Propagande française.

Brochure N° 4 (4<sup>e</sup> envoi) :

**Qui a voulu la guerre? (Kiu volis la militon?)**

Cette brochure indique les origines de la guerre d'après les documents diplomatiques. Elle est due à MM. Durckheim et E. Denis, professeurs à l'Université de Paris.

Brochure N° 5 (4<sup>e</sup> envoi) :

**Kiel la Aŭstro-Hungaroj faris la militon en Serbujo**  
(Comment les Austro-Hongrois ont fait la guerre en Serbie)

Cette brochure, extraite d'un livre publié par M. R. A. Reiss, professeur à l'Université de Lausanne, montre les exactions commises par les Austro-Hongrois, dignes émules de leurs alliés les Allemands. De nombreuses illustrations témoignent de la véracité des faits allégués.

Brochure N° 6 :

**Le Touriste allemand (La Germana Turisto)**

Cette brochure est la traduction en esperanto de la conférence faite par M. l'abbé Vetterlé à l'Assemblée Générale du Touring-Club de France, le 5 décembre 1915.

Cette brochure parue depuis notre dernier envoi n'est pas encore distribuée. Elle le sera en même temps que les autres documents que nous projetons de faire paraître, si nos fidèles adhérents nous permettent de le faire en nous y aidant.

Les documents que nous avons l'intention de publier traiteraient des conditions de la paix, pour nos ennemis et pour nous-mêmes, d'après les documents officiels.



## FLUGFOLIOJ PRI LA EUROPA MILITO

### CELO KAJ PLANO DE LA PUBLIKIGAJO

La Komitato fondita, kun la titolo « Por Francujo, per Esperanto », celas respondi, per publikigo de similaj dokumentoj, al la propagando farita de la Germanoj, por diskonigi, en la neŭtralaj landoj, tradukojn en internacia lingvo Esperanto, de dokumentoj, per kiuj ili celas pravigi siajn agojn kaj defendi sian vidpunkton.

Ĉiuj dokumentoj, kiujn ili publikigas tiamaniere kaj en tre granda nombro, ne necesigas, same, respondojn.

Al la oficialaj broŝuroj kaj dokumentoj, kiel la diplomataj korespondataĵoj, la parlamentaj paroladoj kaj komunikoj, la Komitato jam respondis aŭ respondos, laŭ la financaj rimedoj, kiujn ĝi povos disponi, per publikigo de tradukoj de similaj broŝuroj aŭ dokumentoj, kiuj, laŭ ĝi, prezentas la faktojn, sub ilia vera aspekto.

Ne ŝajnas utile respondi al la ĉiutagaj oficialaj komunikoj de la granda germana armeestraro, kies tradukoj, sur flugfolioj, estas regule dissendataj, en ĉiuj neŭtralaj landoj.

La okazantaĵoj ĉiutage tion faras, kaj por la loĝantoj de neŭtralaj landoj, la plej interesa afero ne estas la sinsekvado de la diversaj faktoj de la okazantaj luktoj, sed pli bone la atendotan finan rezulton.

La publikigaĵo, al kiu estas plej utile respondi estas la duonmonata gazeto, kiun grupo de germanaj Esperantistoj publikigas sub la titolo « Internacia Bulteno », kaj kiu estas senpage dissendata, en la neŭtralaj landoj kaj en la invaditaj regionoj, al esperantistaj korespondantoj.

La dokumentoj, kiujn tiu gazeto enhavas, estas interesaj kaj lerte elektitaj. La ĉarmo de la publikigaĵo estas pliigita de artaj ilustraĵoj kaj eĉ de fotografiaĵoj, al kiuj oni povas tamen riproĉi ke ili kelkfoje estas falsigitaj.

La antaŭparolo de tiu gazeto montras, ke ĝia ĉefa redaktoro estas sincera, kaj ke li efektive kredas, ke tiu publikigaĵo servos la veron kaj la pravecon, konigante, en la fremdaj landoj, la faktojn, kiuj, laŭ li, estus intence kripigitaj kaj ŝanĝitaj, de la raportoj donitaj de la gazetaro, favora al la kunmilitantaj Regnoj.

Li ŝajnas tute nekoni la riproĉindajn agojn, kiuj tamen,

estas nekontesteble faritaj de la germanaj armeoj, en la invaditaj landoj, kaj kiuj estas veraj krimegoj de vandalismo, barbareco kaj banditismo.

Ili ofte estas faritaj, laŭ la ordono mem de la estroj de la germana armeo kaj ili estas konstatitaj de certaj atestoj, aŭ ili lasis neneeblajn materiajn postsignojn.

Kiam, kelkfoje, la redaktoroj de la « Internacia Bulteno », raportas la kulpigojn faritajn pri tio, kaj kiujn ili povis koni, ili konsideras ilin kiel abomenajn kalumniojn.

Tiu spiritustato povas klarigi nur se oni opinias, ke al tiuj redaktoroj oni sisteme ne konigis tion, kio okazis ekstere de Germanujo kaj oni metis je ilia dispono nur neplenajn aŭ intence neĝustajn dokumentojn.

Ĉar por tiuj, kiuj, kiel ni Francoj, restis ekstere de la baro, kiun la Germanoj starigis, ĉe si, por malhelpi la enpenetron de la vero, same kiel por ĉiuj, kiuj estis viktimoj aŭ ĉeestintoj de la okazintaĵoj, kiujn oni vane provus nei aŭ forgesigi, tiuj faktoj estas nekontesteblaj kaj malfeliĉe pruvitaj per tro da ankoraŭ sangaj kaj doloraj signoj.

Nia devo do konsistas, por defendi nian vidpunkton kaj por ebligi, ke la neŭtraluloj havu precizan opinion, konigi al ili la dokumentojn, kiuj ŝajnas enhavi la ĝustan veron kaj kiuj kontraŭdiras la asertojn enhavatajn en tiuj, kiuj publikigas la « Internacia Bulteno ».

Ni tion faros, uzante prefere, por ilin publikigi, la dokumentojn, kiuj povas havi specialan intereson por la neŭtralaj landoj kaj konigi al ili la veron pri la intencoj kaj tendencoj de la militantaj Regnoj, tiamaniere ke ni ebligos al ili certe antaŭvidi, kiuj povus esti por ili la konsekvencoj de la fina triumfo de unu aŭ alia el la militantaj partioj.

Tio, kion ni scias, pri la principoj de sociala organizo, kiujn laŭdkonsilas la Germanoj, kontraŭe al la principoj de civilizado, kiujn ni deziras triumfigi, ne ebligas, ke ni Francoj dubu pri la malbonegaj konsekvencoj, kiujn havus, por la tuta homaro, la starigo de la germana super-rego, fondita sur militarismo, kaj ni devas nenion mala-



tenti por komuniki, al la loĝantoj de la neŭtralaj landoj, la elementojn, sur kiuj ni fundamentas nian konvinkon.

Povos okazi, ke, al tiuj dokumentoj, miaj malamikoj kontraŭmetos aliajn similajn dokumentojn, kiuj same pri-traktos la respondecon de la Kunmilitantoj. Ili povos ilin publikigi, kiel respondojn al la niaj. Tiu duobla publikigo havos la utilecon altiri la atenton de la interesatoj pri la rimedoj, kiujn oni devos uzi en la fina solvigo de la nuna konflikto por eviti, se eble, en la estonta tempo, la reokazigo de similaj malfeliĉegoj.

La Esperantistoj, kiuj devas ĉiuj deziri la definitivan malaperon de la milito kaj la starigon de universala paco en la mondo, ne povos plendi pri la rezultato.

Rilate la formon laŭ kiu ni povis aperigi la dokumentojn, kiujn ni intencas publikigi, ni devis konstati, ke la cirkonstancoj ne estis favoraj al publikigo de perioda gazeto, kiel la germana « Internacia Bulteno », sed ni opiniis, ke ni ricevos similan kaj eĉ pli bonan rezulton, elektante, por nia publikigo, la formon de flugfolioj, kiuj povas esti aparte sendataj, kiel la oficialaj germanaj komunikoj, sed kiuj, kontraŭe al tiuj ĉi, estus dediĉataj, ĉiu, al serio de kunrilatantaj temoj, tiamaniere ke oni kunigos sur la samaj folioj la temojn, kiuj povas interesi la samajn kategoriojn de legantoj kaj esti disdonataj utile en la samaj rondoj.

La plimulto el la dokumentoj, kiujn ni disponas, estas verkitaj en franca lingvo. Pro tio, ni ofte aldonos al la folioj, kiuj donas la tradukojn en Esperanto, aliajn foliojn, kiuj represas iliajn originalajn tekstojn mem. Niaj legantoj povos tiamaniere plibone konstati la specon de tradukitaj dokumentoj kaj ilian aŭtentikecon.

Se eble tiuj folioj aperos regule, unu ĉiusemajne. Ili estos publikigitaj, ne observante antaŭdifinitan ordon kaj sin sekvos, kun simpla orda numerigo, sed ili aplikiĝos sinsekve al la diversaj kategorioj de temoj, kiujn la aktualeco aŭ la cirkonstancoj igos nin studi.

Por faciligi ilian klasifikon laŭ la specoj kaj la disdonadon al la kategorioj de legantoj, kiuj povos interesiĝi pri ili, ni ilin distingigos en serioj, kiuj estos montritaj per la literoj A, B, C, k. t. p., laŭ la informoj donitaj ĉi-poste, kaj en ĉiu serio, ni montros, per la almeto de la litero *a* almetita post la granda litero, la foliojn, kiuj pli speciale estos dediĉitaj al la analizo de iom gravaj libroj, al kiuj unu sola folio povos esti dediĉita. Tiuj folioj tiel havos bibliografian karakteron, kiu povos ilin kolektigi de kelkaj kategorioj de legantoj aŭ ilin utiligi de la eldonistoj por konigi la verkojn, pri kiuj ili speciale traktas.

Oni trovos, en la serio A, la dokumentojn, kiuj rilatas la ĝeneralajn socialajn demandojn, kiel tiujn pri la penso-maniero de la militantaj nacioj, pri la manifestaĵoj de pangermanismo, la artikolojn de scienca kaj literatura kritiko, pri okazintaĵoj rilataj al tiuj specialaj demandoj, kaj nome tiujn kiuj rilatas la « Alvoko al la civilizitaj nacioj » de germanaj eminentuloj kaj la respondojn, kiujn ĝi naskis.

En la serio B, oni klasifikos la demandojn rilatajn al la popolarĵo, al la kutimoj de la milito. Oni trovos en ĝi la raportojn pri faktoj, kiuj koncernas la malrespektojn de la leĝoj de la milito kaj de la neŭtraleco de la nemilitantaj regnoj, pri la atencoj kontraŭ nedefendataj urboj, monumentoj, kaj civila loĝantaro, kaj pri la agoj de militista barbareco kaj banditismo.

La serio C estos dediĉita al la demandoj, kiuj havas historian ĝeneralan karakteron. Oni klasifikos en ĝi la foliojn, kiuj kunigas la dokumentojn de politiko aŭ diplomatio, la parlamentajn dokumentojn, la paroladojn kaj deklarojn de regnestroj, k. t. p.

Fine, en la serio D, oni klasifikos la demandojn pri militista arto. Oni povos trovi en ĝi teknikajn raportojn pri la militaj operacioj kaj rakontoj pri militfaktoj, kaj ankaŭ dokumentojn pri la militmaterialo, ĝia priskribo kaj uzado.





# FEUILLES VOLANTES SUR LA GUERRE EUROPÉENNE

## BUT ET PLAN DE LA PUBLICATION

Le Comité qui a été fondé sous le titre *Pour la France par l'Esperanto* a pour but de répondre, par la publication de documents analogues, à la propagande que les Allemands font dans les pays neutres, par la traduction, en langue internationale neutre Esperanto, de documents destinés à justifier leurs actes et à défendre leur cause.

Tous les documents qu'ils publient de cette façon, et qui sont en nombre considérable, n'appellent pas au même titre une réponse. Aux brochures et aux documents de caractère officiel, tels que les pourparlers diplomatiques, les discours et messages parlementaires, le Comité a répondu déjà ou répondra, dans la limite de ses moyens financiers, par la publication de traductions des brochures ou des documents analogues qui présentent, selon lui, les faits sous leur véritable jour.

Aux communiqués officiels journaliers du Grand État-Major allemand, dont les traductions, sous forme de feuilles volantes, sont expédiées, régulièrement, dans tous les pays neutres, il paraît inutile de répondre.

Les événements se chargent tous les jours de ce soin et, pour les habitants des pays neutres, ce qui présente de l'intérêt, ce n'est pas la succession des péripéties des luttes engagées, mais bien le résultat final à attendre.

La publication à laquelle il est plus utile de répondre est le journal, à périodicité bimensuelle, qu'un groupe d'Esperantistes allemands fait paraître sous le nom de *Bulletin international* (*Internacia Bulteno*) et qui est envoyé gratuitement, dans les pays neutres et les pays envahis, à des correspondants Esperantistes.

Les documents que contient ce journal sont intéressants et habilement choisis. L'attrait de la publication est augmenté par des illustrations artistiques et même par des photographies, auxquelles on peut reprocher toutefois de ne pas être restées à l'abri des falsifications.

La préface de ce journal montre que son principal rédacteur est de bonne foi, et qu'il croit réellement, par cette publication, servir la cause de la vérité et du bon

droit en faisant connaître à l'étranger les faits qui, d'après lui, seraient systématiquement travestis et dénaturés par les comptes rendus qu'en a donnés la Presse au service des Alliés.

Il paraît ignorer entièrement des actes répréhensibles qui, cependant, ont été incontestablement commis par les armées allemandes dans les pays envahis, et qui sont de véritables forfaits de vandalisme, de barbarie et de banditisme.

Ils ont été souvent commis sur l'ordre même des chefs de l'armée allemande et ils ont été constatés par des témoignages certains ou ont laissé des traces matérielles indéniables.

Quand, par hasard, les rédacteurs du *Bulletin international* font mention des accusations qui ont été formulées à ce sujet et qui sont parvenues jusqu'à eux, c'est pour les considérer comme d'infâmes calomnies.

Cet état d'esprit ne peut s'expliquer qu'en admettant que ces rédacteurs ont été tenus systématiquement dans l'ignorance de ce qui s'est passé en dehors de l'Allemagne et qu'ils n'ont eu à leur disposition que des documents incomplets et intentionnellement inexacts.

Car pour ceux qui, comme nous Français, sont restés en dehors de la barrière opposée, chez eux, par les Allemands, à la pénétration de la vérité, comme pour tous ceux qui ont été les victimes ou les témoins d'événements que l'on tenterait vainement de nier ou de faire oublier, ces faits sont incontestables et malheureusement établis par trop de marques encore sanglantes et douloureuses.

Il est donc de notre devoir, pour défendre notre cause et pour permettre aux neutres de se former une opinion précise, de porter à leur connaissance les documents qui nous paraissent contenir l'exacte vérité et qui contredisent les assertions contenues dans ceux que publie le *Bulletin international*.

Nous le ferons en choisissant, de préférence, pour les publier, les documents qui peuvent présenter un intérêt



particulier pour les pays neutres et leur faire connaître la vérité sur les intentions et les tendances des nations belligérantes, de façon à leur permettre d'envisager sûrement ce que pourront être, pour eux, les conséquences du triomphe final de l'une ou de l'autre des parties en présence.

Ce que nous savons, sur les principes d'organisation sociale que préconisent les Allemands, par opposition aux principes de la civilisation que nous désirons voir triompher, ne nous permet pas, à nous Français, de douter des conséquences néfastes qu'aurait, pour le monde entier, l'établissement de l'hégémonie germanique, fondée sur le militarisme, et nous ne devons rien négliger pour communiquer aux habitants des pays neutres les éléments sur lesquels se base notre conviction.

Il pourra arriver qu'à ces documents nos ennemis aient à opposer d'autres documents semblables engageant de même la responsabilité des armées alliées. Ils pourront les faire paraître en réponse aux nôtres; cette double publication aura l'avantage d'appeler l'attention des intéressés sur les mesures qu'il conviendra de prendre, lors du règlement final du conflit actuel, pour éviter, si possible, dans l'avenir, le retour de semblables calamités.

Les Esperantistes, qui doivent tous souhaiter la disparition définitive de la guerre et l'établissement de la paix universelle dans le monde, ne pourront se plaindre du résultat.

Quant au mode suivant lequel nous pouvions faire paraître les documents que nous nous proposons de publier, nous avons dû constater que les circonstances se prêteraient mal à la publication d'un journal périodique, comme le *Bulletin international* allemand, mais nous avons cru pouvoir obtenir un résultat semblable et même plus avantageux en adoptant, pour notre publication, un type de feuilles volantes, susceptibles d'être envoyées isolément comme les communiqués officiels allemands, mais qui contrairement à ceux-ci seraient consacrées chacune à une série de sujets connexes, de façon à réunir, sur les mêmes feuilles les sujets susceptibles d'intéresser les mêmes catégories de lecteurs et d'être distribuées utilement dans les mêmes milieux.

La plupart des documents dont nous aurons à disposer étant écrits en langue française, nous joindrons souvent aux feuilles donnant leur traduction en Esperanto des feuilles reproduisant ces textes originaux eux-mêmes. Nos lecteurs pourront ainsi mieux apprécier parfois la nature des documents traduits et en constater l'authenticité.

Si possible ces feuilles paraîtront régulièrement, à raison d'une par semaine. Elles seront publiées sans observer un ordre préconçu et se suivront avec un simple numérotage d'ordre, mais en s'appliquant successivement aux différentes catégories de sujets que l'actualité ou les circonstances nous amèneront à aborder.

Pour en faciliter le classement par nature et la distribution aux catégories de lecteurs qu'elles peuvent intéresser, nous les distinguerons en séries qui seront désignées par les lettres A, B, C, etc., d'après les indications données ci-après et, dans chaque série, nous distinguerons, par l'apposition de la lettre *a*, placée à la suite des lettres majuscules, les feuilles qui seront plus spécialement consacrées à l'analyse de volumes un peu importants auxquels une seule feuille pourra être entièrement consacrée. Les feuilles présenteront ainsi un caractère bibliographique qui pourra les faire rechercher par certaines catégories de lecteurs ou les faire utiliser par les éditeurs pour contribuer à faire connaître les Ouvrages qu'elles concernent spécialement.

On trouvera, dans la série A, les documents concernant les questions sociales d'ordre général, telles que celles qui sont relatives à la mentalité des nations belligérantes, celles qui traitent des manifestations du pangermanisme, ainsi que les articles de critique scientifique ou littéraire sur les incidents se rattachant à ces questions spéciales, et notamment ceux qui concernent l'appel des intellectuels allemands aux nations civilisées et les réponses qu'il a provoquées.

Dans la série B, on classera les questions relatives aux droits des gens et aux usages de la guerre.

On y trouvera les récits des faits concernant les violations des règles de la guerre et de la neutralité des pays non-belligérants, les attentats contre les villes ouvertes, contre les monuments et contre les populations civiles, les actes de barbarie militaire et ceux de banditisme à main armée.

La série C sera réservée aux questions d'un caractère historique général. On y classera donc les feuilles réunissant des documents de caractère politique et diplomatique, les documents parlementaires, les discours et les messages de souverains, etc.

Enfin, dans la série D, on classera les questions ressortissant de l'art militaire proprement dit. On y trouvera donc les comptes rendus, de caractère technique, des opérations militaires et les récits des faits de guerre, ainsi que les documents concernant le matériel de guerre, sa description, sa fabrication et son mode d'emploi.



SERIO A.

## KION PENSAS NEŬTRALULOJ PRI LA MILITO (I)

Respondo de S-ro Edouard CHAPUISAT, ano de la Granda Konsilantaro de Genève,  
al la « Alvoko al la civilizitaj nacioj », sendita de germanaj eminentuloj.

Sinjoro,

Vi opiniis, ke vi devas sendi al mi vian « Alvokon al la civilizitaj nacioj ». Mi legis ĝin, kaj, mi konfesas tre sincere, mi ne estus ĝin rigardinta kiel gravan, se ĝi ne estus subskribita de nomoj respektataj en la scienca mondo.

Efektive mi ne povas forgesi kun kioma intereso mi konstante ĉeestis la kursojn de profesoroj von LISZT, SCHMOLLER — kiu ne estis, tiutempe, tiel respektama al la imperia aŭtoritato, — von HARNACK kaj von WILAMOWITZ-MOELLENDORFF, kiu parolis ja al ni kun tiom da elokventeco pri la arta kulturo kaj la pligrandiĝo de l'arto senmorta.

Pro tio ke mi trovis tiujn nomojn malsupre de via alvoko, mi ricevis gravan elreviĝon. La dirita alvoko, koncerne min, estas tute maltrafa. Ĝi alvenas al civitano de ŝtato neŭtrala, sed plene informita.

Efektive mi speciale estas taŭge lokita por scii en kiuj kondiĉoj Germanujo antaŭvidis la nunan militon. Altaj eminentuloj, ne apartenantaj al mia lando, sed farantaj al mi la honoron montri sian konfidon, anoncis al mi, dekkvin tagojn antaŭ la milito, la helpon donitan de Germanujo al Aŭstrio en ĝiaj postuloj kontraŭ la serba registaro. Se vere estas, kiel vi opinias, ke la *popolo* germana ne volis la militon, ne diru, sinjoroj, ke via registaro ne volis ĝin. Se vi persistus tion aserti, vi devus konfesi la senpovecon de ĝia diplomatio kaj la bankroton de ĝia influo al ĝia nura kunligano, Aŭstrio.

« Ne vere estas, vi skribas, ke ni krime malrespektis la neŭtralecon de Belgujo. » Malrespekto, sinjoroj, estas ĉiam krimo. Laŭ la opinio de svisa civitano, tia krimo estas nepardoninda; ĝiaj farantoj devas antaŭvidi la malesperan kontraŭpenadon, kiun naskas ĉiam okazo de prava sindefendo.

« Ne vere estas, vi diras ankaŭ, ke nia militistaro brute detruis *Louvain*. » Pri tiu punkto mi turnas min al la raporto de la ekspertizisto elektita de via registaro, kiu implicate konfesas la neripareblajn perdojn kaŭzitajn al la arto kaj al la universala kulturo pro la detruo de admirinda monumento kaj grandvaloraj manuskriptoj; vi ne parolas

pri *Reims*, mition konsentas, kaj mi laŭdas la malaprobon, kiun pligravigas via silentio.

Ĉu ne vere estas ke vi faras la militon malrespektante la internacian juron? Demandu, en Svisujo, la familiojn HENNIN kaj BERNASCONI, pri la cirkonstancoj en kiuj iliaj ĉefoj estis pafmortigataj, kaj vi vidos, sinjoroj, ke vi estas trompita; kiam vi asertas ke neniu ago riproĉinda estis farata de via militistaro.

« La batalo, vi diras finante, estas direktata kontraŭ nia kulturo. » Mi nescias kiuj estas la ideoj de l'slava popolo, kiu ŝajnas al mi sufiĉe forta kaj ampleksa por ne tre deziri propagandi la slavismon en la regionojn, kie ĝi ne estas esenca. Koncerne Francujon, mi certigas al vi, vi falas en eraron sufiĉe amuzan. Neniaj Francujo faris tiom da penadoj, penadoj lojalaj, abnegaciaj, por kompreni viajn diversajn filozofiajn sintenadojn aŭ viaj historiajn konceptojn. Prenu, mi petas, la resumon de la tezoj de fakultatoj dum la dek lastaj jaroj, kaj diru al mi se, male, la franca klera junularo, per sia inteligenteco ofte brila kaj ĉiam sagaca, ne profunde esploris la animon de viaj pensuloj kun metodo kaj klaregeco kiun la germana junularo povas envii.

La fakto, ke vi povas, vi, sinjoro von HARNACK, apostolo de la moderna teologio; vi, sinjoro von LISZT, kriminalsciencisto spiritpreciza; vi, DORFFELD, la MASPERO kaj la NAVILLE de Germanujo; la fakto ke vi povas skribi: « Sen nia militarismo, nia civilizeco estus neniigita de longa tempe », jen kio konfuzas la humilan historiiston kaj juriston kiu mi estas.

Ne, sinjoroj; estas via militarismo, kiu riskus neniigi la civilizacion, se tiu ĉi ne enhavus en si mem la senmortan ĝermon de l'juro kaj de la libereco.

Mi scias, kiuj vi estas, sinjoroj; mi scias, ke la heredaĵo de GOETHE, de BEETHOVEN, de KANT, estas por vi afero sankta; sed GOETHE, BEETHOVEN kaj KANT malaperis kaj la mondo estas staranta. Ne permesu, ke ĝi ilin malami, igante ilin preni sur sin, tra unu jarcento, la respondecojn de la morto de tiom da homoj kies brakoj kaj cerboj estus estintaj utilaj al la grundo, al la hejmo kaj al la spirito.



Mi nepre deziris, sinjoroj, esprimi al vi miajn sentojn tute malkaŝe, pro tio ke viaj subskriboj alvokis mian sincerecon kaj eble miajn memorojn. Vi permesos ja ke mi konstatu ke miaj profesoroj el *Paris* kaj el *Lyon* ne bezon-

nis sendi al mi alvokon kaj ke ili tute konfidis al miaj juĝoj de civitano neŭtrala, kiuj neniam estos tiuj de homo indiferenta.

Bonvolu, k. t. p.

EDOUARD CHAPUISAT.

Respondo de Professoro J. Max BALDWIN, el *New-York*, eksterlanda korespondanto de la Franca Instituto, prezidinto de la lasta Internacia Kongreso de Psikologio, eks-studento en *Berlin*, *Leipzig* kaj *Friburg*, al la Alvoko de la *German University League*.

*New-York*, la 14-an de februaro 1915.

Kara Sinjoro,

Mi ricevis vian leteron, per kiu, pro miaj rilatoj kun iuj germanaj Universitatoj, vi petas, ke mi aniĝu je la *German University League* de Unuiĝintaj Ŝtatoj, kies celo estas « kunlabori por la disvastigo de l'vero kaj por la komprenigo de la germanaj celadoj » en la « batalo nuntempe okazanta kontraŭ Germanujo de kontraŭuloj superaj pro la nombro. »

Vi prave opinias ke, studinte Germanujon kaj en Germanujo, mi havas sufiĉan aŭtoritaton por paroli pri la germanaj celadoj, kaj same ke mi plene deziras propagandi la veron. Konsekvence, mi sendas al vi la jenan esprimon de mia opinio, tian kia ĝi rezultas de matura pripensado kaj malgraŭ la iamaj inklinoj favoraj al Germanujo, kiujn mi konservis de miaj restadoj kaj amikaj interrilatoj kun multaj germanaj studentoj dum la daŭro de longa universitata kariero.

1-*Pri kio koncernas la veron.* — Laŭ mia opinio, la vero estas, ke neniu lando havis pli plene nepran devon kunigi fortojn superajn je tiujn de alia nacio ol Britujo, Francujo kaj Rusujo kontraŭ Germanujo kaj Aŭstrio. La diplomataj traktadoj, kiuj antaŭiris la militon montras, en la germana flanko, hontindan malhonestecon, cinikecon, malnoblecon. La defio fine farita de Germanujo ne povis ne nesti akceptita de nacio fieraj kaj memrespekta. Por Francujo kaj Rusujo, batalo estis kune devo kaj neceso. Britujo estis nur antaŭ devo : devo al Belgujo kaj civilizeco. Tute honoriga por Britujo estas, ke ĝi plenumis la devon sen trudo de la neceso.

2-*Posta veraĵo.* Germanujo direktis la militon, kiel nacian rabadon kaj piratadon, ricevante profiton, en multaj cirkonstancoj, el la kavalirecoj, el la alta honorsento de siaj kontraŭbatalantoj. Ĝi lokis sin ekster ĉiun eblan simpation de persono, kies kulturo ne estas tiu de primitivaj sovaĝuloj. La alvoko al la amerikaj universitatoj estas mem insulto. Tiuj homoj estas sur la ĉefa vico de tiuj, kiuj konservas viva la flamon de l'morala entuziasmo, kiuj penas por subteni la tutecon de la homa kaj kristana idealo, kiuj antaŭ la opinio de l'publiko, estas respondaj pri la edukado de la junularo. Jen ilia respondo : « Honton al vi kaj al via domo ! « Tiu fakto, ke Germanaj profesoroj pri moralo kaj pri vera scienco provas « pravigi » la milit-

metodojn de Germanujo kaj la germanajn projektojn, kiujn malkovras tiuj metodoj, estas afero tiel ofenda, ke la amerikaj universitatoj neniam povos ĝin aprobi. Laŭ ilia opinio, tio signas la moralan ruinegon de Germanujo.

3-*Kaj ankaŭ alia veraĵo.* La celadoj kaj agmanieroj de iu grupo de Germanoj en Unuiĝintaj Ŝtatoj, pri kiuj vi ne havas kaŭzon por esti fieraj ekfariĝos minacaj por ĉiuj bonaj Amerikanoj. Studo en Germanujo ne igis nin esti malpli patriotaj kiel Amerikanoj nek malpli fidelaj al la anglosaksa idealo : ni ne estas *Made in Germany*. Ni komencas peti, ke la marko *Made in Germany* de studento, gazetisto, aŭ politikisto, estu forĵetata, kaj ke tiuj, kiuj ĝin espluatas, uzante nian landon, kiel bazon por sia kontraŭneŭtrala kaj kontraŭnacia propagando, ricevu siajn pasportojn (verajn kaj ne artifikajn). Pro tio, ke oni lasis la ambasadoron de Germanujo, — kies vigla aktiveco estus motive praviginta peton pri revoko —, uzi ĉiuspecajn rimedojn : ĵurnalojn, cirkulerojn, publikajn preparoladojn, ne strange estas, ke la agitado kondukis al la stato karakterizita de bomboj, krimaj brulegoj, kaj politika komploto. Tiuj Germanoj perfidas sian adoptan patrujon. Nia popolo montris al ili tiom da toleremo, kiom da malŝato. Sed ĉiuj bonaj civitanoj el germana sango devus rapide kunigi kun la ceteraj Amerikanoj, tiuj, kies parolportanto mi estas kaj kiuj skribus kiel mi faras, por protesti kontraŭ tiu trouzo de nia grandanimeco. La Germanoj, kiuj vivas tie ĉi devas sin gardi ke, estonte, la termino « germana amerikano » ne estu sinonimo de intrigo kaj mallojaleco. Certe estas, ke granda nombro de Amerikanoj malfidas la Germanojn, — eĉ tiuj ŝtatanigitaj en Unuiĝintaj Ŝtatoj — kies patriotismo ne sufiĉe montris siajn pruvojn. La unua tasko sin trudanta al via organizaĵo estas montri, kiamaniere la Germanoj perfidas la leĝojn de Unuiĝintaj Ŝtatoj. Tiel vi evitigus al la Germanaj Amerikanoj la malgloron, kiu verŝajne estos grava elemento de ilia ĝeno en la estonteco.

4-*Pri kio koncernas la germanajn celadojn*, kies elmontradon, vi deziras, ili estas sufiĉe klaraj. La vorto *pangermanismo* ilin difinas kaj la milito sufiĉe reliefigis la pangermanismon. La celadoj malkaŝe montriĝas per la rimedoj alprenitaj kaj la rimedoj estas sufiĉe malnoblaj : malrespekto de la publika kaj privata juro, detruo de la plej noblaj atestaĵoj de la homa aspirado, rompo de la oficialaj kontraktoj, nekredebla krueleco, senzorga



provoko montrita per flosantaj minoj; kaj la submarsipoj indiferentaj pri detruo de nekulpuloj kaj malfortuloj. Mi persone konas ekzemplojn de tiu diabla kruelegeco, kiu estas sistemo, oficiala agmaniero. La « Himno de Malamo » estas kantata ĉe la tablo de la imperiestro ! La rezulto serĉata per tiaj rimedoj, diras la apologiistoj de Germanujo, estas la universala disvastigo de la kulturo; tiu kulturo karakteriziĝas per la armiloj kiujn ĝi uzas. Venko de Germanujo detruus por multaj generacioj, ĉiun esperon al paca aranĝo de la mondaj politikaj problemoj, problemoj en kies

solvo ankoraŭ persistas restaĵo de barbareco, pro la moderna militarismo germana.

Tiaj estas, rapide esprimitaj, kara Sinjoro, miaj opinioj koncerne la veron pri Germanujo kaj ĝiaj intencoj. Mi kredas, se vi deziras, ke la kunlaboro de la amerikaj profesoroj studintaj en Germanujo estu sincera, ke vi donos al ili la publikecon konsentitan al tiuj, kies opinio malsimilas de la mia, kaj priaprosimiĝas al la via.

Via tre sincere

J. MARK. BALDWIN.

El publika letero de David STARR JORDAN, prezidanto de la *Leland-Stanford University* (Kalifornio).

Multe da malbono kaj malmulte da bono troviĝas en tiu ĉi milito. Sed ekzistas gradoj en la malbono, kaj povas okazi, ke malbono, per komparo, fariĝas preskaŭ bono. Jen la tuta instruo de tiu ĉi milito. Oni povis multon skribi, ĉe la komenco, pri la ĝenerala verko de la diplomatio, sed la invado de Belgujo ŝanĝis la aspekton de la demando. Kiel en la subita lumo de fulmo aperis la vero, la sankta juro: sur unu flanko la regado de la terurego; sur la alia, la regado de la leĝo. Germanujo sin lokis sub la regado de militarismo: ĝi malkovriĝis, antaŭ unu jaro, dum la afero de *Saverne*... Ĝi traktis kiel paperpecojn la plej solenajn kontraktojn inter la homoj kaj inter la popoloj. La malrespekto de la belga neŭtraleco faris paperpecon el la pergameno de la internacia juro; la lokigo de flosantaj minoj sur la granda vojo de la komerco faris paperpecon el la rajtoj de la neŭtralaj Ŝtatoj; la turmentego de la belga popolo faris paperpecon el la rajtoj de la nemilitantoj.

Milito povas estis laŭhonora. En laŭhonora milito, la armeoj batalas kontraŭ armeoj; ili ne atakas la simplajn regnantojn. Se iu armeoj ne igas sin kulpaj de iu provoko, ili devas nenion timi el kontraŭa armeo. La rabado de *Malines*, d'*Aerschot*, de *Dinant* ne estas agoj de laŭhonora milito. La detruo de *Louvain*, la centro respektata, dum kvin cent jaroj, de la katolika scienco, liverita al ebria soldatarado, estis malhonoriga militago. Ĝi estas makulo,

kiun la jaroj ne povos forviŝi el la historio de Germanujo. « Unu necesa ekzemplo ! » diras la apologiistoj de la krimo. La duko de *Albe* donis, iam, la saman necesan ekzemplon al la sama popolo. Dum jarcentoj, tiuj vortoj « la hispana sango » teruregis la koron de homoj, ĝis en Nederlando. Dum estontaj jarcentoj, la vorto « Prusano » ĝin anstataŭos.

Certe, la honestaj personoj de Germanujo ne brulas la Universitatojn, sed ili estas senpovaj en la manoj de iu monstro, kiun ili kreis. La afero de *Saverne* montris, antaŭ unu jaro, ilian plenan submetiĝon. Ili konservis ĉiujn virtojn, kun escepto de la amo al libereco. La mano el fero ĝin forprenis de ili.

Hodiaŭa Germanujo estas anakronismo. Ĝia scienca idealo apartenas al la dudeka jarcento; ĝia politika idealo apartenas al la dekseka. Ĝiaj registoj faris el ĝi la plej belan maŝinon por batali en mondo lacigita de bataloj. Por kirasitaj venkistoj, la moderna mondo ne plu havas lokon; ĝi ne plu ilin adoras, ĝi ne plu obeos al ili; ĝi ne plu respektos tiujn, kiuj ilin adoras aŭ sekvos: ĝi ne trovas plu homojn, kiujn estas tiel bonaj por regadi la ceterajn homojn kontraŭ ilia volo.

Granda nacio, kiun ĝia propra popolo ne kontrolas, estas nacio sen registaro. Ĝi estas flosrestaĵo sur la internacia maro. Ĝi estas danĝero por siaj najbaroj, pli granda danĝero ankoraŭ por si mem.

David STARR JORDAN.

La « Triple Entente » kontraŭ la duopa Alianco antaŭ la Supera Tribunalo de la Civilizacio.  
Verdikto redaktita de S-ro James H. BECK, eks-ĝenerala adjunkta « Attorney » de la Unuigintaj Ŝtatoj.

1-Germanujo kaj Aŭstrio, je momento kiam paco estis profunda, interkonsentis sekrete por trudi siajn volojn al Eŭropo kaj al Serbujo pri demando, kiu rilatis la eŭropan ekvilibron; ne estas tute pruvite, ke tion farante, ili intencis naski eŭropan militon por certigi sian superregon en Eŭropo; tamen ilia konduto povas tion supozigi.

Ili igis la militon neevitebla.

a. Sendante ultimatumon absolute ekstersaĝan kaj ankaŭ eksterproprocion kun la plendmotivoj, kiaj ajn ili estas, kiujn Aŭstrio povus havi.

b. konsentante al Serbujo kaj al Eŭropo tempon ne sufiĉan por informiĝi pri la rajtoj kaj devoj de la interesataj nacioj.

2-Germanujo povis, je iu ajn momento, devigi Aŭstrion



esti saĝa kaj konsentema, sed ĝi neniumomente influis tiamaniere. Male, ĝi certe kuraĝigis Aŭstrion kaj eble ĝi estas la iniciatinto de la aŭstria agado.

3-Britujo, Francujo, Italujo kaj Rusujo dum la tuta okazado de la faktoj, sincere laboris por konservi la pacon kaj, kun tiu celo, ne nur ne koleriĝis pro la komencaj postuloj de Aŭstrio sed plie faris ĉiujn eblajn cedejn.

4-Ĉar Aŭstrio mobilizis, Rusujo estis tute rajtigita ankaŭ mobilizi. Ĉiu Regno havas la rajton fari militpreparojn. Ĝis kiam unu armeo trapasis la landlimon, neniu ataka

agado estas farita kaj neniu nacio povas plendi, ĉiuj havantaj la rajton agi same.

5-Germanujo rapidigis la okazantaĵojn, deklarante militon al Rusujo ĉar ĝi ne malmobilizis, dum la aliaj Regnoj proponis fari ĉiujn saĝajn cedejn kaj dum interparoloj kapablaj konservi la pacon ankoraŭ daŭris.

James M. Beck.

(El *L'arbitrage des neutres*, unu broŝuro, ĉe DORRON aîné, en Paris.)

1 artikolo de S-ro Arnold REYMOND, profesoro de Filozofio en la Universitato de Neufchâtel.

Ni ne povas esti indiferentaj pri la sorto de heroo Belgujo. Oni kulpigis, antaŭ ne longe, Belĵon, ke ĝi mem malrespektis sian propran neŭtralecon por subteni la malamikojn de Germanujo. Tiu kulpigo, esprimita de la germana gazetaro kaj aperanta unu monaton post la preno de Liège, estas iom malfrua; ĝi ne akordiĝas kun la politikaj kaj militaj faktoj, kiuj okazis de la komenco de julio. Ni ne ĝin diskutos. Laŭ nia opinio, la Belĵoj kondutis kun neriproĉebla lojaleco. Ilia sola kulpo, kiu, por ni Svisoj, estas la plej alta virto, estas ke ili heroo defendis sian neŭtralecon. Preferante morton ol senhonorigon, ili suferis ĉiujn teruraĵojn de malamika invado. Sed ni lasu flanken tiun faktan demandon. La Historio, kies juĝo estas senpartia kaj severa, montros la verajn mortigintojn de Belgujo.

Sed ĉiukaze restas la principa demando pri kiu ĉiu

Sviso konsentas se ĝi ne forlasas sian civitan kaj nacian idealon. La tagon, kiam la senkulpeco de Belgujo estos definitive pruvita, la Svisoj unuanime mallaŭdegos le Regnon aŭ la Regnojn, kiuj kuraĝis senvalorigi sian subskribon kaj nomi paperpeco la traktaĵon per kiu la senpendeco de Belgujo estis solene deklarita. Neniu najbara nacio, kiom potenca estos ĝia armiteco, fermos al ili la buŝon. Ĉiu el ili alproprigos al si la parolojn de S-ro Georges WAGNIÈRE pri la nuna sorto de Belgujo: « Belgujo proklamas nun superan principon, kiu estas ĉe la fundamento de ĉiu homa societo kaj de ĉiu justeco: nome, ke neniu havas la rajton rezigni sian rajton. Ĝi defendas, je kosto de grandegaj suferoj, la ideojn de fideleco, de sendependeco, de nacia digneco, kiuj devas esti la sankta hereda posedaĵo de nia Svisujo. »

Prof. Arnold REYMOND

El parolado de S-ro Carl SPITTELER, fama germanlingva poeto de Svisujo, farita en Zürich, la 14-an de decembro 1914.

En si mem, Belgujo ne koncernas nin; ĝia sorto, male, interesas nin tute speciale. Ĝiaj invadintoj komence konsideris mem siajn malpravajn kontraŭ tiu lando. Poste, por sin senkulpigi, *Kain* opiniis bone kulpigi *Abel*. Serĉadi en la poŝoj de la turmentata viktimo, por trovi dokumentojn, ŝajnas al mi kripligo de la morala sento. Mortigi la viktimon estas pli ol sufiĉa. Ĝin kalumnii poste, tio estas troa. Sed, se iu Sviso havis la ideon aprobi la insultojn kontraŭ malfeliĉa Belgujo, ĝi faris sentimaĵon kaj idiotiaĵon. Ĉar, estu certaj, la tagon kiam oni intencos nuligi nian ekzistadon, vi vidos ekaperi, ankaŭ kontraŭ vi, tiujn pretendatajn pruvojn de kulpeco. La veneno, ankaŭ, estas parto el la militaj municioj.

Pri nia indigno pro la helpo donata de kolorhaŭtaj

popoloj, mi konsentas, ke, en sporta afero, oni distingas inter la aferoj korektaj kaj la nekorektaj. Sed milito ne estas sporto, malgraŭ la opinio de kelkaj altgraduloj. Milito estas senkompata batalo por la vivo de nacio. Kiam oni batalas pri vivo kaj morto, ĉia helpo estas bonvenanta, sen konsidero de persono kaj de haŭtkoloro. Se iu mortigisto minacas vin per sia tranĉilo, instinkte vi vokas vian gardohundon por helpo. Kaj se ia mortigisto protestus, kriante: « Ĉu vi ne hontas uzi kvarpiedajn seninteligentajn bestojn kontraŭ unu el viaj similuloj », vi ne ŝanceliĝus respondi: « Mi bedaŭras, sed via tranĉilo malhelpas, ke mi hontu ».

Carl SPITTELER.



SEKCIO B : MALRESPEKTOJ AL LA LEĜOJ DE LA POPOLRAJTO.

I

## PRI LA BELGA NEŬTRALECO (I)

*La malrespekto de la belga neŭtraleco, kontraŭa al solenaj promesoj subskribitaj de la praavoj de WILHELMO II-a, kaŭzis, ĉie, indignan emocion. La neŭtralaj landoj kiuj, ĝis nun, ne akceptis la germanan kulturon sentis sin minacataj, en sia propra senriskeco, de la eventualeco de venko de Germanujo, kiu estus malvenko de la Civilizacio. Krio de mala-probo ĉie aŭdiĝis, kaj la kruela konduto de Germanujo kontraŭ la « malgranda popolo kun granda animo » (H. BERGSON), la senkaŭza disrabado kaj ruiniĝo de nedefendataj urboj, la ruiniĝo de admirindaj monumentoj de ĝia historio kaj religio, la cinike ordonitaj turmentegoj de tiom da neatakintaj loĝantoj, kies sola krimo estis kredi je netuŝebleco de la traktatoj,*

*alportis al la partio de la Kunmilitantaj Regno, la plej valorajn kaj plej neprofitemajn simpatiojn. Tiu partio aperas al ĉiuj, de nun, la partio de la Rajto kontraŭ la Barbareco, de la Libereco kaj Sendependeco de la popoloj kontraŭ la frenezarevo de universala superreĝo.*

*Certa pri sia forto, konfidanta je la sukceso de la subita atako, kiun ĝi estis projektinta kontraŭ Francujo, la germana Registaro ne antaŭvidis tian sintenadon de la tutmonda opiniantaro.*

*Vane ĝi provis, kaj ankoraŭ nun provas senkulpigi sin de la krimo farita kontraŭ Belgujo, sed ĝiaj postaj klarigoj estas facile rifuteblaj kiel oni vidos per la ĉi-subaj dokumentoj.*

### Respondo de la Belga Registaro al Germanaj akuzoj.

La 2<sup>a</sup> de decembro, la kanceliro de la Germana Imperio deklaris ĉe la *Reichstag* : « Jam la 4. de Aŭgusto, ni havis duonpruvojn pri la kulpo farita de l'Belga registaro. Mi ne ankoraŭ havis je mia dispono formalajn skribajn pruvojn. Sed pruvoj estis konitaj de la Brita registaro. Kaj nun, kiam per la dokumentoj trovitaj en *Bruxelles*, estas klarmontrite, kiel kaj ĝis kioma grado Belgujo estis forlasinta sian neŭtralecon favore por Anglujo, la tuta mondo ekkomprenas, ke niaj soldataroj, kiam ili penetris, dum la nokto de la 3<sup>a</sup> ĝis la 4<sup>a</sup> de aŭgusto, la Belgan teritorion, troviĝis sur la grundo de regno, kiu de longe forlasis sian neŭtralecon. »

Belgujo, fiera juste pri siaj tradicioj de korekteco kaj honoro, ne konsentas lasi publikigi, ne senhonorigante ilin, kiel estas meritite, la akuzojn, kiujn direktas, kontraŭ ĝia honoro, kancelirejo, de kiu vere mensogo ŝajnas starigita kvazaŭ institucio. Iuj ajn estu la nunaj suferadoj, honesteco konservas por la Belga popolo senfinan sensaĝan valoron.

Neniam Belgujo permesis iun atencon kontraŭ sia patrheredaĵo de nacia honesteco. Sola, la volo ĝin konservi netuŝita inspiris la decidon alprenitan dum la nokto de la 2<sup>a</sup> de Aŭgusto 1914 kaj la senpartia Historio tion rediros al la generacioj atentaj al morala fiereco.

Agitadon oni faras por malatentigi la popolojn pri la

historia vereco; oni uzas ĉiujn rimedojn. Unu fojon plie, la Belga registaro havas la devon paroli, kaj, tion farante, ĝi sin turnas al ĉiu lando, kie regas kulto al Juro kaj religio de Honesteco.

Komence de l'milito, la atenco plenumita kontraŭ Belgujo estis tiom evidenta, kaj la intereso de Germanujo ĝin proklami, por tiel dire delogi la viktimon, vidiĝis tiom klara, ke la perforto kontraŭ juro estis konstatata de la kanceliro sur la tribuno mem de la *Reichstag*. Kaj oni eĉ kuraĝis, tiam, peni por hipnotigi la nacion per sorĉlogo de monaĵo, kiu kompensus la perditan honoron. Kvazaŭ honoro reakiriĝus monkomste ! Sed « Neceso ne konas leĝon » ! (*Not kennt kein Gebot* ! ) Ĉio estis permesata, oni diris. Ĉu la celo ne estis subite atingi nacion kiun oni volis premege ? Unu fojon plie, la militkazoj pruvis, ke komenca krimo fatale kuntiras la sekvon de konsekvencaj krimoj.

Apenaŭ tiu grundo, kies neatenceblon antaŭe garantiis Germanujo, de Germanujo estis invadita, jam parto de la invadarmeo sin malhonorigis per sistema organizo, — kun nekredebla subtileco en kruelo — de ŝtelo, rabado, bruligado, seksperforto, buĉado de sendanĝera popolo.

Kaj dum uraganis sur Belgujo barbereco neniam vidita, neniu belga ago ekzistis, kiu povus justigi la invadon : la atencinto mem tion konfesadis.



Per tiu fakta stato, metiĝis en malbonegan sintenadon la imperio, kiu, por venki Francujon, turmentis nacion senkulpan pri ĉiu krimo. Iel ajn, oni devis eliri el tia morala situacio. Unuflanke, la martirado de senkulpa Belgujo ribeligis la internacian konsciencon; aliflanke, la popoloj nemilitantaj plej angore sin demandis pri sia senriskeco estonta. Unu monaton post la militdeklaro, la Germana kancelirejo ektrovis en *Bruxelles* la rakonton de konversacioj interhavitaĵ en 1906 kaj 1912 de la Anglaj militsenditoj kaj la Belgaj stabestroj. Por transformi tiun rakonton en senkulpigan dokumenton, sufiĉis falsige mallongigi, kaj mensogi. Tia estis la sola rimedo, por doni aspekton de saĝeco al la ago farita kontraŭ Belgujo.

Kaj tiel, vundegante nacion neŭtralan ĝis skrupulo, Germanujo estus alpreninta, — nekonscie, ĝi konsentu, — la rolon de justigisto.

Nedisputeble, tiu temo prezentis novan profiton. Ĝia sukceso permesis sufoki sub morala honto la Belgojn, kiuj, per lojala kaj fortika kontraŭstaro, dronigis la komencan planon de la granda germana stabo; la popolo, armita nur pro sia honoro, devis suferi tiun lastan turmenton; ne sufiĉis ĝin foroteri, necesis ĝin senhonorigi. Kaj tiel, per iu maltimo al kiu egala vidiĝis malofte en la historio, la germana kancelirejo asertas la ekziston de konsento, per kiu Belgujo, perfidante siajn plej sanktajn kontraktojn, estus atencinta sian neŭtralecon profite al Anglujo. Por impresi la nesciantojn, la germana sincereco forigis el la protokolo de la konversacioj la pecon dirantan, ke la interkomuniko de ideoj celis nur la hipotezon, se la Belga neŭtraleco estos atencita.

La Belga registaro kontraŭstarigas al la asertoj de la germana kancelirejo la solan respondon, kiun ĝi meritas: ili estas mensoga verko, nenomebla, tiom pli, ke ili devenas el personoj, kiuj pretendite vidis la paperarojn.

Kiuj estas la dokumentoj elmetitaj de Germanujo por pruvi la perfidaĉon de Belgujo? Ili estas du:

1<sup>o</sup>. La protokolo de interparoloj, kiuj okazis inter Ĝenerala Leŭtenanto DUCARNE kaj kolonelo BARNARDISTON en 1906. Dum tiuj interparoloj, la brita oficiro prezentas siajn opiniojn pri la maniero, laŭ kiu Anglujo povus alhelpi Belgujon, se ĉi-tiun ekatakus Germanujo. Unu frazo en tiu raporto montras la hipotezon, kiun konsideras kolonelo BARNARDISTON. La eniro de la anglaj soldataroj en Belgujon fariĝus nur post germana atenco kontraŭ la Belga neŭtraleco. En la traduko, la *Gazeto de Norda Germanujo* de la 25<sup>a</sup>. de nov. formetas tiun frazon, kiu precize ja donas al la dokumento sian ĝustan signifon. Plie, la fotografaĵo de la raporto DUCARNE enhavas le sekvantan frazon: « Mia interparolanto insistas pri la fakto: 1<sup>o</sup> ke nia konversacio estis nepre konfidencia... » La vorton « konversacio », la *Gazeto de Norda Germanujo* igas « konsento ». Ĝi dirigas de kolonelo BARNARDISTON, ke nia konsento estus nepre konfidencia.

Tia procedo ne bezonas komendarion.

2<sup>o</sup>. La protokolo de konversacio pri la sama temo, okazinta en Aprilo 1912 inter Ĝenerala Leŭtenanto JUNGBLUTH kaj vickolonelo BRIDGES. Dum tiu konversacio, Ĝenerala Leŭtenanto JUNGBLUTH rimarkigis al sia interparolanto, ke angla interveno favore al Belgujo povus fariĝi nur laŭ nia permeso. La militsendito kontraŭdiris, ke Anglujo eble estus devigata uzi siajn rajtojn kaj devojn de garantianta Regno de Belgujo, ne atendente, ke tiu lasta alvokos ĝiaŭ kunhelpon. Tiu opinio estis privata de kolonelo BRIDGES. La brita registaro ĉiam konsentis kun la reĝa registaro, ke la permeso de ĉi tiu estas necesa.

La Belga registaro per sia honoro deklaras, ne nur, ke estis neniam kontraktita konsento iu, sed ankaŭ, ke neniam fariĝis, de iu ajn registaro, ĉu priparoloj, ĉu proponoj pri tia konsento.

Cetere, neniam la reprezentanto de Granda Britujo, kiu sola estis rajtigita por tiel kontrakti, intervenis en tiuj konversaciojn. Aliparte, (ĉiuj belgaj ministroj, senescepte, povas ĉi-tion atesti ĵurante) neniam konkludo ia el tiuj konversacioj estis proponita ĉu en konsilantaro de l'ministroj, ĉu al unu ministro private.

La papararoj ektrovitaj de l'Germanoj atestas tion ĉion; la atesto estas lumplena, sed kondiĉe, ke oni ne falstranĉas nek forigas iun dokumenton.

Pro senĉese ripetitaj kalumnioj, la registaro, fidela reprezentanto de la belga honesteco, opinias, ke la Devo ordonas, restampi la atencinton de Belgujo per la marko de malhono, kiu ĝis nun estas ĝia sola laŭleĝa konkeritaĵo. La reĝa registaro ekkaptas tiun okazon por aserti, responde al iuj pretendoj, kies malica intenco klare vidiĝas.

1<sup>o</sup>. Ke antaŭ la militdeklaro, neniu franca soldataro, eĉ malgrandega, penetris Belgujon; ne ekzistas honesta atesto, kiu povus stariĝi kontraŭ tiu aserto.

2<sup>o</sup>. Ke ne nur, ĝi neniam rifuzis proponon de soldataroj faritan de unu el la garantiantaj Regnoj, se ke, tuj post la militdeklaro, ĝi postulis energie la militan protekton de siaj garantiantoj.

3<sup>o</sup>. Ke, elprenante, laŭ sia devo, la defendon viglan de siaj fortikurboj, Belgujo postulis, kaj dankeme akceptis la kunhelpojn, kiujn ĝiaj garantiantoj povis meti je ĝia dispono, por tiu defendo. Belgujo, viktimo de sia honesteco, klinas la kapon antaŭ neniu. Ĝia honoro defias la atakojn de l'mensogo; ĝi havas fidon en la juĝo de la universo. Dum la horo, kiam okazas la juĝado, triumfo apartenas al tiuj, kiuj oferis ĉion por konsciencie servi la partion de l'vero, de l'fraĵto, de l'hono.

(Komuniko de la Belga Legatejo en *Paris*.)

(Tradukis F. D.)



## Respondo de la Franca Registaro al malveraj asertoj de generalo BERNHARDI.

En artikolo publikigita en amerika ĵurnalo, germana generalo BERNHARDI, repalorante pri la kaŭzoj de la milito, pretendas pruvi, ke la franca armea kuncentrigo, kaj la ĉeesto de niaj ĉefaj fortoj, ĉe nia maldekstra armellanko, montras la antaŭan decidon de la franca registaro, malrespekti, konsente kun Granda Britujo, la belgan neŭtralecon.

Al tiu aserto de generalo BERNHARDI, la plano de franca kuncentrigo respondas laŭ nediskutebla maniero.

### *Nia plano de kuncentrigo.*

Laŭ la plano de kuncentrigo, la tuto de la francaj fortoj estis direktita, kiam la milito estis deklarita, kontraŭ la nord-oriento, inter *Belfort* kaj la belga landlimo, nome :

Unua armeo : inter *Belfort* kaj la ĝenerala linio *Mirecourt-Lunéville*.

Dua armeo : inter tiu linio kaj la rivero *Moselle*.

Tria armeo : inter la rivero *Moselle* kaj la linio *Verdun-Audun-le-Roman*.

Kvina armeo : inter tiu linio kaj la belga landlimo.

La kvara armeo estis rezervata, okcidente de *Commercy*.

Konsekvence, la tuto de la francaj armeoj estis direktita kontraŭ Germanujo kaj nur kontraŭ Germanujo.

### *La ŝanĝoj en nia kuncentrigo.*

Tio estas tiom vera, ke, kiam estis konate, ke la germanaj trupoj malrespektis la belgan neŭtralecon, la franca stabo devis ordoni ŝanĝojn en nia plano de kuncentrigo.

La eventualeco de tiuj ŝanĝoj estis kompreneble studitaj; ĉar multaj signoj estis timigintaj nin ke Germanujo malrespektus la belgan neŭtralecon.

Kiam tiu malrespektado estis farita kaj kiam la belga Registaro (4-a de Aŭgusto, *Flava libro*) petis de ni helpon, la agado de nia dua armeo estis ampleksigita ĝis la regiono de *Verdun* : la kvara armeo estis intermetita inter la tria kaj la kvina, borde de la rivero *Meuse* : la kvina forŝoviĝis al la nord-okcidento, laŭlonge de la belga landlimo, ĝis la alteco de *Fourmies*.

Plie, du korpusoj de la dua armeo, la 18-a kaj la 9-a, estis transportitaj de la regiono de *Nancy* al *Mézières* kaj *Hirson*.

En tiu direkto, oni ankaŭ sendis la du diviziojn de Alĝerio kaj la divizion de Maroko.

Fine, unu korpuso de kavalerio ricevis la ordonon eniri Belgion por esplori la germanajn taĉmentojn kaj malrapidigi iliajn movojn (6-a de Aŭgusto) tri tagojn post kiam tiuj taĉmentoj estis malrespektintaj la belgan landlimon.

Dank' al tiuj ŝanĝoj, la franca stabo povis kontraŭtari, ĉe oriento de la rivero *Meuse*, la germanan puŝon, kondukante tien niajn ĉefajn fortojn.

Se la franca stabo estis antaŭintencinta ion, tiu subita alilokigo de niaj trupoj ne estus necesa, kaj ni estus povintaj alveni ĝustatempe por malhelpi ke la malamiko, en Belgujo, trapasu la riveron *Meuse*.

Unu detalo povas klarigi tiun nediskuteblan argumenton : nia korpuso de dekstra protekto, la dua, t. e. tiu de *Amiens* estis, konforme je nia plano de kuncentrigo, ne kontraŭ la belga landlimo, sed en la regiono de *Montmédy-Longuyon*.

### *La kuncentrigo de la brita armeo.*

La helpo de la brita armeo estis certigita al ni nur je la 5-a de aŭgusto, t. e. post la malrespekto de la belga landlimo, kiun la Germanoj faris la 3-an de Aŭgusto (*Flava Libro*).

La kuncentrigo de la brita armeo okazis, malantaŭ la urbo *Maubeuge*, de la 14-a ĝis la 24-a de Aŭgusto.

### *Diversaj ordonoj, kiuj konfirmas la intencojn de la franca Registaro.*

La 30-an de julio, la franca registaro, malgraŭ la militaj preparoj de Germanujo, ordonas al la protektaj trupoj restadi je 10 kilometroj de la landlimo.

La 2-an de Aŭgusto, oni ordonas al niaj trupoj lasi al la Germanoj la plenan respondecon pri la militaj agoj, kaj nur repuŝi ĉiun atakantan trupon, kiu enirus en la francan teritorion.

La 3-an, nova telegramo ordonas absolute eviti ĉiun flankokazon sur la franca belga landlimo. La francaj trupoj devos resti malproksime de la landlimo je du aŭ tri kilometroj.

La saman tagon, 3-an de Aŭgusto, nova ordono konfirmas kaj precizigas la instrukciojn de la 2-a de Aŭgusto.

La 4-a de Aŭgusto, ordono de la ministro de milito diras :

« Germanujo provos, per malveraj sciigoj, devigi nin malrespekti la belgan neŭtralecon. Estas absolute kaj formale malpermesite ĝis kiam kontraŭa ordono estos donita, eniri eĉ per patroloj aŭ per simplaj kavalerianoj, sur la belgan teritorion, kaj al la aviadistoj, superflugi tiun teritorion. »

Nur la 5-an de Aŭgusto, laŭ la peto de la belga registaro (farita la 4-an) la francaj avioj kaj balonoj ricevis permeson superflugi la belgan teritorion kaj niaj militesplorantoj povis eniri ĝin.

(Oficiala komuniko de la franca Registaro.)



Deklaro de la Reĝo de Belgujo, farita al la *New-York World*, represita en la *Journal des Débats*. 29 Marto 1915.

Neniu lojala homo estus aginta alie ol mi agis. Belgujo neniumomente kaj neniugrade ne konformiĝis je la plej preciza neŭtraleco. Ĝi ĉiam estis fidela amiko de ĉiuj regnoj, kiuj garantiis tiun neŭtralecon. Germanujo mal-kaŝe konfesis, en la komenco, ke malrespektante tiun neŭtralecon, ĝi malbone agis. Sed nun, por la celoj de sia propagando en la neŭtralaj landoj, ĝi provas ĵeti mallaŭdon sur Belgujo, kaj ĝin kondamni je mal-estimo, tial ke ĝi estus perfide forlasinta sian neŭtralecon.

Pri la pretendata angla-belga interkonsento, pri kiu oni

tiel multe parolis, mi povas diri la jenon : Neniu en Belgujo iam donis la nomon interkonsento al la letero kiun sendis generalo DUCARNE la militministro, raportante interparolojn tute ne oficialajn kun la angla milita sendito ; sed mi estis tiel deziranta eviti eĉ la ŝajnon de io ajn, kiu povus esti rigardata kiel kontraŭa al neŭtraleco, ke mi komunikis al la germana milita sendito en *Bruxelles* tiujn aferojn pri kiuj oni nun provas fari tiom da bruo. Kiam la Germanoj traspasigis siajn arkivojn, ili konis perfekte kion ili estis trovontaj. Iliaj hodiaŭaj surprizo kaj indigno estas ŝajnigitaj.

La Germanoj konfesis mem, ke ilia atenco kontraŭ la Belga neŭtraleco estis de longe antaŭdecidita.

Same kiel la Francoj publikigas sian *Bulletin des Armées de la République*, ankaŭ la germanoj havas militistan gazeton, titolitan *Parole* (oficiala gazeto de la germana militista Ligo. Eldono por la militanta armeo).

Jen estas interesa konfeso, eltirita el ekzemplero de tiu gazeto, trovita en germana ŝirmfosaĵo apud *Saint-Dié* (6-a militnumero, 2 septembro 1914, paĝo 42) :

#### Germana originala teksto.

Der plan zum Einbruch in Frankreich war von vornherein festgelegt; er sollte unter Umgehung der starken Sperrfortlinie, mit der der Feind seine Grenzen gegen Deutschland geschützt hatte, und die zu durchbrechen unendlich viel Blut gekostet hätte, durch Belgien im Norden erfolgen. Der Plan ist in vollem Umfange geglückt, wie uns die Stellung der einzelnen Armeen erkennen lässt.

Tiu paragrafo troviĝas en artikolo titolita « La Situacio en okcidento » kaj subskribita : *Spohn, generalmajor* z. D. La kvazaŭ oficiala karaktero de la gazeto, kiel ankaŭ la nomo de la subskribinto donas apartan gravecon al tiu konfeso, farita en tempo, kiam ĉionpraviganta venko ŝajnis al la Germanoj nepre certa kaj baldaŭa.

(Komuniko de D-ro P. C.).

#### Traduko.

La plano por la invado en Francujon estis de antaŭe firme pretigita ; ĝi devis efektiviĝi en la nordo tra Belgujo, evitante la fortan linion de baraj-fortikaĵoj, per kiu la malamiko estis ŝirminta siajn landlimojn kontraŭ Germanujo kaj kies trarompo estus kostinta multege da sango. La plano sukcesis en sia plena amplekso kiel montras al ni la situacio de ĉiuj apartaj armeoj.

kiam oni batalas por supera bono, oni faras kion oni povas. »

#### Konkludo.

Post tiuj cinkaj konfesoj, kiun valoron oni povas doni al ĉiuj postaj klarigoj pri malkovroj de sekretaj konsentoj aŭ pri supozoj de militaj antaŭintencoj ĉe la kontraŭuloj?

La neŭtraluloj scias nun, kiom kostus al ĉi ti la neebla venko de Germanujo. La tuta sendependeco de Eŭropo estas en danĝero. Ĝia libereco, ĝia civilizado ne postvivus la triumfon de forto servanta senskrupulan diplomaton, por kiu traktatoj estas paperpecoj. Nia konfido estas neŝancelebla. La Rajto ĉiam estas la reganto de la mondo <sup>(1)</sup>.

<sup>(1)</sup> La komencaj kaj finaj frazoj de tiu folio estas elĉerpitaj kaj tradukitaj el la broŝuro de André WEISS : *La violation de la neutralité belge et luxembourgeoise par l'Allemagne*. Paris, A. Colin, 1915.

La Germana kanceliro ankaŭ konfesis ke, por Germanujo la rezulto pravigas la rimedojn.

Paroloj de S-ro de BETHMANN-HOLLWEG  
ĉe la Reichstag (4 Aŭgusto 1914) :

« Sinjoroj, ni estas en la neceseco defendi nin ; kaj NECESECO NE KONAS LEĜOJN. Niaj trupoj okupis Luksemburgon, kaj eble jam eniris la belgan teritorion. Tio estas KONTRAŬA AL LA LEĜOJ DE LA POPOLAJTO. La franca registaro, tio estas vera, deklaris, ke ĝi respektos la neŭtralecon de Belgujo, tiom longe kiom la kontraŭulo ĝin respektos. Sed ni sciis ke Francujo estis preta por la atako. Francujo povis atendi, sed ni ne povis. Franca atako, sur niaj arme flankoj, sur la suba Rhin, povus esti danĝera por ni. Pro tio, ni estis devigitaj preterlasi la PRAVAJN protestojn de la luksembourga kaj belga registaroj. La KONTRAŬ-LEĜECO (mi parolas senkaŝe), la KONTRAŬLEĜECO, kiun ni faras nun, ni penas ĝin kompensi tuj kiam nia milita celo estos trafita. Kiam oni estas tiel minacata kiel ni,





SEKCIO B : MALRESPEKTOJ AL LA LEĜOJ DE LA POPOLRAJTO



# LA MARTIRO DE BELGUJO (I)

Kiamaniere la germanaj armeestroj aplikis la leĝojn pri la popolrajto.

(1) Ni publikigas ĉi-poste eltiraĵojn el la dek-du oficialaj Raportoj prezentitaj al la Belga Registaro de la enketa komisiono, starigita apud la belga

Ministro de Justeco, la 8<sup>an</sup> de aŭgusto, por konstati la malrespektojn al la leĝoj de la popolrajto kaj de la humaneco, faritajn de la invadintoj de Belgujo.

## El la Oficialaj Raportoj.

La merkredon 19-aŭgusto matene, la germanaj trupoj enpenetris *Aerschot*, urbon kun 8000 loĝantoj. Neniu belga soldataro restis tie. Tuj post ilia eniro, la Germanoj bruligis kelkajn domojn kaj, sur la strato *Marteau*, mortpafis kvin aŭ ses loĝantojn, kiujn ili elirigis el iliaj domoj. Vespere, pretekstante, ke la filo de la urbestro estas mortiginta germanan superan oficiron, aŭ, laŭ alia rakonto, ke la urbestro kaj lia familio estas aranĝintaj komploton kontraŭ la superan komandanton, la Germanoj kaptis ĉiujn virojn ĉeestantajn en *Aerschot*, tuj forkondukis kvindekon da ili iom malproksimen de la urbo, grupigis ilin kvarope, kaj kurigante ilin laŭvice antaŭ si, ilin faligis pafe kaj finmortigis bajonete. Pli ol kvardek estis tiel buĉataj.

Ili disrabis la urbon, ŝtelante en la loĝejoj ĉion, kion ili povis preni, rompante meblojn kaj monkestojn. La sekvantan tagon, ili ordigis laŭ tri vicoj la aliajn burĝojn arestitajn hieraŭ; en ĉiu vico ili prenis el tri homoj unu. Ĉi tiujn, kun la urbestro de *Aerschot*, S-ro TIELEMANS, lia 15 1/2-jara filo, kaj lia frato, oni forkondukis je proksimume 100 metroj de la urbo kaj ilin mortpafis.

Oni poste devigis la aliajn loĝantojn de *Aerschot* elfosi kavojn, kie la viktimoj estis enterigataj.

El ĉiuj atestoj rezultas, ke la civila loĝantaro de *Aerschot* neniel partoprenis en la batalado, ke neniu pafado estas farita de ĝi; ĉiuj atestantoj konsentas por montri la neverŝajnecon de la germana rakonto, laŭ kiu la filo de la urbestro, 15 1/2-jara infano, nature tre pacema, estus pafinta al germana supera oficiro en la vespero de la 19-aŭgusto. Ankoraŭ malpli verŝajna estas la rakonto pri komploto aranĝita de la urbestro. Ili rimarkigas, ke se (kion ili ne scias) germana oficiro estis trafata sur la granda placo, eble lin trafis erarinta kuglo; ĉar la germanaj soldatoj tiam pafadis en la apudaj stratoj, por timigi la loĝantaron.

La urbestro, tre kvieta homo, estis kelkfoje avertinta siajn samurbanojn, per afiŝoj kaj per cirkuleroj senditaj al ĉiuj loĝantoj, ke en okazo de invado ili devas sin deteni de ĉiu malamika ago. La afiŝoj estis ankoraŭ sur la muroj ĉe la eniro de la Germanoj kaj estis montritaj al ili.

La atestanto citas la nomojn kaj adresojn de 18 personoj, kiuj-li scias-estis buĉataj.

Inter ili estas :

La edzino de François LUYCKX, 45-jara, kun sia 12-jara-filino, kiuj, trovitaj en kloako, estis mortpafataj; La 9-jara filino de la nomita Jean OUYEN, kiun oni mortpafis;

La nomita André WILLEM, 23-jara, preĝeja pedelo, kiun oni alligis al arbo kaj bruligis vivantan;

La nomita REYNERS (Joseph) 40-jara, mortigita kun sia dekjara pranevo;

La nomitaj LODTS (Gustave) 40-jara, kaj MARKEN (Jean) ankaŭ 40-jara, *kredeble enterigitaj vivante*. . .

(El la *Unua Raporto*.)

En apuda vilaĝo, *Corbeek-Loo*, la merkredon 19-aŭgusto, juna 22-jara virino, kies edzo estis en la armeo, estis surprizita, kun kelkaj el ŝiaj parencoj, de bando da germanaj soldatoj. La personoj ŝin akompanantaj estis enfermitaj en forlasita domo, dum oni ŝin trenis en alian loĝejon, kie kvin soldatoj laŭvice perfortis ŝin.

En la sama urbeto, la jaŭdon 20-aŭgusto, germanaj soldatoj kaptis en ilia loĝejo junulinon proksimume 16-jaran kaj ŝiajn gepatrojn kaj forkondukis ilin al forlasita bieno. Dum kelkaj soldatoj minace retenis la patron kaj patrinon, la aliaj enpenetris la loĝejon, kies kelo estis melfermita, kaj devigis la junulinon drinki. Poste, ili kondukis ŝin sur herbobedon antaŭ la domo kaj laŭvice perfortis ŝin. Ĉar ŝi ankoraŭ rezistis, ili trapikis al ŝi la bruston per bajoneto. Forlasite de ili post tiuj abomenaj faroj, la junulino estis rekondukita al ŝiaj gepatroj; la sek-



vantan tagon, pro la graveco de ŝia stato, ŝi estis sankto-leita de la paroĥa pastro kaj enmetita en la hospitalon de Loveno. Ŝi tiam estis en danĝero de morto.

Enirante en *Hofstade* la 25-aŭgusto, la helgaj soldatoj trovis la kadavron de maljunulino mortigita per bajonet-pikoj; ŝi ankoraŭ tenis en mano kudrilon, per kiu ŝi kudris, kiam oni ŝin frapis; virino kaj ŝia 15 aŭ 16-jara filo kuŝis trapikitaj de bajonetoj; viro estis pendigita.

De tiu momento, asertante, ke civiluloj estas pafintaj al iliaj soldatoj, kio estas kontraŭdirita de ĉiuj atestantoj kaj kio malfacile estus ebla, ĉar la Lovenanoj jam de kelkaj tagoj devis liveri siajn batalilojn al la komunumaj aŭtoritatuloj, la Germanoj komencis bombardi la urbon. La bombardo daŭris ĝis ĉirkaŭ la 10<sup>a</sup> vespere. Poste, la Germanoj ekbruligis la urbon. Tie, kie la incendio ne prosperis, la germanaj soldatoj enpenetris la loĝejojn kaj ĵetis ekbruligajn grenadojn, per kiuj kelkaj el ili ŝajnas esti provizitaj. La pli granda parto de Loveno, speciale la kvartaloj de la alta urbo, kie troviĝas la modernaj konstruaĵoj, la katedralo Sankta Petro, la universitataj Haloj, kun la tuta biblioteko de la Universitato, ĝiaj manuskriptoj, ĝiaj kolektoj, la urba teatro, tiam estis brulantaj.

La Komisio havas la devon insisti, meze de ĉiuj ĉi tiuj abomenaĵoj, pri tiu krimo kontraŭ la civilizacio: la intence farita detruo de akademia biblioteko, kiu estis unu el la nuntempaj trezoroj.

(El la *Dua Raporto*.)

#### *Arestoj, Mortigoj, kaj Pafadoj.*

Multaj loĝantoj de *Lebbeke*, *Saint-Gilles*, *Termonde*, arestitaj de la germanaj trupoj estas forkondukitaj en Germanujon.

La pastro de *Lebbeke*, lia vikario, la komunuma sekretario, la notario kaj preskaŭ 450 loĝantoj de la diritaj komunumoj estas internigitaj, parte en tendaro en *Soltau*, parte en tendaro en *Münster* (Hanover).

Dum la tuta vojaĝo kaj la unua tempo de ilia internado, oni traktis ilin plej abomene. En la vojiro, tri el ili, tute senfortigitaj de la malsato, komencis deliri. Oni tuj buĉis ilin; du el ili estis mortpikitaj per bajonetoj; unu ĵetita sur la vojo kaj morpafita.

Dudek-kvin loĝantoj de *Lebbeke* kaj de *Saint-Gilles* estis mortigitaj de la germanaj trupoj sur la teritorio de *Lebbeke* kaj de *Saint-Gilles*. Krom kvar, la nomitaj HERTOGH, VAN MALDEREN, DE BOECK, MANNAERT, ĉiuj estis buĉataj aŭ finmortigitaj per bajoneto, pikilego aŭ hakilo. La plimulto havis la vizaĝon tiel kripligitan, ke neeble estis indentigi ilin, se ne per la objektoj trovitaj sur ili. Dekdu el ili, loĝintoj de *Lebbeke*, la nomitaj CAMILLE VERHULST, THÉOPHILE KEPPENS, ARTHUR BOVYN, ARTHUR VERHULST, PIERRE VAN EYBERGHE, CAMILLE LISSENS, OCTAVE VERHULST, VAN DEN BERGHE aŭ VERCAUTEREN (identeco ne

certigita), EDMOND HOFMAN, GUSTAVE HOFMAN, VELDEMAN, JOSEPH PIERAERT, estis rifugintaj en farndomon de OCTAVE VERHULST; ilin oni kunligis korpo al korpo kondukis malantaŭ la domon kaj tie buĉis. Iliajn kadavrojn oni ĵetis en la saman foson. Ses loĝantoj de *Saint-Gilles*, la nomitajn ACHILLE REYE, ALPHONSE VAN DAMME, PROSPER VAN DOOREN, ERNEST DE KINDER, ERNEST DE STOBELAER, FRANÇOIS MERTENS, oni kunligis brako al brako kaj forkondukis al *Lebbeke*. La Germanoj elpikis al ili la okulojn kaj poste mortigis ilin per bajonetoj.

Al aliaj, la nomitaj VAN WEYENBERG, LOUIS VAN DAMME, FRANÇOIS MOENS, el *Lebbeke*, oni fendis la kapon per sabroatoj en ĉeesto de iliaj edzinoj kaj gefiloj.

Du loĝantoj de *Termonde* estis mortigitaj tuj ĉe la eniro de la Germanoj en la urbon. Loĝanto de *Appels*, THÉOPHILE VAN DEN BOSSCHE, estis mortigita de revolver-pafoj; alia, WATERS, vundita de pafilo.

La 4 septembro, tago de la atako kontraŭ *Termonde*, ses germanaj infanterianoj dufoje pafis tute proksime (5 metroj) al D<sup>ro</sup> E. HEMERYCK kaj lia sakportisto, kiuj ambaŭ surhavis la brakbanton de la Ruĝa-Kruco. La sakportisto mortis kvin tagojn poste de vundo farita de eksplodema kuglo en la supra parto de la femuro, vundo 20-centimetra ĉe la antaŭa, 25-centimetra ĉe la malantaŭa flanko. La konstatoj estas faritaj de tri kuracistoj en la ambulanco aranĝita en la fabriko Vertongen. Tria pafado al D<sup>ro</sup> HEMERYCK estis farata post la falo de lia sakportisto. (Raporto de D<sup>ro</sup> HEMERYCK.)

(El la *Najna Raporto*.)

#### *Buĉado en Tamines.*

*Tamines*, lokita apud rivero Sambro, inter *Charleroi* kaj *Namur*, estis prospera komunumo kun 5700 loĝantoj.

Francaj taĉmentoj ĝin okupis la 17, 18 kaj 19 aŭgusto. La ĵaŭdon 20 aŭgusto, germana patrolo alproksimiĝis la antaŭurbon *Vilaines*. Ĝin akceptis per pafoj kelkaj francaj soldatoj kaj grupo da civitaj gardistoj de *Charleroi*. Kelkaj ulanoj estis mortigitaj aŭ vunditaj; la aliaj forkuris. Entuziasme la loĝantoj eliris ĉiuj siaj domoj kaj ekkriis: « Vivu Belgujo! Vivu Francujo! ». Tre kredeble, ĉi tio estis la kaŭzo de la buĉado en *Tamines*.

Baldaŭ la Germanoj grandamase alvenis al la vilaĝeto *Alloux*. Ili bruligis du domojn kaj kaptis ĉiujn loĝantojn. Batalo komenciĝis inter la germana artilerio postenita en *Vilaines* kaj *Alloux*, kaj la franca artilerio lokita en *Arsimont* kaj *Ham-sur-Heure*.

La 21 aŭgusto, ĉirkaŭ la 5<sup>a</sup>, la Germanoj perforte okupis la ponton de *Tamines*, transiris *Sambro* kaj grandare trairis la stratojn de la vilaĝo. Ĉirkaŭ la 8<sup>a</sup> vespere, soldatoj haltas en la vilaĝo, enpenetras la domojn, forpelas la loĝantojn kaj komencas ĉion rabadi, detruai, bruligi. La brulado disvastiĝas. Kelkaj loĝantoj forkuras. La pli multaj estas kaptitaj ĉu en la nokto de la 21 aŭgusto, aŭ la sek-



vantan tagon. La rabado kaj la bruligo ne ĉesis dum la tuta sekvanta tago.

La sabaton 22 aŭgusto, ĉirkaŭ la 7<sup>a</sup> vespere, grupo da 450 viroj, precipe loĝantoj de *Alloux*, estis amasigitaj antaŭ la preĝejo, ne malproksime de Sambro. Je fiksita momento, taĉmento ekpafis al ili. Ĉar ilia krima ago fariĝis tro malrapide, la oficiroj altruligis mitralilon, kiu baldaŭ faligis duonon de la soldatoj, ili pene restariĝis, esperante, ke oni lasos al ili la vivon. Ilin tuj faligis nova pafado.

Kelkaj ankoraŭ spiris, kuŝante sub la kadavroj. Ĝemoj kaŭzitaj de la sufero, petoj pri helpo, aŭdiĝis el la sanga amaso. Diversfoje soldatoj proksimiĝis al la malfeliĉuloj kaj provis bajonete finmortigi la vunditojn. Dum la nokto, kelkaj sukcesis forrampi. Aliaj faris finon al siaj suferoj, ĵetante sin en la riveron. Ĉiujn ĉi tiujn detalojn oni povis fiksi laŭ la deklaroj de alpaŝitoj, kiuj ne mortis de siaj vundoj. Centon da kadavroj oni trovis en Sambro.

En la sekvanta tago, dimanĉo 23 aŭgusto, ĉirkaŭ la 6<sup>a</sup> matene, oni alkondukis sur la placon grupon da viroj kaptitaj en la vilaĝo kaj la ĉirkaŭaĵo. Unu el ili faris poste la sekvantan deklaron :

« Alveninte sur la placon, la unua afero, kiun ni vidis, estis amaso da kadavroj de civiluloj, havanta almenaŭ 40 metrojn da longo, 6 metrojn da larĝo kaj 1 m. da alto. Oni estis enviciginta ilin por ilin mortigi. Oni lokis nin antaŭ la kadavroj kaj ni havis la konvinkon, ke oni tuj mortpafos nin.

» Unu el la oficiroj venis kaj petis bonvolajn homojn, kiuj faros fosaĵojn por enterigi la kadavrojn. Mi proponis ĉin, same kiel mia bofrato kaj kelkaj aliaj personoj. Oni kondukis nin al loko laŭlonge de la placo, kaj oni ordonis ni fari fosaĵon havantan 15 m. de longo, 10 m. da larĝo kaj 2 m. da profundo.

» Ĉiu el ni riceris ŝovelilon. Dum ni fosis, soldatoj kun joneto ĉe la pafilo donis al ni ordonojn. Mi tre suferis, kutiminte al tia laboro kaj malfortigite de la malsato. Soldato alportigis al mi malpli pezan ŝovelilon. Poste li s serĉi akvon kaj donis al ni trinki. Mi demandis, ĉu li las kion oni faros kun ni. Li respondis nee.

» Estis almenaŭ tagmeze, kiam la fosaĵo finiĝis. Oni donis al ni tabulojn. Ni metis sur ilin la kadavrojn por ilin faligi en la fosaĵon. Mi rekonis multajn viktimojn dum tiu transporto. Tiel, patroj portis la korpojn de siaj filoj, kaj filoj la korpon de sia patro.

» La virinoj estis alkondukitaj sur la placon kaj rigardis nin labori. Ĉirkaŭ ni, ĉiuj domoj estis bruligitaj.

» Sur la placo estis soldatoj kaj oficiroj. Ili trinkis ĉampanon. Ju pli la tago forpasis, des pli la viroj ebriiĝis, kaj ni ĉiam pli pensis, ke oni mortpafos nin.

» Ni enterigis 350 ĝis 400 kadavrojn. La listoj de la viktimoj estos starigitaj kaj vi vidos ilin.

» Dum viroj portis kadavrojn, mi vidis ilin halti kaj

alvoki germanan kuraciston. Ili estis rimarkintaj, ke la transportata homo ankoraŭ vivas. La kuracisto sin klinis sur la vunditon kaj faris signon, ke oni lin enterigu. La viroj denove levis la tabulon kaj, en tiu momento, mi vidis la brakon de la vundito sin levi je dudeko da centimetroj. Oni denove alvokis la kuraciston; sed li signis, ke oni devas enterigi tiun homon. Oni lin ĵetis en la fosaĵon kun la aliaj.

» Mi vidis M... porti la kadavron de sia bofilo kaj preni de ĝi lian poŝhorloĝon, sed li ne povis preni iun el la paperoj, kiuj troviĝis sur li.

» Kiam soldato komplete proksimiĝis al ni, oficiro tuj venis riproĉi lin. Kiam ĉiuj kadavroj estis enterigitaj, oni alportis kelkajn vunditojn en la preĝejon. La oficiroj sufiĉe longe interkonsiliĝis. Kvar rajdantaj oficiroj venis sur la placon kaj post sufiĉe longa interparolado, oni envicigis nin kun niaj edzinoj kaj gefiloj. Oni trairigis al ni *Tamines* meze de la ruboj, kiuj obstrukcis la stratojn. Oni kondukis nin al *Vilaines* inter du vicoj de soldatoj. Mi insistas pri miaj moralaj suferoj dum tiu tago. Ni ĉiunmomente pensis, ke oni tuj mortpafos nin en ĉeesto de niaj edzinoj kaj gefiloj. Mi vidis germanajn soldatojn, kiuj ne povis ne plori, vidante la malesperon de la virinoj kaj infanoj. Unu el ni suferis apopleksion, pro sia troa timo. Kelkajn aliajn mi vidis sveni.

Kiam la aro alvenis en *Vilaines*, oficiro diris al la malfeliĉuloj, ke ili estas liberaj, sed ke kiu ajn provos reĉniri *Tamines* estos mortpafita. Li devigis la virinojn krii : « Vivu Germanujo ».

La Germanoj bruligis, rabadinte ilin, 264 domojn de la vilaĝo. Multe da viroj, virinoj kaj infanoj estis bruligitaj aŭ sufokitaj en sia domo. Multaj aliaj mortpafitaj en la kamparo. La suma nombro da viktimoj superas 650.

La enketintoj speciale turnis sian atenton pri la konstato de jena punkto : ĉu la loĝantoj de la vilaĝo estis pafintaj al la germanaj trupoj. Ĉiuj atestantoj unuanime certigas la malon. Ili klarigas la buĉadon de siaj samvilaĝanoj, ĉu per tio, ke la Germanoj atribuis al la loĝantoj kelkajn pafadojn faritajn de francaj soldatoj, aŭ per la kolero kaŭzita de la germanaj soldatoj, de la sukceso de nokta atako, kiun faris la franca armeo.

#### *Disrabado en Dinant.*

La urbo *Dinant* estis disrabita kaj detruita de la germana armeo; ĝia loĝantaro estis grandaparte mortigita la 21, 22, 23, 24 kaj 25 aŭgusto.

La 15 aŭgusto, forta ekbatalo okazis en *Dinant* inter la francaj trupoj postenitaj sur la maldekstra bordo de la rivero Meuse kaj la germanaj trupoj alvenantaj de la Oriento. La germanaj trupoj, disbatite forkuris, persekutitaj de la Francoj, kiuj transiris al la dekstra bordo de la rivero. La urbo malmulte suferis en tiu tago. Kelkaj domoj estis detruitaj de la germanaj bomboj kredeble celitaj al la



francaj regimentoj sur la maldekstra bordo. Dinantano, membro de la Ruĝa Kruco, estis mortigita de germanaj kuglo en la momento, kiam li relevis vunditon.

La sekvantaj tagoj estis kvietaj. La Francoj okupis la ĉirkaŭaĵon de la urbo. Neniu ekbatalo okazis inter la kontraŭaj armeoj kaj nenio fariĝis, kin povus esti konsiderata kiel malamika ago de la loĝantaro. Neniu germana trupo sin trovis proksime de *Dinant*.

La vendredon 21 aŭgusto, ĉirkaŭ la 9<sup>a</sup> vespere, germanaj soldatoj malsupren venintaj per la vojo de *Ciney* enpenetris la urbon tra la strato *Saint-Jacques*. Ili senkaŭze komencis pafi al ĉiuj fenestroj, mortigis laboriston revenantan hejmen, vundis alian Dinantanon kaj devigis lin krei « Vivu la Imperiestro ». Trian ili frapis per bajoneto en la ventron. Ili eniris la kafejojn, ŝtelis alkoholaĵojn, ebriiĝis kaj foriris, bruliginte kelkajn domojn kaj rompinte la pordojn kaj fenestrojn de la aliaj loĝejoj.

Terurita, konsternita, la loĝantaro sin enŝlosis en siaj loĝejoj.

La sabata tago, 22 aŭgusto, estis relative kvieta. La tuta vivo estis haltigita. Parto de la loĝantaro, puŝata de memkonserva instinkto, forkuris en la apudan kamparon. La aliaj, pli alligitaj al siaj hejmoj kaj trankviligitaj de la konvinko, ke nenio estas farita, kion oni povus konsideri kiel malamika ago, sin kaŝis en siaj domoj.

La dimanĉon 23 aŭgusto, je la 6<sup>a</sup> matene, la soldatoj de la 108<sup>a</sup> infanteria regimento eliris la putojn el la preĝejo de *Prémontrés*, apartigis la virinojn de la viroj kaj mortpafis kvindek da ĉi tiuj.

Inter la 7<sup>a</sup> kaj la 9<sup>a</sup> matene, la soldatoj disrabis kaj bruligis domon post domo, forpelante la loĝantojn sur la stratojn. Oni tuj mortpafis tiujn, kiuj provis forkuri.

Ĉirkaŭ la 9<sup>a</sup> matene, la soldatoj pelis antaŭ si, frapante ilin per pafilkolboj, la virojn, virinojn kaj infanojn kaptitajn de ili. Ili kolektis ilin sur la granda placo kaj gardis ilin tie ĝis la 6<sup>a</sup> vespere. Iliaj gardantoj faris al si la plezuron diri, ke ili baldaŭ estos mortpafataj.

Ĉirkaŭ la 6<sup>a</sup>, kapitano apartigis la virojn de la virinoj kaj infanoj. La virinojn oni metis post vico de infanterianoj. La virojn oni starigis laŭ rekta linio antaŭ muro. Unua vico devis genuiĝi, aliaj staris post ili. Duonroto da soldatoj sin lokis antaŭ la grupo. Vane la virinoj petegis pri pardono por iliaj edzoj, filoj kaj fratoj. La oficiro komandis la pafadon. Estis farita neniu enketo, neniu ŝajniga juĝo.

Dudeko da homoj estis nur vunditaj kaj falegis meze de la kadavroj. La soldatoj, por esti pli certaj, denove pafadis al la amaso. Kelkaj Dinantanoj sin savis de tiu duobla pafado. Ili ŝajnis sin mortintaj, kuŝante du horojn senmove sub la kadavroj, kaj ĉe la noktigo ili forrampis al la monto. Restis sur la loko pli ol 84 viktimoj, kiujn oni enterigis en apuda ĝardeno.

Tiun tagon 23 aŭgusto sangomakulis multaj aliaj buĉadoj.

La soldatoj ektrovis en la keloj de la bierejo loĝantojn de la antaŭurbo Sankta-Petro kaj ilin tie mortpafis.

Preskaŭ ĉiuj viroj de la antaŭurbo *Leffe* estas grandope mortigitaj. En alia parto de la urbo, dekdu civiluloj estas buĉitaj en kelo. En la strato Enile, paralizito estas mortpafita en sia braksego. Sur la strato d'Enfer, soldato mortigis 14-jaran infanon.

En la antaŭurbo *Nesse*, buĉado sangomakulas la viadukton de la fervojo. Maljuna virino kaj ĉiuj ŝiaj gefiloj estas mortigitaj en kelo. 65-jara maljunulo, lia edzino, liaj filo kaj filino, estas mortpafitaj apud muro. Aliaj loĝantoj de *Nesse* estas forkondukitaj en boato ĝis la ŝtonego Bayard kaj tie mortpafitaj. Inter ili sin trovis 83-jara virino kaj ŝia edzo.

Kelke da viroj kaj virinoj estis enfermitaj en la korto de la malliberejo. Ĉirkaŭ la sesa vespere, germana maŝinpaŝilo, lokita sur la monto, komencis pafadi al ili. Maljunulo kaj tri aliaj personoj estis mortigitaj.

Dum kelkaj soldatoj sin okupis per tiaj buĉadoj, aliaj ŝtelis kaj disrabis la loĝejoj, disbatis aŭ eksplode malŝlosis la monŝrankojn. Ili enpenetris la « Banque centrale de la Meuse », ekkaptis la direktoron, S<sup>ron</sup> Xavier WASSEIGE, kaj ordonis lin malŝlosi la monŝrankojn. Ĉar li rifuzis, ili provis krevigi la ŝrankojn: ne sukcesinte, ili forkondikis S<sup>ron</sup> WASSEIGE kaj liajn du pli maljunajn filojn al la parada placo, kie oni mortigis ilin per maŝinpaŝilo kun 120 el iliaj samurbanoj. La tri plej maljunaj infanoj de S<sup>ro</sup> WASSEIGE devis ĉeesti la mortigon de sia patro kaj de siaj fratoj. Oni rakontas ankaŭ jenan detalon: unu el la filoj WASSEIGE agoniis sur la loko dum unu horo kaj neniu kuraĝis iri helpe al li.

Fininte sian detruan kaj ŝtelan faradon, la soldatoj ekbruligis la domojn. Baldaŭ la urbo fariĝis simpla ardajego.

La enketo ankaŭ pruvigis, ke la germanaj soldatoj, elmetitaj al la pafado de la Francoj sur la dekstra riverbordo, sin ŝirmis en kelkaj lokoj post remparo el civiluloj, virinoj kaj infanoj.

Resume, la urbo *Dinant* estas detruita. Ĝi enhavis 1400 domojn; 200 ankoraŭ staras. La fabrikoj, per kiuj vivis la laborista loĝantaro estis sisteme detruitaj. Multaj loĝantoj estis forkondukitaj Germanujon kaj estas ankoraŭ tie, kiel kaptitoj. La plimulto disiris en tuta Belgio. Tiuj, kiuj restas en la urbo, mortas de malsano.

La Komisio posedas liston de la viktimoj post la buĉado en *Dinant*. Tiu listo enkavas preskaŭ 700 nomojn kaj ĝi ne estas kompleta. Inter la mortintoj estas 73 virinoj 39 infanoj de ambaŭ seksoj, sesmonataj ĝis dekkvinjara.

*Dinant* enhavis 7.600 loĝantojn. La dekono de tiu loĝantaro estis mortigita; neniu familio estas sen viktimoj, kelkaj tute malaperis.

(El la Dek-unua Raporto.)



SEKCIO B : MALRESPEKTOJ AL LA LEĜOJ DE LA POPOLRAJTO.

11

## PRI LA BELGA NEŬTRALECO (II)

Atenco de Germanujo kontraŭ la Belga kaj Luksemburga neŭtraleco.

### I. — *Kio estas ĉiama neŭtraleco.*

Se eksplodas milito inter du aŭ pluraj regnoj, tiam la regnoj starantaj ekster la konflikto estas neŭtralaj. Povas esti, ke tiu neŭtraleco ne estas memvola, sed altrudita per antaŭa internacia traktato, laŭ kiu la regno devas neniam partopreni iun ajn militan entreprenon, escepte se ĝi estas atakita: tio estas ĉiama aŭ konstanta neŭtraleco. Tia estas la neŭtraleco de Belgujo kaj Luksemburgo.

*Belgujo* — En 1815, la kunligitaj regnoj, pro singardo kontraŭ venkita Francujo, kunigis la eksfrancajn belgajn provincojn al Holando (Viena Kongreso). Sed en 1830 Belgujo proklamis sian sendependecon. Londona konferenco de la kvin grandaj regnoj (Aŭstrujo, Britujo, Francujo, Prusujo, Ruslando) akceptis la fakton, sed decidis, ke la nova regno estos ĉiam neŭtrala. La kvin regnoj garantias iun neŭtralecon kaj la neatenceblecon pri ĝia teritorio. (Traktatoj de 26 Jun. 1831; kaj de 19 Apr. 1839, ambaŭ subskribitaj de Prusujo.) Tiel oni formis inter la grandaj regnoj kvazaŭ bufron, malpermesantan al ĉiu el ili invadon kontraŭ la najbaro.

La neŭtraleco de Luksemburgo estas analogia al tiu de Belgujo. Ĝi estis fiksita kaj garantiita de Aŭstrujo, Britujo, Francujo, Prusujo kaj Ruslando, kune kun Belgujo kaj Italujo, en Londona konferenco (21. de Majo 1867). Prusujo eĉ *postulis* tian neŭtralecon por sia senriskeco. Ĝi sole ne promesis respekti kaj respektigi la Luksemburgan neŭtralecon, same kiel la Belgan.

### II. — *Atenco kontraŭ Luksemburga (2 Aŭg. 1914), kaj Belga (4 Aŭg. 1914) neŭtraleco.*

Tion antaŭ mondo alprenitan devigon piedpremis Germana Imperio. La duan de Aŭg. 1914, antaŭ ol milito estis deklarita kontraŭ Francujo, la germanaj soldataroj invadis Luksemburgan teritorion. Neniu antaŭaverto, neniu ultimato estis antaŭe sendita al la Granddukina registaro. Eĉ neniun pretekston oni prezentis.

Cetere la fortikaj kaj fervojaj aranĝoj sufiĉe klare

montris la delongajn intencojn. Luksemburgo ne povis kontraŭstari: ĝi nur tre energie protestis per komuniko de S-ro EYSCHEN, ŝtatministro, al la garantiintaj regnoj. La Granddukino denove protestis ĉe sia Parlamento, la 10-an de Nov.

La Belga neŭtraleco, ĉiam respektita, eĉ en 1870, ne estis pli valora por haltigi la germanan planon pri subita invado delonge en Berlino ellaboritan. La 2-an de Aŭg. 1914, la germana registaro sendis al reĝo Alberto minacan ultimaton. Laŭ tiu historia teksto, Francujo intencus invadi Belgion, Germanujo volus nur tion antaŭi kaj malhelpi. La germanaj armeoj estus nur pace transirontaj Belgion, kies neniun parton Germanujo iam ajn aneksis; nur se Belgujo malcedos, oni ĝin konsideros kiel malamikon kaj laŭ necese al militos <sup>(1)</sup>.

Al tiu insulta minacdevigo (farita de garantiinta regno) Belgujo fiere respondis la 1-an de Aŭg. 1914 <sup>(2)</sup>: ke Francujo deklaris la 1-an de Aŭg. sian nepran decidon respekti Belgan neŭtralecon; ke cetere Belgujo kontraŭstaros forte al ĉiu ajn invadanto, eĉ franca; ke la traktatoj certigas neŭtralecon kaj sendependecon de Belgujo, garantiintajn de la grandaj regnoj, nome de Prusa reĝa registaro; ke iu ajn atenco estus klara malŝato kontraŭ la internacia rajto; ke nenia milita intereso justigas atencon kontraŭ la juro; sekve, ke Belgujo ne povas akcepti la germanajn proponojn, kaj, se Germanujo ĝin atakos, ĝi plēj vigle kontraŭstaros.

Poste Belgujo sendis alvokon al siaj garantiintoj, t.e. al Britujo, Francujo kaj Rusujo. Jam antaŭ la ultimato Francujo estis respondinta al Brita demando, ke ĝi respektos Belgan neŭtralecon <sup>(3)</sup>. Germanujo male hezitis kaj duberespondis. La ultimato ne surprizis do Britujon, kiu, pro historiaj de ĉiuj konitaj circumstancoj <sup>(4)</sup> deklaris militon kontraŭ Germanujo kaj alhelpis Belgion.

(1) Vidu plenan tekston de la ultimato en Belga *Griza Libro*, 1914, n° 20, aneksaĵo. — (2) *Griza Libro*, 1914, n° 77. — (3) *Blua Libro*, 1914, n° 123. — (4) *Blua Libro*, 1914, n° 160.



### III. — *Vanaj provoj kaj senkulpigoj de Germanujo por foreviti la tutmondan malaprobon.*

Germanujo esperis, ke, per tuja venko, ĝi sufokos Francujon kaj, timigante la neŭtralulojn, silentigos ĉiun ajn proteston; sed la venko ne venis, kaj la internacia konscienco ribelis kontraŭ la germanaj atencoj. Plej elementa moraleco kondamnis tian sovaĝan senhonton. La neŭtralaj regnoj ĝin facile sentis kaj kune sian propran riskon. Unu post alia ili forlasas sian senagecon por batali kontraŭ barbaraj senjuruloj; lasttempe Italujo, patrino de la Juro, eliris sian glavon. Ĉiuj kriis sian indignon.

Jam tian protestegon antaŭvidante, kiam Liège heroe kontraŭstaris, Germana registaro volis haltigi la Belgan malcedon kaj per intermeto de Holanda registaro proponis pacon al Belgoj. Noble ĝin rifuzis Reĝo Alberto scianta nun, kiom valoras Germana parolo <sup>(1)</sup>.

Tial, nesukcesinte, Germanujo serĉis diversajn justigilojn antaŭ la monda protestego. Por «klarigi» la faritan atencon, ĝi uzis la imagon de siaj publicistoj kaj ŝtatestoj; ĝi mobilizis siajn «intelektulojn».

*Akuzoj kontraŭ Francujo.* — S-ro de Schoen, en sia militdeklara teksto, la 3-an de Aŭg. pretendis jam resendi al Francujo respondecon pri la ofendo kontraŭ neŭtraleco de Belgujo: «Kelkaj Francaj militaj aviadistoj, diras tiu historia dokumento, rompis evidente neŭtralecon de Belgujo surflugante Belgan teritorion» <sup>(2)</sup>.

S-ro Viviani, ministro por eksteraj Aferoj de Franca Respubliko, kontraŭdiris plenprecize tiun aserton <sup>(3)</sup>. Sed, eĉ se ĝi estus prava, tiaj aeraj esploroj ne prezentus rompon de neŭtraleco, ĉar la 3-an de Aŭg. ne ekzistis ankoraŭ milita stato inter Francujo kaj Germanujo. Ĉu Francujo dum la lastaj jaroj vidis malamikaĵon en alteriĝo sur sian teritorion de iuj «Zeppelin» aŭ aliaj germanaj militaj flugmaŝinoj? En paca tempo tiaj okazetoj havas nenian gravecon: diplomatio finaranĝas ilin. Ŝajnas cetere, ke Belgujo ne protestis kontraŭ la transpaso super siaj limoj de niaj aviadistoj. Sekve, ni forlasu tiun legendon kaj la similan, kiu pretendis ke, laŭ vidintoj, Francaj regimentoj okupis Bruxelles jam de julio. La Germana ministro en Belgujo devus liaokaze atentigi sian registaron pri nekutima ĉeestado de fremdaj militistoj en sia restadejo; sed li ja ne povis akcepti la respondecon pri tia mensogo.

Francujo do ne antaŭiris Germanujon en Belgujo. Eĉ malamikoj devas tion konfesi kaj ili povas nur supoze kulpigi la planojn de la Franca ĉefstabo: «Francaj militistaroj ne estis ankoraŭ en Belgujo la tagon de la ultimato, sed ili nepre venus se ni lasus tempon al ili.» Tiu estas la sola klarigo, kiun Berlina registaro donis al Belgujo pri la okupado de ĝia teritorio <sup>(4)</sup>.

Estas facile respondi al tia aserto. Kian intereson havis Francujo komenci militon en Norda parto de sia teritorio, kie ĝi ne posedas bonajn fortikaĵojn, kiam ĉiuj ĝiaj fortoj kuncentrigis sur orienta limo, pretaj por subteni tiean renkontbaton? (La postaj faroj cetere pravas tion plene). Male la neceso ŝanĝeti la unuan planon pri niaj movoj, kaj kuri rapidege por helpi al Belgujo, klarigas niajn unuajn malsukcesojn en Flandrujo pro laŭnombra supereco de la malamikoj. Tio certe estas la sola kaŭzo de nia retiriĝo al Marno, kronita per brilega venko.

*Akuzoj kontraŭ Belgujo kaj Angllando.* — Ne povante valorigi la falsajn akuzojn kontraŭ Francujo, Germanujo nun asertas, ke Belgujo, konsente kun Angllando, estis delonge decidinta rompi mem sian neŭtralecon (Vidu pri tiu punkto Flugfolio n° 2, «Pri Belga neŭtraleco (1)»). Tiu akuzo estis fondita sur la «milita konsento» inter Belgujo kaj Anglujo, kiun la Germanoj malkovris en *Bruxelles*. Kompreneble, neŭtralaj regnoj devas havi rajton konkludi sindefendan ligojn, kaj cetere nenio montras la realecon de tia ligo. La Germanoj efektive konas nur interparoladojn okazintajn en 1906 inter la ĉefo de Belga stabo kaj la Brita subsekretario. El tiuj interparoladoj vidiĝas, ke la Belga registaro faris ĉion, kion ĝi devis, por la sendanĝereco de sia teritorio, sed neniam promesis helpi al Angla atako ĉe Rejno aŭ Norda Maro. Sed la germana scienco volas neniam konfesi sian eraron, kaj, por pravigi la ekscesojn de Germanaj armeoj, ĝi eĉ maltimas similigi sorton de Belgujo al tiu de la antikva Izraela popolo, kiu pereas sub la dia kolero.

*Germana koncepto pri neŭtraleco.* — Plej interesa estas la fakto, ke la ĵus esplorita komprenmaniero pri neŭtraleco estas sugestita al la Germanoj de la momenta neceso. En la pasinta tempo ili konsideris ĝin tute alie. La tre fama Profesoro pri Internacia Juro en Heidelberga Universitato, S-ro Bluntschli, diras efektive: «Neŭtrala regno ne povas toleri, ke militantoj uzas ĝian teritorion por sia celo, kaj sekve ne devas tralasi ilin. Ĝi havas rajton respektigi sian neŭtralecon eĉ, se necese, per bataliloj. Militantoj estas devigataj respekti absolute la teritorion de neŭtralaj regnoj malgraŭ ĉiuj interesoj kaj cirkonstancoj, kiuj movigas ilin. Se neŭtrala regno defendas sin arme aŭ repuŝas atakon, tio ne estas nuligo de la neŭtraleco; tio male konfirmas ĝin» <sup>(1)</sup>.

S-ro Heffter, Profesoro en Berlino, kiu kavas grandan influon eĉ ekster Germanujo, asertas same: «Ĉiu nacio havas sendiskutan rajton defendi arme sian neŭtralecon kaj repuŝi per tutaj fortoj la atakojn: partopreno kontraŭ ĉiu malamika ago de militantoj sur neŭtrala teritorio estas unu el la plej gravaj devoj de neŭtraleco» <sup>(2)</sup>, k. t. p.

<sup>(1)</sup> *Griza Libro*, n°s 67, 70, 71. — <sup>(2)</sup> *Flava Libro*, 1914, n° 147. — <sup>(3)</sup> *Flava Libro*, n° 140. — <sup>(4)</sup> *Flava Libro*, n° 140, Generalo von Emmich al siaj soldatoj.

<sup>(1)</sup> BLUNTSCHLI, *La Juro Internacia enkodigita*, paragrafo 769, 770, 784, 790. — <sup>(2)</sup> HEFFTER, *La Juro Internacia de Eŭropo* n°s 143, 146.



La plej famegaj reprezentantoj de Germana scienco konsentas do, ke neŭtraleco devas esti armita por efiki kaj influi. Ili konsentas, ke neŭtraluloj havas povon kaj devon defendi sian neŭtralecon kontraŭ atakantoj. Jen estas ankoraŭ tri klaraj paraĝrafaj fiksitaj dum la Paĉkonferenco en Hago kaj akceptitaj de ĉiuj oficialaj delegitoj de Germanujo (Kvina interkonsento de la 18-10-1907) :

ART. 1. — Teritorio de Neŭtralaj regnoj estas neatencebla.

ART. 2. — Estas malpermesite al militantoj pasigi sur teritorio de neŭtrala regno militistaron aŭ transportojn da paŝprovizaĵoj kaj manĝprovizaĵoj.

ART. 10. — Ne povas esti similigita al ago de malamik-keco la faro de neŭtrala regno, kiu forpelas eĉ per la forto la atakojn kontraŭ sia neŭtraleco. »

Sed la germana kanceliero nun publike proklamis, ke kontraktoj estas paperĉifaĵoj. Li tiel senutiligas la falsajn pravigojn de germanaj kleruloj kaj plene prenas sur sin la respondecon pri tiu gravega kulpo. Ni citas laŭtekste la deklarojn faritajn ĉe tribuno de *Reichstag* la 4-an de Aŭg. 1914 de S-ro Kanceliero VON BETHMANN-HOLLWEG :

« Sinjoroj, ni estas en la neceso defendi nin, kaj neceso ne konas leĝojn. Niaj armeoj okupis Luksemburgon kaj eble jam eniris Belgan teritorion. Tio estas

kontraŭa al la leĝoj de la internacia juro. La Franca registaro, tio estas vera, deklaris, ke ĝi respektos neŭtralecon de Belgujo tiom longe, kiom la kontraŭulo ĝin respektos. Sed ni sciis, ke Francujo estis preta por atako. Francujo povis atendi, sed ni ne povis. Franca atako sur niaj arme flankoj apud suba Rejno povus esti danĝera por ni. Pro tio ni estis devigataj preterlasi la pravajn protestojn de Luksemburga kaj Belga registaroj. La kontraŭleĝecon, mi parolas senkaŝe, la kontraŭleĝecon, kiun ni faras nun, ni penas por kompensi tuj, kiam nia milita celo estos trafita. Se oni estas tiel minacata kiel ni, se oni batalas por supera bono, tiam oni faras kion oni povas ».

Ni nenion aldonos al tiu oficiala parolo. Por hodiaŭa Germanujo, celo justigas rimedojn, internaciaj plej sanktaj promesoj cedas antaŭ militaj necesoj. Tion proklamante, ĉu la kanceliero ekpensis, ke li konsentas senhonorigon de sia popolo? Ĉiel, la sendependeco de tuta Eŭropo estas nun riskita. Ĝiaj liberecoj, ĝia civilizeco ne postvivus triumfon de forto servanta senhontan diplomation, por kiu traktatoj estas paperĉifaĵoj. Nia konfido estas neskuebla : Juro estas ĉiam reĝo de l'mondo.

(Laŭ la broŝuro de S<sup>o</sup> Weiss mallongige, tradukis V. Waltzoff kaj F. Duviard.)

#### Novaj dokumentoj.

Ĉar la Imperia Kanceliero germana ne timis atenci kontraŭ la honoro de la Belga nacio, malbone interpretante la « dokumenton BARNARDISTON » ni prezentos novajn dokumentojn, dirojn, de plej kompetanta germana aŭtoritatulo, kiuj pruvas, ke la 4-an de Aŭgusto 1914 la imperia kanceliero ne havis, pri la sintenado de Belgujo, la supozojn, kiujn li donas kiel senkulpigon por la krimo de la germana politiko. Tiu dokumento estas la diplomatia raporto de interparolado oficiala, kiu okazis la 4-an de Aŭgusto matene inter barono BEYENS, belga ministro en Berlino kaj S-ro von JAGOW, ŝtatssekretario. Ĝi estas raportita de S-ro Emile WAXWEILER, direktoro de la sociologia instituto SOLVAY en *Bruxelles* (*La Belgique neutre et loyale; Payot et C<sup>e</sup>, 1915, Lausanne, 2,50*). Paĝo 65 kaj sekvantaj : « La ministro de Belgujo estis apenaŭ parolinta kelkajn vortojn, kiam S-ro von JAGOW ekkriis ». KREDU, ke kun korpreno Germanujo decidas atenci kontraŭ la neŭtraleco de Belgujo, kaj persone mi sentas la plej grandajn bedaŭrojn. Kion vi volas, estas demando pri morto aŭ vivo por la Imperio. Se la germanaj armeoj ne volas esti premitaj inter amboso kaj martelo, ili devas frapi fortan baton kontraŭ Francujo por, poste, turni sin kontraŭ Rusujon. — Sed diris barono BEYENS, la francaj landlimoj estas sufiĉe vastaj por ke oni povu eviti la trapason tra Belgujo. — Ili estas tro fortikigitaj.

Cetere kion ni postulas de vi? Simple ke vi lasu la vojon liberan, ke vi ne detruu viajn fervojojn kaj tunelojn, ke vi lasu nin okupi la fortikaĵojn, kiujn ni bezonas. — Ekzistas, respondis, la Belga Ministro, simpla maniero por respondi al vi, la sola respondo, kiun ni povas fari al tiu demando. Vi prezentu al vi, ke Francujo estas farinta al ni la saman inviton kaj ke, ni estu akceptintaj. Ĉu en tiu kazo, Germanujo ne dirus, ke ni malkuraĝe perfidis ĝin? — La ŝtatssekretario, lasante sen respondo tiun demandon tiel precizan, la Barono BEYENS kompletis sian penson. « Almenaŭ vi havas ion por riproĉi al ni? li demandis. Ĉu ni ne plenumis de 3/4 de jarcento kontraŭ Germanujo, kiel kontraŭ ĉiuj grandaj regnoj garantiantoj, ĉiujn devojn de la neŭtraleco? Ĉu ni ja ne donis al Germanujo atestojn de lojala amikeco? Per kio Germanujo intencas tion pagi? Farante el Belgujo la batalkampon eŭropan, kaj oni scias kiom da detruoj kaj malfeliĉegoj kuntrenos moderna milito... » — *Germanujo povas nenion riproĉi al Belgujo kaj la sintenado de Belgujo estis ĉiam perfekte korekta.* — Konsentu do, rediris barono BEYENS, ke Belgujo ne povus fari al vi alian respondon ol tiu, kiun ĝi faris, ne malhonorigante sin. Ne ekzistas alispeca honoro por la nacioj ol por la privatuloj. Vi devas konsenti, insistis barono BEYENS, ke la respondo ne povis esti alia. — *Mi konsentas pri tio, kiel privata individuo, sed kiel ŝtatskre-*



tario, mi ne havas opinionon esprimotan. (B. D. R., N° 26, 16-2-15.)

Ĉio estis dirita de unu kaj alia flanko. La Belga Ministro aldonis tamen, ke laŭ lia opinio, Germanujo havis iluziojn: Ĝi iras rekte al renkonto de milito kun Anglujo, kaj cetera la germanaj trupoj ne pasos Lieĝon tiel facile eble kiel ili kredas. Kaj ĉar la Ministro lasis diveni, ke eble li petus siajn pasportojn, S-ro von JAGOW protestis: « Ne foriru ankoraŭ. Eble ni havos ankoraŭ ion por interparoli ». Kio okazos nun, konkludis barono BEYENS, dependas nek de vi nek de mi, la belga registaro decidus ».

Ĉiu vorto en tiu grava ideinterŝanĝo pesas egale. Ni volas tamen atentigi nuntempe pri la klarigo de la trapaso tra Belgujo de la armeoj germanaj. La ŝtatssekretario havis la okazon ripeti ĝin dum interparolado, kiun li havis la saman tagon, kun la angla ambasadoro.

« Se Germanujo estas devigata agi tiel, estas ĉar ĝi devas alveni en Francujon per la plej mallonga kaj plej facila vojo, por agi la unua kaj provi gravan ekbaton kiel eble plej baldaŭ... »

Kaj dum alia interparolado kun la sama ambasadoro kelkajn horojn pli malfrue, la ŝtatssekretario resumis tiamaniere siajn argumentojn: « La senriskeco de la Imperio postulas absolute ke la Germanaj armeoj transiru Belgion ». (Blua libro, N° 160.)

Pri studo de nederlanda generalo PRINS, aperinta en la gazeto *Het Vaderland*, el Hago, en kiu la generalo diris, ke Belgujo, estis kulpata pro tio, ke studinte kun Anglujo iun defendmanieron en kazo de eventuala atako kontraŭ Belgujo, de Germanaj armeoj, pri Franca atako ĝi devus ankaŭ fari la samon. Antverpena advokato van OEKEL skribis al li leteron en kiu li petis la generalon, ke li diru precize, kion li pensas pri la neŭtraleco, por eviti la komentariojn de la germana kaj neŭtra gazetaro. Responde generalo PRINS skribis en l'*Echo Belge* leteron por precizi, kaj ni represas ĉi sube la analizon de ladirita letero: « Mi neniam intencis kontesti la rajton, kiun havas la neŭtroj, ĝenerale, kaj speciale Belgujo, sin prepari al defendo. Mi nur bedaŭris ke la armeo belga restis tiel longe neorganizita. Mi konsentis ke la atenco kontraŭ Belga neŭtraleco estis maljustaĵo kaŭzita de militneceso. Mi aldonis, ke de pluraj jaroj Germanujo montris tre fortajn signojn pri sia intenco trapasi Belgion, en kazo de milito kontraŭ Francujo, kaj sekve deklaris per tio, jam de longe, ke por ĝi, la traktato de 1839 havis nur la valoron de papera ĉifajo, kaj ke Belgujo mem estis konvinkita pri tio. »

La Komentarioj de la gazeto montras, ke la generalo ne havis la intencon aprobi la atencon, sed li konstatis fakton, kiun li kvalifikis « maljusta », kaj intencis nur montri ke Belgujo ne devis atendi de Germanujo la respekton de la traktato de 1839 (B. B. D., N° 73). Ni aludas

ekzemple, diris la gazeto, al la opinio esprimita de li, laŭ kiu Belgujo ne devus sole okupiĝi kun Anglujo pri la germana danĝero, sed ankaŭ pri la eventualeco de la atenco kontraŭ sia teritorio de Francujo. De 1870 kiam Anglujo rekonfirmis kun Francujo kaj Germanujo (Prusujo) la traktaton de 1839 kaj deklaris sin preta konsideri sin kiel devigata kontraŭstari, se bezone per forto, al atenco kontraŭ belga neŭtraleco, de tiu dato, la okazaĵoj, precipe la pligrandigo de la militaro en Germanujo kaj la kreo de pluraj strategiaj vojoj al okcidenta belga limo, fortigis pli kaj pli la opinion, ke de Germanujo venos la danĝero por la belga neŭtraleco...

« Estas do facile komprenebla ke, konstatinte la ĝenerale akceptitan opinion, kaj la fidon, bazitan sur la du traktatoj, en la helpo de Anglujo, la belga registaro interparolis kun Anglujo pri la eventualeco, versaĵna, de germana atako, sed ne pri la neverŝajna eventualeco de franca atako. »

La germanaj gazetoj, kiuj tiel ĝojis pri la antaŭe esprimita opinio de generalo PRINS, kaj de la nederlandaj gazetoj, neniel informis siajn legantojn pri la korektoj aperintaj en tiuj gazetoj, nek pri la letero de generalo PRINS en kiu li precizis siajn dirojn, nek pri la diroj de *Vaderland*.

Pri intervjuo de S-ro von JAGOW per l'*United-Press*, en Berlino, dum kiu li deklaris, ke Germanujo decidis invadi Belgion nur tial ke invado de Francaj armeoj minacis ĝin, kaj faris de tio demando pri vivo aŭ morto por Germanujo, la « *Bur. Doc. Belge* » citas leteron subskribitan de germana generalo nune militanta, kiu tute senvalorigis la asertojn de S-ro von JAGOW.

« La plano de invado en Francujon, li skribas, estas plano tute antaŭpreta (von vornherein festgelegt); ĝi estis farota per la nordo, tra Belgujo, ĉirkaŭirante tiel la potencan limfortikaĵojn, per kiuj la malamiko protektis sian limon kontraŭ Germanujo, kaj kiu, por esti venkata kostus multe da sango. La plano sukcesis en sia tuta amplekso, kiel tion pruvas la situacio de la diversaj armeoj. »

Tiu deklaro aperis subskribita de S-ro SPOUX, generalmajor en aktiveco, en artikolo titolita « la situacio en okcidento », aperinta en la Berlina gazeto « *Parole* » *Deutsche Krieger Zeitung*. — Post tia diro de milita aŭtoritatulo, je ne suspektinda epoko, ŝajnas malfacile, ke germana diplomato povu persisti en siaj diroj, ke Germanujo decidis la trapason de Belgujo, kiam ĝi malkovris la tujan atakon francan! Restos ankoraŭ io tamen, kiun povos diri S-ro von JAGOW: ke Germanujo, kiu neniam eraras, estis antaŭvidinta la estontan francan minacon. Tio simple signifos, ke Germanujo estis tiel detale preparinta la atencon kontraŭ Belgujo, ke ĝi eĉ estis preparinta ĝian pretekston. (B. D. A. N° 140, oktobro 1915.)



SEKCIO A.

# MANIFESTADO POR LA HONORO DE MISS EDITH CAVELL

*La dudekan de novembro 1915 okazis en Parizo, en la Palaco Trocadero, grandioza manifesto organizita de la Ligo de Homrajtoj por honori Miss CAVELL, la noblan patriotinon anglan, mortigitan de Germanoj en Belgujo en tiaj cirkonstancoj, kiuj indignigis ĉiujn civilizitajn popolojn.*

*Estis omaĝio simila al tiu kiun faris la antikvuloj en la gloraj tagoj de Grekujo por laŭdegi la memoron de la herooj kaj martiroj de la patrujo.*

*Ni donas ĉi sube du paroladojn, una de S<sup>o</sup> Ferdinand BUISSON, prezidanto de la Ligo de Homrajtoj, la duan de S<sup>o</sup> Paul PAINLEVÉ, ministro de la publika Instruo.*

## Parolado de S<sup>o</sup> Ferdinand BUISSON.

SINJORO MINISTRO,  
SINJORINOJ, SINJOROJ.

La franca ligo por la defendo de Rajtoj de homo kaj de civitano vin invitis fari publikan omaĝion al la memoro de virino, Kiu donis sian vivon por defendi mem, kiel ŝia koro ilin komprenis, la Rajtojn de homo kaj de civitano.

Mia rolo limiĝas je la rakonto de la faktoj. Mi tion faros sekvante laŭlinie la diplomaciajn dokumentojn eldonitajn de la angla registaro.

### *Vivo de miss CAVELL*

Miss Edith CAVELL estis angla malsanulistino. Per profesiiinklino ŝi estis malsanulistino; dum infaneco, ŝi revadis sin dediĉi al flegado de malsanuloj; junulino, ŝi faris el tiu revo realaĵon aŭsteran. Ŝi pasigis pli ol dudek jarojn en la hospitaloj. Post ĝisfundaj studoj ŝi estis fondinta, en Bruselo, grandan normalan instituton por malsanulistinoj, kiu rapide diskonigiĝis en la tuta Eŭropo.

Eksplozas la milito, Miss CAVELL, ĝuanta libertempon ĉe sia maljuna patrino apud Londono tuj revenas, opiniante ke oni ŝin bezonos, La instituto aliformiĝas en ambulanco; la direktistino refariĝas malsanulistino. Kaj depost unu jaro, sen interrompo de unu tago, ŝi malŝparis siajn rlegojn al ĉiunaciaj vunditoj, kiam iun vesperon, dum ŝi bandaĝis germanan soldaton, germanaj policistoj venis ŝin aresti ne eĉ permesante, ke ŝi finu la bandaĝadon. Oni ŝin akuzis, ke ŝi sukcesigis la forkuron de anglaj kaptitoj kaj faciligis al junaj Belgoj la transiron en Holandujon.

Post du monatoj en malliberejo kaj trudsilento ŝi sin prezentas antaŭ la milita juĝantaro kaj tiamaniere ke ŝia advokato povis nek vidi ŝin eĉ unu momenton, nek ekkoni la elementojn de la dokumentaro.

Al siaj juĝistoj Miss CAVELL deklaris kun plej granda kvieto ke efektive ŝi faris tiajn krimojn, ke ŝi klare antaŭvidis la sekvojn sed ke pli klare vidinte sian devon, ŝi tion faris.

Ŝi do ne sin senkulpigas. Ŝi petas nek pardonon, nek prokrastron, nek indulgon.

La milita juĝantaro kondamnas ŝin je la morto.

### *Por malebligi indulgon.*

Sed tiam restis malfermita pordo, tra kiu la germana malamo riskis vidi sian kaptajon forkuri. La imperiestro povis malpligrandigi la punon. Kaj estis sciate ke la ministro de Unuigitaj ŝtatoj, protektanto de anglaj ŝtatanoj, ĉion eblan faros por savi miss CAVELL; li petis nur al la Germana estraro, ke li estu informata pri la rezulto de la proceso sufiĉe frue por ke li povu klopodi. Estis do necese fari tiamaniere, ke li eksciis la juĝon nur post la ekzekuto.

### *Ili preskaŭ sukcesis.*

Okazis, oni ne scias pro kia kaŭzo, intertempo da tri tagoj inter la fermo de la debatoj kaj la eldiro de la verdikto. La amerika ministro S<sup>ro</sup> WITLOCK petas kaj ree petas informojn; oni lin trankviligas, la verdikto ne estas eldirita, estos eldirita sendube post unu aŭ du tagoj.

S<sup>ro</sup> WITLOCK havis konfidon al alia informfonto; li estis aparte admoninta la advokaton de miss CAVELL ke li plene informu la vic-ambasadorejon, horon post horo. Mirinte ke li ne vidas lin sabaton, li sendadas leteron post letero. Neniu respondo. Dimanĉon, sama silento, sama foresto. Lundon matene oni iras ĉe lin; li forestas, li forestos la tutan tagon.

Ĉe la vic-ambasadorejo, oni komprenas kaj atentegas.



Por ne perdi unu minuton, kio ajn okazos, oni redaktos noton, kiun oni portos al la generala guberniestro tuj kiam riceviĝos la sciigo.

Fine lundon vespere, post la oka, oni ekscias ĉe la vic-ambasadorejo, per privata fonto, ke la verdikto estas eldirita je la kvina kaj, pli grava afero, ke la milita estraro fiksas la ekzekuton je la nokto mem, je la dua matene.

### *Tragedia sceno.*

Vi prezentas al vi kiom angoriga estas tiu momento. Rapidege, S<sup>ro</sup> WITLOCK, kiu kuŝis en lito, grave malsana, skribas per sia mano tremanta, por ke oni aldonu ĝin al la oficiala noto, tiun ĉi bileton al barono von der LAUCKEN direktoro de la politikaj aferoj ĉe la generala registaro:

« Mia kara barono.

« Mi estas tro malsana por prezenti mem al vi mian postulon, sed mi alvokas al via kora nobleco por ke vi rekomendu kaj savu el la morto tiun malfeliĉan virinon, kompatu ŝin. »

La sekretario de la vic-ambasadorejo, S<sup>ro</sup> GIBSON kaj la leĝa konsilisto S<sup>ro</sup> de LEVAL kuras ĉe la ministron de Hispanujo, kiu tutkore por anstataŭi sian kolegon fariĝas lia estro.

Ili iras al la generala registaro, spite de ĉiuj malpermesoj trude eniras, devigas la baronon aŭdi ilin. La alta prusa oficisto unue iom arogantas: « Kiarajte vi certigas ne havante oficialan dokumenton, ke la verdikto estas eldirita? Pri tio vi nenion scias; tio estas malmulte verŝimila. Malpli verŝimile ankaŭ estas, ke la horo de la ekzekuto estas fiksita.

Ĉiukaze nenio estas farota antaŭ morgaŭ matene. » — « Kio nenio farota! eksaltas la diplomatoj. Sed morgaŭ matene, estos tro malfrue, se niaj informoj estas veraj. » — « He! Kiu donis al vi tiajn informojn? » — « Ne gravas. Vi havas rimedon tuj kontroli ilin. Telefonu nur al la Prezidanto de la milita juĝistaro kaj vi ricevos certigon. »

Malfacile estis rifuzi. Estas respondite, ke la du informoj estis ĝustaj.

Tiam inter tiuj homoj komenciĝas lasta batalo. Malmultaj pagoj tiel ŝiras koron kiel la rakonto de tiuj du horoj da petegoj senesperaj, kiuj rompiĝas kontraŭ kruelega instrukcio. Tie ĉi ne ĉeestas plu diplomatoj, kiuj argumentas sed homoj kies voĉo tremas, kies koro timebatas, kiuj kalkulas la minutojn ĝis la fatala horo, kiuj ne povante regi sian emocion trovas en ĝi esprimojn superbelajn, kun teruraj avertoj al Germanujo.

« La unuan fojon, ili diras, virino estas kondamnita je morto pro tia ago kaj ĝuste virino, kiu pasigis sian vivon en la mildigo de aliulaj suferoj, kiu ĝuste tiun ĉi jaron savis tiom da germanaj vivoj! Pro spionado oni virinojn jam ekzekutis. Tie ĉi ne estas afero pri spionado tion formale diras la akuzanto mem. Kaj poste fine kial tiel urĝas,

ke ŝi mortu tiun nokton? Se vi estas certaj ke nia pardonpostulo estos forĵetata, kial vi ne lasas ĝin alveni al la adresato? Se vi ne estas certaj ĉu vi do tiel senpacience estas plenfini la neripareblon? »

Ha! ĝis kia grado de forto atingis tiom da petegoj por ke fine la barono von der LAUCKEN konsentu iri demandi la militan registaron ĉu ĝia decido estas neŝanĝebla!

### *Tia ĝi estis.*

La guberniestro prenis sur sin malebligi ke eĉ la imperiestro povu interhelpi.

Dum plilongiĝis tiu lasta penado por ŝin savi, la kondamnitino, al kiu oni fine permesis ricevi la viziton de angla kapelpastro, pasigis kun li du horojn da pia enpeniĝo kaj nesprimebla sereneco. Ŝi rediradis al li kun la sama simpleco, kiel al siaj juĝistoj, ke ŝi perfekte sciis kion ŝi faras sed ke ŝi opiniis bona servi tiamaniere al la patrujo kaj al justeco. Ŝia lasta vorto estas tre inda je virino kaj je kristanino. « Mi faris mian devon por mia patrujo. Nun patriotismo ne estas ĉio. Tiel proksime de Dio kaj de eterneco, mi volas foriri ne malamante iun ajn. »

Oni venis dum la nokto eltiri ŝin el la malliberejo kaj konduki al la ekzekutloko. La germana kapelpastro, kiu apudestis ŝin en ŝiaj lastaj momentoj, deklaris nur: « Tiu virino mortis kiel heroino. »

### *Iu legendo tro bela*

Ĉu oni devas kredi je famo, kiu disvastiĝis la morgaŭan tagon?

Oni diris, ke la soldatoj de la ekzekuta duonroto, antaŭ virino sveninta ne povis decidiĝi pafi, kaj ke oficiro devis ludi rolon de ekzekutisto. Se tiu ribelo de konscienco okazus, ni estus feliĉaj pro tio por la honoro de homaro. Se estas nur legendo, ĝi esprimas tamen tion, kion revis la popola sento. La germana ministraro neis la verecon de la fakto, indigninte, ŝajnas, pro la suspekto ke dek soldatoj germanaj estis kapablaj konservi ion homan.

### *La krimo de « milita perfido »*

Kio ajn estas pri tio, la historio de tiu malsanulistino reliefigas meze de la krueleĝaĵoj de tiu milito, kiel simbola epizodo.

Estas batalo inter du etikoj. Unu estas reiro al la unu-tempa barbareco, kiun science perfektigis la prusa militista kasto; la dua respondanta al la aspiroj de plej noblaj homoj, jam la tagon antaŭ la ventego estis varbanta la popolan plejmulton, kaj estu certaj ke ĝi fariĝos la regulo de la homaro, kiam per la venko de justeco armita la Germana militarismo estos efektive neniiĝita.

Miss CAVELL estas kondamnita en la nomo de tiel dirita militrajto, kiun Germanoj kontraŭstarigas al la konvencioj de La Haye. Laŭ ilia diro lando neŭtrala invadita kaj dezertigita de unu el la garantantioj de ĝia neŭtraleco, se



ĝi firme volas rezisti al la invado faras gravegan krimon, krimon punindan per ekstermado. Se iu ŝtatano, se iu amiko de tiu ŝtato helpas eĉ nerekte, al tiu rezisto ne krimon ili faras sed perfidon. Germanoj fabrikis tiun vorton « militperfido » kun speciala intenco! Sekve, kiel sankcio, unu sola puno taŭgas, la puno de la perfiduloj: la morto.

Miss CAVELL konis la militan leĝaron.

Sed ŝi estis el tiuj, kiuj obstinas aserti ke rajto ne trudiĝas. Ŝi juĝis ke la belga popolo eĉ premegata restas rajthavanto, ke ĝi estas ĉiam viktimo de atenco. Ŝi povis lin kompari (ho, kia spiritnaiveco!) nur al vojaĝanto atakita de rabisto. Ŝi do decidis fari ĉion eblan, ŝi, senforta virino, por porti helpon al la viktimo. Ŝajnis al ŝi ke eĉ dum la milito, la homoj ne devas ĉesi esti homoj, ke ekzistas leĝoj superaj al militleĝoj kaj unue ekzistas rajto.

### *Unuiĝo de Francoj en protesto kaj en omaĝio,*

Niavice ni tie ĉi estas por protesti post ŝi en la nomo mem de la ideo de rajto. Tiu virino je klara spirito kaj kuraĝa koro ne nur obeis al sento de kompato (cetere kompato ankaŭ estas unu el la homrajtoj). Ŝi personigis la homan konsciencon, kiun forto ne obeigas, teruro ne fleksas. Ŝi sin oferis por forpreni nenion el idealo, kiu estos idealo de la homaro tiel longe kiam la homaro ne fieros, kiel Germanujo, esti fine liberiginta je ĉia sentimentaleco. La virino, kiu donis tian ekzemplon de neŝancelebla fido al rajto kaj al devo meritis, ke nia Ligo metu sin inter la mortintoj, kiuj instruas vivi. Sed ni ne volis, ke tiu manifestado por sin honori estu aŭ ŝajnu esti manifestado de aparta societo. Ni estas feliĉaj ĉeesti sur tiu ĉi estrado kun aliaj grupoj, kiuj en la nomo de malsamaj doktrinoj alportas la saman ateston de admiro al viktimo de grandanimeco.

Ni dankas pro ilia partopreno komuna kun ni, la riprezentantojn de ĉiuj respublikanaj partioj, de la ĵurnalaro, de tiel multaj asocioj de sindonemo al patrujo kaj al homaro, la anglajn kaj francajn ruĝajn krucojn, la nacian

konsilantaron de virinoj kaj fine tiun grandan komitaton de nacia helpo en kiu enkorpiĝas la sankta unuiĝo, kiun milito naskis, kiun pli kaj pli firmigas la milito mem.

Ni nin gratulas vidi meze de ni la riprezentantojn de la ligitaj landoj, kiuj tiel pravas la profundan konsenton de sia lando kun la nia.

Ni dankas S<sup>ro</sup> Prezidanton de la Respubliko, ke li volis sankcii de sia ĉeesto la omaĝion de la franca popolo al la memoro de virino, kulpaj je savado de pluraj el niaj soldatoj per la ofero de sia vivo.

Fine ni estas dankaj al registaro de la Respubliko, ke ĝi bonvolis, konsentinte prezidi tiun ĉi solenon, doni al ĝi la nacian karakteron, kiun ni deziris ke ĝi havu.

### *La ligo de Homrajtoj kaj la morgaŭa Eŭropo.*

Estis tempo, vi memoras pri ĝi, S<sup>ro</sup> Ministro, kiam nia ligo — vi jam estis ligano — similis je trupeto de ekstrema avangardio, kelkafoje tre aventurema, kelkafoje riskanta ne esti sekvata. Hodiaŭ la plejmulto el la militistaro nin reentrigis. Jen ni estas ĉe la koro de la nacio. La ligo de Homrajtoj hodiaŭ, se oni devas doni al ĝi ĝian veran nomon, ĝi estas Francujo mem, tiu Francujo, kiun vi montris antaŭ kelkaj tagoj « staranta kun glavo alte tenata post dek ses monatoj da milito, tiel fiera, tiel decida kiel en la unua tago, defendanta kun sia libereco la liberecon de la mondo. »

Lasu nin, S<sup>ro</sup> Ministro, ankoraŭ plilarĝigi tiun vizion. Super ĉiuj standardoj kunigantaj kun la standardo de Francujo en tiu krucmilitiro liberiga de la dudeka jarcento, ŝajnas, ke ni vidas flertantan tre alte iun pli larĝan, pli belegan standardon, kiun salutas fine konfide kaj respektplene, la monarĥaj landoj ligitaj al la Respubliko, tiun standardon mem sur kiu niaj prapatroj, antaŭigante la historion, enskribis la rajtojn de la homo, la rajton de la popoloj; tiun standardon, sur kiu oni legas la tri vortojn profetajn, estontan devizon de nacioj memregantaj de la Eŭropo nova: Libereco, Egaleco, Frateco de homoj kaj nacioj!

### *Parolado de S<sup>o</sup> Paul PAINLEVÉ.*

Meze de ruinaĵoj kaj funebroj, kiuj superas plej tragediajn imagaĵojn, per kia miraklo unu sola viktimo povas alecentrigi al si tiagrade, kompaton kaj amon de ĉiuj nacioj?

Germanujo elĉenigis morton sur la mondon. De la norda maro ĝis la Vosges, de la Balta maro ĝis Balkanoj, ĝi promenis ĉien siajn maŝinojn de mortigado, siajn sciencajn rimedojn de buĉado; ĝi starigis la krimon kiel staton konstantan kaj universalan. Pro ĝia faro, milionoj da soldatoj kuŝas por ĉiam falĉitaj en sia juneco kaj ĉiu granda urbo vidas trapasi en siaj stratoj tutan popolon da stumpigitoj suferantaj kaj fieraj. Ŝajnas, ke kompato ne povas

plu elekti inter tiom da viktimoj! Kion signifas efektive unu krimo pli, kiam tutaj nacioj, viroj, virinoj, infanoj estas piedpremataj, disŝirataj, kondamnitaj al ekstermigo? Kaj tamen legante la simplan rakonton de la ekzekuto de miss CAVELL la tuta mondo ekskuiĝis pro indigno kaj abomeno.

La kaŭzo estas, ke inter ĉiuj atencoj de tiu ĉi kruelega milito, tiu atenco estas la plej abomeninda farita kontraŭ homaro. La pedanta kaj policista malboneco de la prusa militarismo, ĝia severegeco bagatele zorgegema kaj malpardonema sin mem superis en tiu tago. Tia verdikto



estas la plej bruta, la plej aroganta provoko, kiun la justeco de soldatarado iam faris al la Justeco, sen ia aldiro. Se ekzistus homo nenion scianta pri la milito, sufiĉus rakonti al li proceson de miss CAVELL por ke li abomenu la germanan nomon.

Ĉiuj pligravigaj cirkonstancoj ŝajnas intence kunigitaj por igi pli abomenindega tiun mortigan proceduron: la malpasia kaj sangavida antaŭdecido, la persisto en krueleco, la enketo detalege zorga kaj sekreta por pli facile kondamni, la kaŝemo trompema kaj krima por formovi ĉiun pardonemon, por firme teni la viktimojn ĝis la lasta horo. Necese estas, ke ŝi mortu kaj ke ŝi mortu sen prokrasto. Neniam depost la tempo kiam la lorena virgino sin prezentis antaŭ la senhonora episkopo de *Beauvais*, neniam la suno lumigis pli funebre kruelean parodion de la justeco.

Kaj kia do estas la danĝera krimulino kontraŭ kiu hirt streĉiĝis tiu batalilaro de senkompata inkvizicio? Virino, kiu depost dudek jaroj sin dediĉis sen ripozo al mildigo de ĉiaj mizeroj; en Bruselo tremanta sub la boto de la konkirinto, ŝi flegis kun egala sindonemo malsanulojn kaj vunditojn de ĉiuj armeoj, venkitojn kaj venkintojn, invadintojn kaj invaditojn!

(La oratoro memorigas siavice la lastan frazon de miss CAVELL kaj poste li aldonas):

Germanujo ne sin kulpigis; Germanujo ne sin senkulpigis. Ĝiaj juristoj estas ankoraŭ nuntempe kritikaĉantaj pri la regularco de la proceduro. Ili certigas, ke ĉiuj ordonoj de la milita leĝaro estas respektitaj; tia estas ekzekutisto, kiu por malprigravigi sian respondecon resendas ĝin al la torturilo de li mem fabrikita.

Kaj ili ne komprenas, ke ĝuste la leĝeco de tiu mortigo igas ĝin abomena. Se miss CAVELL estus mortigita ĉe stratangulo de ebria brutulo, tio estus dolorplena sed ĉiutaga okazantaĵo. Sed ke ŝia proceso kaj ŝia ekzekuto estis konformaj al la germana justeco, ke tia krueleco estis laŭregula, jen kio estas netolerebla. Sinjoroj, kiom profunda estas la abismo, kiu malproksimigas nian animon for de la animo de popolo kapabla havi tian komprenon de la leĝo!

Tiel longe dum Germanujo ne sentos funde de si mem honton kaj konscienciproĉon pro tiu krimo, neniam paco estos ebla inter ĝi kaj la homaro. Eĉ se perforto kaj maljusteco — supozo ne realigebla kaj sensenca — superus justecon kaj rajton, ne estas homo, inda je la nomo de homo, kiu ne preferus venkita fali kun miss CAVELL ol triumfi kun ŝiaj mortigistoj.

Sed ne al la malvenko nur al la venko marŝas tiuj miloj da junuloj kiuj, la morgaŭan tagon de la tragedia verdikto, memvole soldatiĝis en la angla armeo, por postuli de la germana popolo kontentigon pri tiu mortigo. La virino, kiun ni solenas hodiaŭ ne devas montriĝi al ni kiel kortuŝanta figuro elegia kliniĝanta al suferantoj sed kiel instigantino al heroaj agoj. Ŝia mildeco ne devas forgesiĝi ŝian sentimecon. Ŝia vivo kaj ŝia morto instruas al ni ke por

defendi grandan ideon, oni neniam sufiĉe donis, kiam oni ne ĉion donis. Ili instruas al ni kompletan sinoferecon, konstantecon en la afliktaĵoj, certecon pri la venko kontraŭ la malbonaj fortoj, kiuj ankoraŭ turmentas la mondon. Ha! kiu do povus dubi pri tiu venko, kiam tie en Belgujo vundita, en la momento mem de la ekzekuto, la delikata heroino neniam dubis! Vane Germanujo streĉas ĝis parokismo sian organizadon de perforto kaj sian malgajan malhumilecon. La diaĵo barbara al kiu en sia sangplena deliro ĝi oferas sennombrajn holokaŭstojn, estas diaĵo de la forpasinta tempo, kiu jam en la nokton eniras. La masbuĉadoj, la brulegoj signas la agonion finan de ĝia kulto. Baldaŭ radia matenkreprusko ree leviĝos malantaŭ la sangaj fumoĵoj supren elirantaj el la konsumitaj urboj. Baldaŭ la la nacioj krucumitaj vidos la finon de siaj torturoj. La grandeco de ilia gloro mezuriĝos laŭ la grandeco de ilia malfeliĉo kaj de ilia stoikeco. Heroa Belgujo, nesleksebla Serbujo, kies rezisto admirigas de la tutmondo estos liberigitaj, restarigitaj en sian sendependecon politikan kaj ekonomian. Ili renaskiĝos pli vivemaj, pli prosperaj ol iam. Tiam promeson faris de supre de la tribuno antaŭ tri semajnoj la ĉefo de la franca registaro, tiam promeson faras la kvar grandaj nacioj kuniĝintaj por la libereco de la mondo kaj nevenkeblaj pro siaj neelĉerpeblaj ĉiuspecaj rimejoj. Ili sin malarmon nur kiam tiu promeso estos realigita.

Tiam en mondo repacigita, pli konforma al tiu, kiun revis tiu granda koro, la figuro de miss CAVELL reprenos sian unuan serenecon. Tial ke justeco estos triumfinta, tial ke barbareco estos venkita, ŝi lasos radia sian mildecon. Tiel ŝi revivos en la penso de la homoj kiel en la monumentoj eternigantaj ŝian memoron. Por ŝi ŝajnos skribita tiu verso de poeto: « Dormu, ho blanka viktimo, en nia animo profunda. »

La bruta forto kredinte ŝin faligi, al ŝi eternan vivon certigos.

« Ho morto, kie estas cia pikilo? ekkrias pensante al miss CAVELL la fama amerika skribisto Hall Caine, ho tombo, kie estas cia venko? » Vane ili pafmortigis la humilan malsanuliston, la humila malsanulistino de nun fariĝis plej nobla figuro en la homaro. Vane ili enterigis ŝian korpon en malgloran mortintejon de la malliberejo en Bruselo, ŝia neputrebbla animo sin forsavas el la tombo! Vane ili kredis, ke ili estingas tiun flamon, ĝi kuras neestingebla tra la mondo. Ho humila malsanulistino angla, ne venkita vi estas, sed kontraŭe venkinta por eterne. Vi de nun simbolo la legion de tiuj heroaj virinoj, kiuj en ambulancoj iras malŝparante sian sennoman sindonemon kaj silentan heroecon. Vi staras en la vicoj de tiuj senmortaj gardistinoj de la homa idealo, kies nomo transdoniĝas de tempaĝo al tempaĝo. En tiu grandioza memorigo; kiu antaŭiras la historion, antaŭ la franca popolo amase alkurinta por vin soleni, ni vin salutas, kiel la anoncinton de pli bona homaro kaj de Rajto triumfanta.



SERIO A.

## PAROLOJ DE PREZIDANTO WOODROW WILSON AL LA KONGRESO

2-an de Aprilo 1917.

### SINJOROJ KONGRESANOJ,

Mi kunvokis la kongreson al eksterordinara kunsido tial, ke seriozaj, tre seriozaj politikaj decidoj estas elektotaj, kaj elektotaj tuje, pri kiuj respondecon preni sur min nek rajto nek konstitucio permesas.

Je la tria de lasta februaro mi oficiale metis antaŭ vin la strangan deklaron de la Germana Imperia Registaro, ke, depost la unua tago de Februaro, estas ĝia intenco malŝati ĉiujn leĝajn aŭ humanajn limigojn kaj uzi siajn submarajn boatojn por dronigi ĉiun ŝipon provantan alproksimiĝi al la havenoj de Granda-Britujo kaj Irlando aŭ al la okcidentaj marbordoj de Eŭropo aŭ al iu ajn el la havenoj kontrolotaj de la malamiko de Germanujo en la Mediteraneo. Tio ja ŝajnis esti jam la celo de la germana submara militado pli frue, sed depost Aprilo de la lasta jaro la Imperia Registaro iom limigis la agadon de la komandantoj de siaj submaraj ŝipoj konforme al la promeso tiam donita al ni, ke pasaĝeraj ŝipoj ne estos dronigitaj kaj ke sufiĉa averto estos donata al ĉiuj aliaj ŝipoj, kiujn la submaraj boatoj estos detruontaj, se neniu kontraŭstaro estos farata aŭ forkuro provata, kaj ke plie estos prizorgate, ke iliaj ŝipanoj havu almenaŭ favoran ŝancon por savi sian vivon sur siaj barkoj. La faritaj aŭtaŭzorgoj estis nesufiĉaj kaj iom malcertaj, kiel estis montrate per dolorigaj ekzemploj okazintaj dum tiu kruela kaj nehumana farmaniero; tamen iometa sinlimigo estis observata. La nova agmaniero forigis ĉian limigon. Ŝipoj ĉiuspecaj, kia ajn estis ilia flago, ilia karaktero, ilia ŝarĝo, ilia vojcelo, ilia komiso, estis senindulge dronigitaj sen ia averto kaj sen ia helpa aŭ kompata penso al la ŝipanoj, ĉu tiuj ŝipoj apartenas al amikaj neŭtraluloj aŭ al militantoj. Eĉ hospitalaj ŝipoj, kaj ŝipoj portantaj helpon al la kruele mizera kaj turmentata popolo de Belgujo, kvankam tiuj ĉi ŝipoj ricevis de la Germana Registaro mem paspermeson por trapasi la malpermesitajn regionojn kaj estis distingeblaj per klaraj signoj de identeco, estis dronigitaj kun la sama senkonsidera manko de kompato kaj malrespekto al la principoj.

Mi ne povis dum kelka tempo kredi, ke tiaj faroj estas efektive farataj de iu ajn registaro, kiu estis ĝis nun konsentiinta pri la humanaj agmanieroj de civilizitaj nacioj. La internacia Juro tiris sian originon el la provo por starigi leĝaron, kiu estos respektata kaj observata sur la maroj, kie neniu nacio havis la rajton de mastrado kaj kie kuŝis la liberaj ĉefvojoj de la mondo. Penige iom post iom tiu leĝaro estis konstruata, kun iom nesufiĉaj rezultoj, kvankam ĉio farebla estis farita, sed ĉiam almenaŭ kun klara vido de tio, kion la koro kaj konscienco de la homaro postulas. Tiun ĉi minimumon da justeco la Germana Registaro forbalais, pretekstante revenĝon kaj neceson kaj mankon de iu alia batalilo, kiun ĝi povus uzi surmare, krom tiun ĉi, kiun estas necble uzi tiel, kiel ĝi uzas, ne forĵetante ĉiujn skrupulojn pri humaneco aŭ pri respekto al la interkonsentoj, kiuj estas rigardataj kiel la bazo de la interrilatoj en la mondo. Mi ne pensas nun pri la perdo de havaĵoj rezultanta el tiu agmaniero, kvankam ĝi estas grandega kaj serioza, sed nur pri la malkonscienco kaj amasa detruado de vivoj de nemilitantaj viroj, virinoj kaj infanoj, sinokupantaj je aferoj, kiuj estis ĉiam, eĉ en la plej malhelaj periodoj de moderna historio, konsiderataj kiel senkulpaj kaj laŭleĝaj. Havaĵoj estas kompanseblaj; vivoj de pacaj kaj senkulpaj homoj estas nekompanseblaj. La nuna germana submara militado kontraŭ komerco estas militado kontraŭ homaro. Ĝi estas milito kontraŭ ĉiujn naciojn. Usonaj ŝipoj estis dronigitaj, Usonaj vivoj detruitaj laŭ manieroj, pri kiuj la ekscio incitis nin tre profunde; sed ŝipoj kaj homoj de aliaj neŭtralaj kaj amikaj nacioj estis sammaniere dronigitaj kaj subakvigitaj. Estis nenia distingo. La batalinvito trafas la tutan homaron. Ĉiu nacio devas decidi por si mem, kiel ĝi respondos al tio.

La elekto, kiun ni faros, devas esti farata kun pripensa modereco kaj trankvila prudento, kiu konvenas al nia karaktero kaj al niaj naciaj celoj. Ni devas formeti ĉian ekscititan senton. Nia agmotivo ne estos revenĝo nek venka certigo pri la materia potenco de la nacio, sed nur la defendo de rajto, de homa rajto, pro kiu ni estas nur probatalantoj.



Kiam mi alparolis la Kongreson je la dudek-sesa de lasta Februaro, mi konjektis, ke sufiĉos defendi niajn neŭtralajn rajtojn armante niajn komercajn ŝipojn, defendi kontraŭ neleĝa malhelpo nian rajton pri uzado de la maroj, defendi nian rajton protekti nian popolon kontraŭ neleĝa perforto. Sed estas nun evidente, ke armita neŭtraleco estas nepraktikebla. Submaraj boatoj estas fakte eksterleĝaj, se ili estas uzataj tiel, kiel la germanaj submarboatoj estas uzitaj kontraŭ la komerca ŝiparo. Estas efektive neeble defendi ŝipojn kontraŭ iliaj atakoj, ĉar la internacia leĝo supozis, ke komercaj ŝipoj defendos sin nur kontraŭ kaperŝipoj aŭ krozŝipoj aŭ aliaj videblaj ŝipoj persekutantaj sur la supraĵo de la maro. Sekve en tiaj cirkonstancoj plej simpla prudento, eĉ plej nepre neceso postulas, ke ni penu por detrui ilin antaŭ ol ili montris sian intencon. Ili devas nepre esti atakataj tuj post unua ekvido. La Germana Registaro, eĉ pri defendo de rajtoj, kiujn neniu moderna publicisto iam pridiskutis, tute rifuzas la rajton de neŭtraluloj uzi iun ajn batalilon en la regionoj de la maro, kiujn ĝi malpermesis. Averte estas komunikita, ke la armitaj gardistoj, kiujn ni metis sur niajn komercajn ŝipojn, estos traktataj kiel eksterleĝuloj kaj konsiderataj kvazaŭ marrabistoj. Armita neŭtraleco estas iom senefika eĉ en plej favoraj cirkonstancoj; en tiaj cirkonstancoj kaj ĉe tiaj pretendoj ĝi estas tute malutila: ĝi verŝajne nur ebligas tion, kion ĝi estis intencinta malebligi; estas fakte certe, ke ĝi entiros nin en la militon sen la rajtoj kaj sen la efikeco de militantoj. Estas unu elekto, kiun ni ne povas fari, kiun ni estas nekapablaj fari: ni ne elektos la vojon de submetiĝo kaj ni ne permesos, ke niaj plej sanktaj popolaj rajtoj estu ignorataj aŭ malrespektataj. La maljustaĵoj, kontraŭ kiuj ni nun militpretigas nin, ne estas ordinaraj maljustaĵoj: ili trafas la radikojn mem de la homa vivo.

Kun profunda sento pri la solena kaj eĉ tragedia karaktero de la ekpaŝo, kiun mi nun faras, kaj pri gravaj respondecoj, kiujn ĝi envolvas, sed kun neŝanceliĝa obeemo al tio, kion mi konsideras kiel mian konstitucion devon, mi konsilas, ke la Kongreso deklaru, ke la lasttempa agmaniero de la Germana Imperia Registaro estas fakte nenio alia ol milito kontraŭ la registaro kaj popolo de la Unuigitaj Ŝtatoj; ke la Kongreso plene akceptu la staton de militanto, kiu estas tiel altrudita al ĝi, tuj faru aranĝojn ne nur por meti la landon en pli perfektan staton de defendo, sed ankaŭ por utiligi ĝian tutan forton kaj uzi ĉiujn ĝiajn rimedojn por devigi la registaron de la Germana Imperio kapitulaci kaj fini la militon.

Tio, kion tio ĉi konsekvence postulos, estas klara: tio ĉi postulos la plej praktikan kunlaboradon en planoj kaj farado kun la registaroj nun militantaj kontraŭ Germanujo, kaj sekve la liveradon al tiuj registaroj de plej malavaraĵoj financaj kreditoj, por ke niaj rimedoj povu

tiom, kiom eble, aldoniĝi al la iliaj. Tio ĉi postulos la organizadon kaj mobilizadon de ĉiuj materiaj rimedoj en la lando por provizi la militajn materialojn kaj servi al la eventualaj bezonoj de la nacio laŭ la plej malmanka kaj tamen plej eble ekonomia kaj efika maniero. Tio ĉi postulos la tujan plenan ĉiamanieran ekipon de la militŝiparo kaj precipe ĝian provizadon per plej bonaj rimedoj por kontraŭbatali la malamikajn submarboatojn. Tio ĉi postulos, ke ni tuj aldonu al la kvanto de la Usonaj armeoj jam difinita de la leĝo en okazo de milito, almenaŭ kvincent mil virojn, kiuj estu, laŭ mia opinio, elektataj laŭ la principo de universala devo pri militservado, kaj ankaŭ la permeson pri postaj egalaj aldonaj pligrandigoj, tiel baldaŭ, kiel ili estos bezonataj kaj povos esti pretigataj. Tio ĉi postulos ankaŭ kompreneble la konsenton pri sufiĉaj kreditoj al la Registaro, kiuj estos espereble tiom, kiom estos juste, subtenotaj de la nuna generacio per taŭge pripensita impostado.

Mi diras, ke ili estu subtenotaj tiom, kiom estos juste, per impostado, ĉar ŝajnas al mi, ke estus plej neprudente bazi la kreditojn, kiuj estos nun necesaj, nur sur la prunteprenotan monon. Estas nia devo, pri kiu mi plej respektive insistas, protekti nian popolon tiel longe, kiel ni povos, kontraŭ la tre seriozaj malfacilaĵoj kaj malbonaĵoj, kiuj verŝajne estiĝus el trograndigita kredito kaŭzata de grandegaj pruntoj.

Efektivigante la rimedojn, per kiuj tiuj ĉi aferoj estas atingotaj, ni konstante memoru, ke estas saĝe, ke nia propra preparado kaj la ekipo de niaj propraj militaj fortoj ĝenu tiel malmulte, kiel eble, la devon, kiu estas tre praktika devo, provizadi la naciojn jam militantajn kontraŭ Germanujo je la materialoj, kiujn ili povas ricevi nur de ni aŭ per nia helpo. Ili staras sur la batalkampo kaj ni devas helpi ilin ĉiumaniere por ke ilia agado estu efika.

Mi permesos al mi proponi, pere de la diversaj fakoj de la Registaro, al la esploro de viaj komitatoj rimedojn por atingi de la diversaj celoj, pri kiuj mi parolis. Mi esperas, ke estos via plaĉo rigardi ilin kiel projektojn jam tre zorge pripensitajn de la registara fako, kiu estos plej rekte responda pri kondukado de la milito kaj protektado de la nacio.

Farante tiujn ĉi aferojn, tiujn ĉi tre gravegajn aferojn, ni komprenu tre klare kaj klarigu al la tuta mondo, kiuj estas niaj motivoj kaj celoj. Mia propra penso ne estis forklinita de sia kutima kaj normala vojo per la malfeliĉaj okazaĵoj de la lastaj du monatoj, kaj mi ne kredas, ke la penso de la nacio estas alligita aŭ nebuligita per ili. Mi havas nun en la spirito ĝuste la samajn pensojn, kiujn mi havis, kiam mi alparolis la Senaton je la dudek-dua de Januaro lasta, la samajn, kiujn mi havis, kiam mi alparolis la Kongreson je la tria kaj je la dudek-sesa de Februaro. Nia nuna celo, same kiel la tiama, estas



defendi la principojn de paco kaj justeco en la vivo de la mondo kontraŭ egoista kaj aŭtokrata potenco kaj starigi inter la efektive liberaj kaj memregantaj popoloj de la mondo ian akordon pri celo kaj agadoj, kiu de nun garantios la ĉiaman observadon de tiuj principoj. Neŭtraleco ne estas plu praktikebla nek dezirinda se la paco en la mondo kaj la libereco de la popoloj estas minacataj kaj se la minaco al tiu paco kaj libereco troviĝas en la ekzisto de aŭtokrataj registaroj apogataj per organizita soldataro, kiu estas kontrolata nur de ilia volo, ne de la volo de ilia popolo. Ni estas spertintaj, ke en tiaj cirkonstancoj la neŭtraleco ekstermiĝas. Ni staras ĉe la komenco de epoko, dum kiu oni insistos por ke la samaj principoj pri konduto kaj pri respondeco pro farita maljustaĵo estu observataj inter la nacioj kaj la registaroj tute egale, kiel inter la individuaj regnantoj de civilizitaj regnoj.

Ni havas nenian malpacon kontraŭ la Germanoj. Ni havas nenian alian senton al ili krom tiu de simpatio kaj amikeco. Ne pro ilia instigo la Germana Registaro iniciatis tiun ĉi militon; ĝi agis sen ilia antaŭscio aŭ aprobo; ĝi decidis la militon tiel, kiel en la malnovaj malfeliĉaj tempoj, kiam la popoloj estis en neniun lando konsultataj de siaj regantoj, kiam militoj estis instigataj kaj daŭrigataj pro profito de dinastioj aŭ de malgrandaj grupoj da ambiciaj homoj, kiuj kutimis uzi siajn kunhomojn kiel ŝaksoldatojn kaj ilojn. Memregaj nacioj ne plenigas la najbarajn regnojn je spionoj nek plektas intrigaron por estigi iun krizan staton de aferoj, kiu havigos al ili okazon por ataki kaj fari militakirojn. Tiaj planoj povas esti sukcese efektivigataj nur kaŝe kaj nur se neniun en la regno havas la rajton fari demandojn. Ruze aranĝitaj planoj por trompo aŭ atako, iafaje konservataj de generacio al generacio, povas esti preparataj kaj resti kaŝataj nur en la sekreteco de kortegoj aŭ sub ŝirmo de la diskreteco de iu malvasta kaj privilegiita klaso, zorge gardanta la konfidenciojn. Feliĉe tiaj artifikoj estas neeblaj en la landoj, kie publika opinio regas kaj insiste postulas plenan informadon pri ĉiuj naciaj aferoj.

Firma interkonsento por paco neniam estas konservebla krom per societigo de demokrataj nacioj. Al neniun aŭtokrata registaro oni povus fidi, ke ĝi konservos la fidelecon aŭ observos la interkonsentojn. Tiu societigo devas esti interligo de honoro, unuiĝo de opinioj. Intrigo forkonsumus ĝiajn esencaĵojn; la komplotoj de iuj enestantaj grupoj, kiuj povas projekti, kion ili volas, ŝuldante prirespondon al neniun, estus putrado lokita en ĝia kerno mem. Nur liberaj popoloj povas firme gardi sian intencon kaj sian honoron celante al komuna celo kaj preferi la utilojn de la homaro ol iun ajn nenoblan propran utilon.

Ĉu ĉiu Usonano ne sentas, ke iu garantio estas aldonita al nia espero pri la estonta tutmonda paco per la mirindaj

kaj kuraĝigaj aferoj, kiuj estas okazintaj dum la lastaj semajnoj en Rusujo? Rusujo estis konata de tiuj, kiuj konis ĝin plej bone, kiel estinta fakte ĉiam demokratia en la kerno, en ĉiuj esencaj kutimoj de sia penso, en ĉiuj intimaj interrilatoj de siaj regnantoj, en ĉiuj aferoj, kiuj montris ilian naturan instinkton, ilian ordinaran sintendadon koncerne la vivon. La aŭtokratio, kiu kronis la supron de ĝia politika konstruo, malgraŭ la longdaŭra kaj terura realeco de sia povo, ne estis fakte Rusa laŭ deveno, karaktero, nek celo, kaj nun ĝi estas forskuita kaj la granda, nobla Rusa popolo aliĝis kun sia tuta denaska majesto kaj potenco al la fortoj, kiuj estas batalantaj por libereco en la mondo, por justeco, por paco. Jen estas plia societano por Ligo de honoro.

Unu el la aferoj, kiuj servis por konvinki nin, ke la Prusa aŭtokratio ne estis kaj neniam povos esti nia amiko, estas tio, ke tuj de la komenco de la nuna milito ĝi plenigis niajn konfidemajn komunumojn kaj eĉ niajn registarajn oficejojn je spionoj kaj komplotis ĉie krimajn intrigojn kontraŭ nia nacia unueco de celo, nia interna kaj ekstera paco, nia industrio kaj komercio. Efektive estas nun evidente, ke ĝiaj spionoj troviĝis ĉi tie eĉ antaŭ kiam la milito komenciĝis; kaj bedaŭrinde estas ne konjektaĵo sed fakto pruvita en niaj juĝistaj kortumoj, ke la intrigoj, kiuj pli ol unu fojon apenaŭ ne rompis la pacon kaj apenaŭ ne difektegis la industriojn de la lando, estis kondukataj laŭ la instigo, per la subteno kaj eĉ per la propra direkto de oficialaj agentoj de la Imperia Registaro alkreditigitaj al la Registaro de la Unuigitaj Ŝtatoj. Eĉ penante por bridi kaj ekstermi tiujn ĉi farojn, ni provis doni la plej eble noblan interpretadon pri ili tial, ke ni sciis, ke ili devenas, ne el iu malamika sento aŭ intenco de la Germana popolo kontraŭ ni, ĉar ĝi sendube tiom nescianta pri ili estis, kiom ni mem, sed el la egoismaj celoj de la Germana Registaro, kiu faris tion, kio plaĉis al ĝi, sciigante sian popolon pri nenio. Sed tiuj faroj kunefikis por fine konvinki nin, ke tiu Registaro ne havas veran amikecon al ni kaj intencas agi kontraŭ nia kvieteco kaj sendanĝereco laŭ sia plaĉo. Ke ĝi intencas inciti malamikojn kontraŭ ni ĉe la sojlo mem de nia lando, la dumvoje kaptita noto al la Germana reprezentanto en Meksiko estas evidenta pruvo.

Ni akceptas tiun ĉi malamike intencitan batalinviton, ĉar ni scias, ke tia registaro, uzanta tiajn metodojn, neniam povos amikiĝi kun ni, kaj ke dum la ekzisto de ĝia organizita povo, ĉiam insidanta por plenumi iajn nesciatajn de ni projektojn, ne povas ekzisti garantiita sendanĝereco por la demokratiaj registaroj en la mondo. Ni estas akceptontaj la batalinviton por batali kontraŭ tiu ĉi laŭnatura malamiko de libereco kaj ni uzos, se necese, a tutan forton de la nacio por bridi kaj nuligi ĝiajn pretendojn kaj ĝian povon. Ni estas kontentaj vidante nun la faktojn sen iu ĉirkaŭanta vualo de malvera preteksto,



tiamaniere batalantaj por la fina tutmonda paco kaj por la liberigo de ĉiuj popoloj, enkalkulante la Germanan popolon, por la rajtoj de la grandaj kaj malgrandaj nacioj, kaj fine por ke la ĉieaj homoj povu elekti sian vojon kaj obeon. La Demokratio devas estis sendanĝerigita kaj asekurita en la tuta mondo. Ĝia kvieteco devas esti bazita sur la spertitaj fundamentoj de politika libereco. Ni havas nenian profitemajn celojn. Ni deziras nenion militakiron, nenion superestrecon. Ni petas nenion kompenson por ni mem, nenion materian kompenson por la oferoj, kiujn ni volonte faros. Ni estas nur unu el la probatalantoj por la rajtoj de la homaro. Ni estos kontentigitaj kiam tiuj rajtoj estos tiom asekuritaj, kiom eble, per la honesteco kaj la libereco de la nacioj.

Ĝuste tial, ke ni batalas sen venĝemo kaj sen egoisma celo, petante nenion por ni mem, sed dezirante nur kunlabori kun ĉiuj liberaj popoloj, ni kondukos, mi estas certa pri tio, niajn agmanierojn kiel militantoj sen pasio kaj ni mem sekvos severe kaj akuratege la principojn de justeco kaj lojaleco por kiuj ni pretendas batali.

Mi diris nenion pri la Registaroj kunligitaj kun la Germana Imperia Registaro ĉar ili ne militis kontraŭ ni nek incitis nin al defendo de nia rajto kaj de nia honoro. Estas vero, ke la Aŭstra-Hungara Registaro konfesis sian senkondiĉan akcepton kaj aprobon pri la senkonsidera kaj kontraŭleĝa submaro militado uzata nun senmaske de la Germana Imperia Registaro, kaj tial estis neeble por nia registaro akcepti grafon Tarnowski, lastatempe senditan kiel ambasadoron de la Imperia kaj Reĝa Registaro de Aŭstrio-Hungarujo : sed fakte tiu ĉi registaro ne batalis kontraŭ regnantoj de la Unuigitaj Ŝtatoj sur la maroj, kaj mi permesas al mi, almenaŭ por la nuntempo, prokrasti la diskuton pri niaj rilatoj kun la Viena Registaro. Ni eniras tiun ĉi militon nur estante nedisputeble enrudataj en ĝin, ĉar ekzistas nenioj aliaj rimedoj por defendi niajn rajtojn.

Tial estas pli facile por ni konduki kiel militantoj laŭ alta spirito de justeco kaj senpartieco, ĉar ni agas sen inciteco, nek kun malamikemo al iu popolo nek kun deziro kaŭzi malutilon aŭ difekton al ĝi, sed ni nur kontraŭstaras arme kontraŭ senrespondeca registaro, kiu, forĵetante ĉiujn konsiderojn pri humaneco aŭ justeco, freneze

deliras. Ni estas, mi ripetu, sinceraj amikoj de la Germana popolo kaj deziros nenion tiel fervore, kiel la baldaŭan restarigon de intimaj rilatoj por reciproka utilo inter ni, kvankam en la nuna tempo ĝi malfacile povas kredi, ke ni tion tutkore diras. Ni toleris ĝian nunan registaron dum ĉiuj tiuj maldolĉaj monatoj nur pro tiu amikeco, kaj ni montris paciencon kaj indulgon, kiuj alikondiĉe estus neblaj. Ni feliĉe ankoraŭ havos okazon por pruvi tiun amikecon per nia ĉiutaga sinteniĝo kaj farado rilate la milionojn da viroj kaj virinoj naskiĝe Germanaj kaj denaske simpatiaj al Germanujo, kiuj loĝas inter ni kaj partoprenas nian vivon, kaj ni estos fieraj pruvi ĝin rilate ĉiujn, kiuj estas fakte lojalaj al siaj kunvivantoj kaj al la registaro en la malfeliĉa tempo. El ili plej multaj estas tiel egale fidelaj kaj lojalaj Usonanoj, kvazaŭ ili neniam konus iun alian ligigon de fideleco kaj lojaleco. Ili fervore helpas al ni por riproĉi kaj reteni la malmultajn, kiuj povus havi alian spiriton kaj intencon. Se okazos mallojaleco, ĝi estos traktata per firma kaj severa subpremo; sed, se ĝi iel levos sian kapon, ĝi levos ĝin nur dise, estante malaprobata de ĉiuj, krom de senleĝaj kaj malica malmulto.

Dolorigan kaj korpremegan devon, Sinjoroj Kongresanoj, mi plenumis, parolante tiel al vi. Estas atendeblaj multaj monatoj de severa suferado kaj sinofero. Terura afero estas konduki tiun ĉi grandan paceman popolon en militon, en la plej timegigan kaj ruinigan el ĉiuj militoj, pro kiu la civilizacio mem ŝajnas esti riskata. Sed justeco estas pli altvalora ol paco, kaj ni batalos por la aferoj, kiuj estis ĉiam plej proksimaj je niaj [koroj, por demokratio, por ke tiuj, kiuj submetiĝas al aŭtoritato, havu rajton de voĉo pri propra regado, por la rajtoj kaj liberecoj de malgrandaj nacioj, por ke la justeco regu universale per interkonsento de liberaj popoloj; kiu alportos pacon kaj sendanĝerecon al ĉiuj nacioj kaj faros fine la tutan mondon libera. Al tia tasko ni povas dediĉi niajn vivojn kaj niajn trezorojn, ĉion, kio ni estas, ĉion, kion ni posedas, kun la fiero de homoj, kiuj scias, ke la tago estas nun veninta, kiam Usono povas privilegiite foruzi sian sangon kaj sian povon por la principoj, kiuj naskis ĝin kaj donis al ĝi la feliĉon kaj pacon, kiujn ĝi gardis kiel trezorojn. Dio helpas nin; ni povas fari nenion alian.



SEKCIO B: MALRESPEKTOJ AL LA LEĜOJ DE LA POPOLRAJTO.

## KIAN PACON POSTULAS LA GERMANOJ

La plej bona rimedo por konservi, ĉe la animomalkvieto de la nuna horo, la firman paciencon, kiu certigos la venkon, estas prezenti al ni tute ĝuste tion, kio fariĝus el ni, se Germanujo venkus.

Nu, la 9-an de decembro 1915, iu germana socialista deputato demandis la imperian kancelieron pri kiaj kondiĉoj la imperia registaro farus la pacon. La kanceliero respondis per malklaraj paroloj; sed iu deputato, apartenanta al la plimulto, S-o Spahn, deklaris, ke la paco estos certigi « per ĉiuj rimedoj, eĉ per la necesaj teritoriaj akiroj, ĉiujn militajn, ekonomiajn kaj politikajn utilojn de Germanujo en ilia tuta amplekso ». Post tiuj paroloj, diras la germanaj gazetoj, « ektondris la aplaŭdoj ». S-o Spahn efektive esprimis la volon de Germanujo. Tiun volon ni konas per paroloj de imperiestro Vilhelmo, per skribaĵoj de ŝtatestroj, de filozofoj, de historiistoj, de scienculoj; sed nenie ĝi aperas pli klare ol en raporto prezentita al la imperia kanceliero de la ses grandaj industriaj kaj terkulturaj societoj de la imperio, *Ligo de terkulturistoj, Ligo de germanaj kamparanoj, Provizora Grupiĝo de Kristanaj germanaj kamparanaj Societoj, Centra Unuiĝo de Germanaj industriistoj, Ligo de la industriistoj, Unuiĝo de la mezaj klasoj*. En la sama momento, kiam estis publikigata tiu raporto kiu devis resti sekreta kaj, pro tio, parolas kun senhonta nekaŝemo, aperis deklaro subskribita de eminentaj Germanoj, kies plimulto estas profesoroj. Tiu deklaro konfirmas la raporton. Vidu ni do kion enhavas tiuj du pecoj. GRAVEGE ESTAS, KE ĈIUJ FRANCOJ PRI TIO SCIĜU KAJ TION KOMPRENU.

### I. Kiamaniere rezonas la Germanoj.

Unue, necese estas admiri la simplecon de ilia jena rezonado: Germanujo estis, antaŭ duonjarcento, precipe terkultura lando; ĝi fariĝis lando precipe industria; NU, necese estas por la bonfarto de iu ajn regno, ke ĝusta egalpezo stariĝu inter ambaŭ tiuj produktadoj: DO Germanujo bezonas plifortigi sian terkulturan bazon. Por plifortigi sian terkulturan bazon, Germanujo devas

havigi al si la laborkampon por germana grand-ampleksa koloniigado; NU la laborkampo por tiu plivastigo estas nepre antaŭsignita: ĝi kuŝas oriente, en la rusa ebenaĵo; DO Germanujo devos havigi al si kulturteritoriojn en la rusa lando. La plivastigo de la terkultura bazo ebligos novan industrian antaŭenpaŝon; sed Germanujo bezonos fariĝi pli riĉa, ol ĝi estas hodiaŭ, je ferminaĵo kaj terkarbo; NU tiuj ĉi materialoj troviĝas okcidente, en la distrikto de Briey, kiu apartenas al departemento Meurthe-et-Moselle, kaj en niaj departementoj Nord kaj Pas-de-Calais, kaj en Belgujo; DO oni devas aneksi la regionon de Briey, kaj la karboteritoriojn de departementoj Nord kaj Pas-de-Calais, kaj Belgion.

Restas decidota la sorto de la loĝantaro en la aneksotaj landoj: Ĉiuj rimedoj por ekonomia potenco ekzistantaj sur la aneksotaj teritorioj, enkalkulante la grandajn kaj mezgrandajn bienojn, transiĝos al germanaj posedantoj. Tio signifas, ke la tuta industrio (krom eble tiu de la malgrandaj hejmaj metioj), kaj la tuta terkulturo (krom la malgranda, bieneta terkulturo), fariĝos germana posedaĵo. La Germanoj opinias, ke estas juste, ke la senposedigitaj posedantoj ricevu monkompenson. Sed kiu pagos ĝin? Jen la respondo: Francujo monkompensas la posedantojn kaj rifuĝakceptos ilin.

Tiu tiel serene senhontega rezonado mirigus nin, se ni ĝin jam ne konus. Efektive ĝi estas ĝuste la rezono de la rabistoj, kiuj, filozofe rezonante pri siaj krimoj same kiel Bonnot kaj liaj amikoj, postulas la rajton « vivi sian vivon », alivorte kontentigi siajn bezonojn, siajn inklinojn, pri kiuj ili pretendas mem solaj juĝi. Kontraŭ la leĝoj, kiujn ili malaprobas, kiel ĝenantaĵojn, ili uzas ŝtelon kaj krimmortigon kaj gloras sin pri tio. Germanujo ankaŭ volas vivi sian vivon laŭ sia plaĉo; ĝi starigas liston de siaj bezonoj: mi bezonas tion ĉi oriente kaj ankaŭ tion okcidente. Ĝi sentas sin malkomforte en Eŭropo kaj la mondo tiaj, kiaj ili hodiaŭ estas. Por fari tie lokon al si laŭ sia plaĉo, ĝi uzas la militon, kiu estas por ĝi la granda glora kaj sankta tasko. Ĉu tio ne estas nekredebla, ke inter la subskribintoj de la raporto troviĝas la Gru-



*piĝo de Kristanaj germanlandaj Societoj*, kaj ke inter la subskribintoj de la deklaro troviĝas S-<sup>o</sup> Seeberg, *profesoro pri teologio* en Berlino! Notinda detalo por kiu entreprenus difini la germanan kristanecon kaj la animon de la malnova dio de imperiestro Wilhelmo.

## II. Ili volas dismembrigon kaj ruinigon de Francujo.

Tiu raporto kaj tiu deklaro celas precipe Francujon kaj Belgujon. La Germanoj ne esperas, ke ili povos ekstermi Rusujon; ili volas repuŝi ĝin pli malantaŭen. Ili ne esperas, ke ili povos ekstermi Anglujon; ili volas nur forpreni de ĝi la marsuperregecon kaj antaŭzorgi kontraŭ ĝi, antaŭkalkulante estontan militon, ĉar la societoj kaj profesoroj antaŭvidas kaj antaŭdiras al la homaro estontecon tute plenan je militoj.

Belgujo, male, simple malaperos: *Ni estas militakirintaj ĝin*, ili diras, *per ofero de plej nobla germana sango. Nia popolo volas unuanime neredoni ĝin. Teni posede Belgujon estas sen ia dubo afero koncernanta nian honoron*. Tiuj vortoj estas memorindaj por tiu, kiu provos difini la signifon de la vorto « honoro » en germana lingvo.

Koncerne Francujon, bedaŭrinde, estas necese, ke ia Francujo restu, kaj niaj malamikoj ne parolas ankoraŭ pri ĝia forigo; sed, unue, ĝi devos ne plu esti kolonihava regno. La profesoroj diras: *Ni ne povas forgesi, ke Francujo posedas supermezure vastan kolonian imperion, kiun Anglujo povus ekokupi, se ni ne kaptus ĝin*. Kaj tio estas ĝuste la rezono de ŝtelisto, kiu konfesos sian krimon, sed mirus esti riproĉita pro ĝi, dirante: « Nu, kion do? Se tiun homon mi ne estus ŝtele seniginta, alia senigis lin. »

Jen estas nun la sorto destinata por kontinenta Francujo: *Estas por ni fundamenta utilo, ke ni posedu la apudmaran regionon proksiman al Belgujo, proksimume ĝis rivero Somme*; kaj kompreneble ankaŭ plie la internlandon post tiu marborda regiono. Tio ĉi signifas, kiel ni jam scias, departementojn Nord kaj Pas-de-Calais, sed ankaŭ ion pli: « La internlando, kiun necese estas samtempe akiri, devas esti sufiĉe vasta, por ke tutan sian ekonomian kaj strategian gravecon povu ricevi la havenoj, kien finkondukas la kanaloj. » Tra tiu ĉi frazo vidiĝas la volo pligrandigi la aneksojn elprenotajn el niaj nordaj departementoj ĝis ili renkontos la aneksojn elprenotajn el niaj orientaj departementoj. Ĉe tiu ĉi flanko ne nur la distrikton de Briey postulas la Germanoj. Briey-on ili nepre deziras pro ekonomiaj kialoj; sed ili devas ankaŭ enkalkuli aliajn gravajn kialojn. Aŭskultu ni ja plenatente: « Post la spertoj de tiu ĉi milito estas tre kompreneble, ke ni ne risku nian limon al novaj malamikaj invadoj, lasante

al nia kontraŭulo la fortikaĵojn, kiuj minacas nin, precipe urbojn Verdun kaj Belfort. »

Tian frazon, kian ofte skribas Germanoj, oni ne scias kiel kvalifiki; eĉ la vorto « miregiga » ne sufiĉas. Aŭdante tiajn parolojn, oni mirrigidiĝas same, kiel aŭdante dirojn de frenezuloj. Ĉiuj scias, ke Germanujo amasigis ĉe nia limo kaj en la proksima posta regiono la plej timegindan aparataron de milita potenco. Kvankam multaj eminentaj Germanoj kaj la pangermanista araĉo antaŭsciigis nin, ke ili estas decidintaj iam nin premegi por eterne, ni tamen ne estus havintaj la rajton prepari nian defendon! Ĉiuj tiuj germanaj fortikaĵoj, tiuj strategiaj fervojoj, tiu amasigo de militistaro ĉe nia limo ne minacadis Francujon; sed Toul, Verdun, Belfort minacadis ja Germanujon! Ni do konsentu, ke Germanoj parolu al ni same, kiel lupo en la fablo parolas al ŝafido, ĉar ili nun scias, ke ni ne estas ŝafidoj. Sed ni vidu la konkludon: Germanoj postulas « la fortiklinion de Meuse ». Nu, se ili akiris tiun linion, Francujo perdus tuton aŭ parton de departementoj Ardennes, Meuse, Meurthe-et-Moselle, Vosges, kaj la tutan teritorion de Belfort.

Ĉu estas sufiĉe, ke oni forprenos de Francujo tiujn nordajn kaj orientajn teritoriojn, kiuj produktas, kiel ĉiu homo scias, la trionon de la tuta riĉeco de nia lando? Ne, tio ne sufiĉas; tiun dispecigitan Francujon necese estas malfortegigi: « Ni devas definitive tute forigi la francan danĝeron. Ni ne provu la reamikigajn klopodojn, al kiuj Francujo ĉiam kontraŭstarigis plej grandan fanatikecon. Por la utilo de nia propra ekzistado ni devas malfortigi tiun landon politike kaj ekonomie, sen ia ajn modereco. Estas necese, ke ni trudu al Francujo (kaj eĉ precipe al Francujo inter niaj kontraŭuloj) grandsuman monan militkompenson sen ia ajn indulgo. » Ĉar ili ne kuraĝis diri la sumon, tio pravas sendube, ke tiu sumo estas grandega; ordinare oni parolas en Germanujo pri dudek milmiliono; kelkaj pri tridek, eĉ pri kvardek milmiliono.

## III. Admono al la senpacienuloj. — Devo pri pacienco.

En sia deklaro la germanaj profesoroj ŝajnas esti maltrankvilaj timante, ke ili trovos en sia lando bonkorajn homojn, kiuj estus kapablaj indulgi la venkitojn tial, ke ili kredas je la ebleco de estontaj reamikiĝoj, kaj ankaŭ nervomalsanulojn, kiuj deziras, ke ĉio tio finiĝu, por povi reakiri la nervokvietecon. Se ne ekzistus en nia propra lando tiaj homoj, tio estus vere tro mirinda; efektive ekzistas kelkaj tiaj homoj. Ili sopiras la pacon, ili aŭskultas la famojn pri ĝi, kiuj iam kaj iam disvastiĝas; ili kredas je la ebleco de akceptebla paco; ili opinias, ke post la milito la nacia vivo rekomenciĝos same aŭ proksimume tia, kia antaŭe; ili sopiras tiun agrablan tempon.



La raporto kaj la deklaro ĝustatempe okazis por senluziigi tiujn kompatindajn naŭvulojn.

Ni efektive konsideru ankoraŭ unu fojon la estontecon, kiun ili promesas al ni: Unue la financon ruiniĝon. Por pagi la supermezuran militimposton, pligrandigitan per la monkompenso al la senposedigitaj posedantoj en la nordaj kaj orientaj departementoj, Francujo devus esti premegigata per impostoj. Tiu, kiu pene laborakiras kvar aŭ kvinmil frankojn poĵare, devus transdoni la pli grandan parton al la fisko. Sinjoroj rentuloj, kiuj havas supoze kvindek mil frankojn da rento, ĉu vi scias, ke fisko postulus de vi du trionojn aŭ tri kvaronojn el ili?

Poste, kiarimede oni povus pagi la kuponojn de la ŝtataj rentoj aŭ de la valoraroj ŝtate garantiitaj? Kiarimede pagi la pensiojn, la emeritulojn kaj niajn sanktegajn ŝuldojn al niaj kripluloj kaj al la familioj de niaj mortintoj? Kiu helpus al niaj vilaĝoj kaj urboj por restarigi siajn ruinojn, al niaj fabrikejoj por reestigi kaj al la laboro por renaskiĝi? Kiarimede la laboristoj de niaj kamparoj kaj urboj trovas salajrojn, kiuj povus ilin vivteni? Venkinta Germanujo signifus por la venkitoj bankroton, kiu naskus universalan kaj senripareblan mizeregon.

La Germanoj promesas al ni ankoraŭ ion pli malbonan: la ekstremon de la honto. Ni devus perdi tiun kolonian imperion pri kiu ni estas prave fieraj, ĉar ĝi estas akirita per la sango de niaj soldatoj, organizita per la saĝo de niaj militistaj kaj civilaj administrantoj, kaj tiel bone, tiel humane regita, ke Francujo estas por la enlandanoj patrujo por kiu oni mortas. Francujo devus esti limigata per riveroj Somme kaj Meuse! Sed ĝuste tiuj ambaŭ riveroj estis donitaj al ĝi kiel limoj en la jaro 843-a, kiam la nepoj de Karolo la Granda dividis inter si lian imperion. Malprogreso ĝis Somme kaj Meuse signifus malprogreso de mil sepdek du jaroj.

Fine Francujo senmembrigita, tutege senmonigita kaj senfortigita, devus daŭrigi sian malestimindan restan vivon sub estreco de Germanujo. Germanujo, kiu opinias, ke ni ne scias labori, regus nian komercon kaj industrian: ĝi eble favorvolus elekti inter ni laborsubmajstrojn.

Germanujo eĉ instruus nin kiel oni pen-as, ĉar tiu nacio, kie la pensularo fariĝis servanto de la prusa glavoregado kaj deklaras nepovi ekzisti sen ĝi, tiu nacio, kie cetere la pensa malkresko estas nedubebla, imagas, ke ĝi estas la instruanto de la homaro pri ĉiuj sciencoj.

Nu, mi demandas ĉiujn Francojn, mi demandas iun ajn Francon: « Prefere ol ni lasus detrui, per la dismembrigo de Francujo, la tiomfoje centjaran ellaboritaĵon de la praavoj, kiuj kreis la francan nacion, prefere ol ni, Francaro, pagus tributon al tiu imperiestraĉo kaj al lia popolo; prefere ol ni malleviĝus de la alta rango, kiun ni okupas en la homaro, ĝis la situacio de subula kaj dependa nacio; prefere ol ni estus sklavigitaj, ni, libera Francaro, ni, Francaro liberiginto de tiom da popoloj; nu mi demandas: Ĉu ne estas milfoje plibone morti? »

Sed pri nia morto ne estas la afero, ĉar Germanujo ne venkos. Ĝi estas ankoraŭ forta; ĝia frenezo, tiu frenezo kaŭzata de trommemestimo, helpas ĝian energion; sed tiu frenezo havigis al ĝi deziregojn, kiujn ne povus kontentigi energio kaj forto dekoble pli potencaj; ĝi gajnis kelkajn venkojn, ĝi gajnos sendube ankoraŭ kelkajn; sed iom post iom ĝi ne plu povos venki la kunigitajn fortojn de regnoj, kiuj nomiĝas Anglujo, Francujo, Italujo, Rusujo. Tiujn fortojn mi intencas entabeligi kaj kompari al tiuj, kiuj restas al Germanujo. Tiu komparo estas unu el la motivoj de nia nevenkebla espero; ĝi estas la rekuraĝigilo por nia pacienco.

Memoru ni, ĉiuj kune, ke pacienco estas kuraĝo de la nebatalanto. Ĝi estas lia armilo, defendilo kontraŭ la malkvieteco de la babiluloj kaj babilulinoj, netolereblaj diskonigantoj de nesingardaj paroloj, kaj kontraŭ la konsiloj de egoismo povanta konduki vel malproksimen tiujn, kiuj ne sentas la hontegon pri ĝi.

Estas feliĉo, ke nia popolo, sciante per sia sentrompa instinkto, ke la milito farata al ni de Germanujo estas ĝismorta milito, restas firma en sia pacienco, ĉar ĝi fidus je senmorteco de Francujo.

Parizo, la 15-an de Decembro 1915.

ERNEST LAVISSE.

## KIAN PACON NI VOLAS

El parolado de S-ro ĉefministro ASQUITH: en Lancaster House, la 10-an de Aprilo 1916.

Anglujo kaj Francujo partoprenis en tiu milito ne por sufoki Germanujon nek forstreki ĝin el la karto de Eŭropo, nek por detrui aŭ kripligi ĝian nacian vivon, ja nek por ĝeni, kiel pretendas la kanceliero, ĝian pacan kreskadon. Anglujo kaj ankaŭ Francujo estis devigitaj sin armi por malhelpi, ke Germanujo, alivorte Prusujo, stariĝu kiel

ĉiama milita minaco kaj superregu super la najbaraj nacioj.... La celo de la ligoj, en tiu ĉi milito, estas kontraŭstari tiun provon kaj, tion farante, prepari la eblecon por internacia sistemo, kiu certigos al ĉiuj civilizitaj landoj la principon de la egalrajteco...

Ni kaj niaj ligoj deziras kaj firme volas, ke reaperu la antaŭa Belgujo. Estas bezone, ke ĝi ne suferu daŭre pro la atencoj kontraŭ sia libereco, kaj estas necese, ke tio, kio estas detruiita, estu restarigita.



**El parolado de S-ro ministro LLOYD GEORGE,**  
en Conway, la 6-an de Majo 1916.

Mi tuj diros al vi, kion mi volas. Mi volas la venkon. Mi malamas la militon. Tial mi deziras, ke tiu milito estu la lasta; sed ĝi ne estos la lasta, se ni ne kondukos ĝin energie. Milito malbone kondukita kondukus al malbona paco, kio egalvalorus al neniu paco.

**El parolado de S-ro ĉefministro BRIAND,**  
la 22-an de Majo 1916.

Ni ĉiam klopodis por aranĝi senbatale kaj pace ĉiujn malkonsentojn. Memoru vi ĉiujn batalinvitojn, kiuj traflugis la mondon de jam dudek kvin jaroj. Neniu estis farita de ni. Al tiuj batalinvitoj ni respondis per la persista serĉado pri pacaj solvoj, ne tial, ke estis en ni timo, sed tial, ke ni deziris evitigi al la mondo la abomenaĵojn de milito, kies vastecon kaj ruinigojn ni antaŭvidis. Tamen ni, Francoj, havis en la flanko vundon ja doloran. Tio da pacienco ni montris ĉar ni atendis nur per la rajto la necesajn rebonigojn... Germanujo esperas malkunigi per siaj malrektaj artifikoj la interligitajn regnojn. Neniu el ni estos trompogata per tiel malŝatinda trompilo. Mi jam tion diris kaj ripetis: kiam sango fluegadas, kiam niaj soldatoj forferas kun tiom da memforĝeso sian vivon, la vorto «paco» estas malpiega, se ĝi ne signifas, ke la atakinto estos punita, kaj se morgaŭ Eŭropo riskos, ke ĝi estos ankoraŭ fordonata al arbitro, al fantaziaĵoj kaj al kapricoj de ia militista kasto soifeganta malhumilecon kaj superestrecon.

Tio estus malhonoro por la liganoj. Kion vi respondus, se morgaŭ, kontraktinte tian pacon, niaj landoj estus ree logataj al la frenezaj armadoj?... La paco estiĝos el la venko de la liganoj; ĝi povas estiĝi nur el nia venko. La paco ne devas esti vana formulo; ĝi devas esti bazita sur internacia leĝaro garantiita per sankcioj, kontraŭ kiuj neniu regno povos kontraŭstarigi. Tia paco radios super la homaro; ŝi donos la sendanĝerecon al la popoloj, kiuj povos labori kaj evolui laŭ sia propra spirito; la sango ne estos plu super ili. Tiu idealo grandigas nian taskon; por tiu idealo batalas niaj soldatoj kaj tiel gajvigle kuras renkonte al la morto... Jen la sola paco, al kiu ni devas celi.

**El parolado de S-ro ministro PAINLEVÉ, en Rouen,**  
la 27-an de Majo 1916.

Ni ne daŭrigas la militon por repuni niajn atakintojn egale je iliaj krimoj, por masbuĉi iam en Germanujo tial, ke ili masbuĉis en Belgujo, Francujo kaj Polujo. Ni ne starigas kontraŭ barbareco alian barbarecon, kiu povus tamen praviĝi tial, ke ĝi estus venĝopuna. Ni starigos kontraŭ ĝi la homan rajton kaj la justecon, kiujn ne povas kontentigi duonvenko aŭ necerta rezultato... Tiel longe ĝis Germanujo fleksiĝos sub la forto de la liganoj, ĝis ĝi estos kompreninta la abomenindecon de siaj krimoj kaj

akceptinta la penson pri la necesaj repagoj, tiel longe ne estos ebla repaciĝo inter ĝi kaj la homaro. Kiam la regnoj suferintaj la malnovajn aŭ la ĵusajn perfortaĵojn estos restarigitaj en sia tuteco, tiam, sed nur tiam la mondo povos retransviviĝi kaj la Paco, paco inda, konforma al la justeco, reĝos super Eŭropo liberigita, kie ĉiuj nacioj estos sendifektaj, ĉiuj fieroj protektataj.

**El parolado de S-ro ĉefministro BRIAND,**  
la 14-an de Sept. 1916.

La unuiĝo de ĉiuj vivaj fortoj de Francujo kondukas nin al la celo, al la paco per la venko, al paco firma kaj daŭra, assekurita per internaciaj taŭgaj sankcioj kontraŭ ĉiu ajn reveno de perforto.

**El parolado de S-ro Prezidanto POINCARÉ, respondanta al la Belga vicambasadoro, la 28-an de Sept. 1916.**

Se Belgujo ne reakirus sian plenan sendependecon, se ĝi ne ricevus la ŝuldatajn al ĝi repagojn, tiam neforigebla honto senhonorigus la historion de Eŭropo kaj ni devus por eterne volvekovri per funebra vualo la statuon de la Justeco. Oni povus trovi neniun Francan, neniun el niaj liganoj, kiu ne preferis la morton ol tiun malglorecon.

**El parolado de S-ro ministro Ed. GREY,**  
la 15-an de Nov. 1916.

Ni kaj niaj liganoj batalas por Eŭropo libera, Eŭropo liberigita ne nur el la superregado super iu ajn nacio de alia nacio, sed ankaŭ el la fanfarona diplomatio, el la danĝero de la milito, el la bruoj de la glavo ĉiam preta por elingiĝi, el la senĉesaj aludoj al la blindiga brilo de la bataliloj kaj al la militdion; ni batalas por la egalrajteco, por respekto al la justaj leĝoj, por la tutmonda paco kaj civilizeco, kontraŭ la bruta forto, kiu malakceptas ĉiun devigon, kiu konsentas neniun indulgon... Tio, kion Prusujo celas, estas Eŭropo modelita kaj regita de Prusujo, kiu tiamaniere disponas la liberecon de siaj najbaroj kaj de ni ĉiuj. Ni opinias, ke la vivo, en tiaj kondiĉoj, estus netolerebla. Ni batalas ankaŭ kontraŭ tiu germana ideo, ke senĉesaj militoj estas nature utilaj kaj preskaŭ dezirindaj. La germana filozofio pensas, ke konstanta paco kondukas al degenerado. La persistado de tia filozofio sekvigas la senĉesajn antaŭtimojn, la maltrankvilecon pro la ĉiam pligrandigantaj armadoj kaj la haltigon por la elvolviĝo de la homa civilizo... Ni fidis je internaciaj traktadoj kaj interkonsiliĝoj. Ni proponis jam antaŭ la milito interparoladon al Germanujo, kiu malakceptis la proponon, dum Rusujo, Francujo kaj Italujo akceptis ĝin. Rusujo proponis ankaŭ al Germanujo submeti la malkonsenton al la Haga Tribundo; ĝi ricevis neniun respondon, ĉar Eŭropo devis subiĝi sub la germana volo aŭ fari la militon... Neniu deziras pli ol ni la pacon, sed ni volas tian pacon, kiu traktos ĉiujn laŭ justeco, pacon, kiu restarigos respekton al la internacia leĝaro.